

KATALUNA ESPERANTISTO

Monata Esperanta Gazeto

JARO VII^a : JAN.-FEBR. 1916

1-2

SOCIETOJ KAJ GRUPOJ ALIGINTAJ AL LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO AŬ ABONINTAJ AL KATALUNA ESPERANTISTO

Almería	Esperantista Grupo	Almacenes de Mac Marray
Argentera	Esperanta Tarragon-Provinca Ligo.	
Bahia Blanca (R. Argentina).	Ateneo Esperantista	Patagones, 8
Banyoles	Esperanto kaj Patrujo.	Café del Comerç
Baracaldo	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Barbarà del Vallès	Esperanta Nesto	
Barcelona	Barcelona Stelo	Marquès del Duero, 88
„	Ĉiam Antaŭen	Poblet, 25
„	Esperanta Fakto C. A. de D.	Rambla Santa Mònica, 25
„	Esperanto kaj Patrujo.	Sant Simplicí, 6
„	Fervojista Stelo	Princesa, 50, pral.
„	La Rondo.	Provença, 156
„	Libera Stelo	Muntanya, 61
„	Nova Sento	Enna, 151
„	Semo (A. E. P.).	Carme, 30
„	Supren	
„	Universala Frateco.	
„	Inst. por vulgarigo de l' Esp. Gaz.	Peu de la Creu, 10
„	Unió Catalanista	Canuda, 14, pral.
Bilbao.	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Buenos Aires (R. Argentina).	Esperantista Grupo Socialista (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Calafell	Casal Català	S. Juan, 782
Casà de la Selva	Laboro kaj Kulturo	Pon, 2
Falset	Lernejo kaj Mangejo	
Girona	Prionata Stelo	
„	Ĝerona Espero	Cambra de Comerç
„	Studenta Juneco	Seminari
La Arboleda.	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Manlleu	Esperantista Amikeco	Pont, 38
Martorell	Martorelĵa Stelo.	Independencia, 6
Mieras.	Esperanta Fervoro	
Molins de Rei	Stelanoj	Sant Miquel 14
Mollet.	Vojantaŭen	Soc. La Aliança
Moskvo (Rusujo)	Esperantista Societo	Lubjanskij pr., 3
Murcia	Esperantista Grupo	Sociedad, 14
Olot	Olot Stelo	Biblioteca Popular
Palafrugell	Paco kaj Amo	Unió, 2
Palma de Mallorca.	Esperantista Klubo	Misión, 5, 1 ^o
Reus	Nova Semo	Major, 15
Rubi	Esperanta Bargono.	
Sabadell	«Aplech» Esperanta Grupo	Via Massagué, 55
„	Esperanta Semo.	
Sant Feliu de Guixols.	Frateco	Caymó, 32
Sant Llorenç Savall	Monta Grupeto	
Sant Vicens de Torelló	Homara Fratigilo	Serrallonga, 8
Santa Coloma de Farnés.	Esperanta Idealo	
Sta. Perpètra de la Muga.	Kamparo	
Sevilla.	Esperantista Grupo	Económica de A. del País
Tarragona	Tarragono Esperanta	Sant Agustí, 4, 2 ^a
Terrassa	Lumon.	Nord, 26
Torelló	Nova Harmonio.	Nou, 74
Vendrell	Frateco	Dr. Murillo, 12
Ventalló	Flugila Penso	
Vich	Vika Esperantistaro	Argenter, 9
Vilanova i Geltrú	Laboro Esperanta	Sant Antoni, 1 i 3



Nia devizo: *Maro estas gularo*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

KAJ DE Baska Esperanta Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Palla, 8, principal: Barcelona



EN LA NOMO DE LA KATALUNA ES-
PERANTISTA FEDERACIO NI PREZEN-
TAS AL LA TUTA ESPERANTISTARO
SINCERAJN BONDEZIROJN POR JA-
RO 1916. ♦ NI SENDAS APARTAN KORAN
SALUTON AL LA BASKA ESPERANTA
FEDERACIO KAJ AL ĈIUJ GRUPOJ
NOVEVENINTAJ AL NI PARTOPRENI
EN LA KOMUNA TASKO. ♦ KE TIU ĈI
REKOMPENCU ĈIUJN PER FRUKT-
ABUNDA RIKOLTADO! — LA KOMITATO



Hispana Esperantista Konfederacio

Ni ĵus preteriris sur la sojlo de nova jaro en ĝian malluman internon. Ni rigardas en ĝin, kvazaŭ en la faŭkon de monstro, kaj ni ankore sentas la deziron, ke ĝi ne enprenu nin kaj ke ĝi forlasu la gefratojn, kiujn ĝi katenas per terura militado. Se ni estas senpovaj liberigi ilin el la monstraj ungegoj, ni tamen konscias, ke ni povas labori por eviti rean similan teruron, kaj ni tion faras kun optimisma kredo, ke la diskonigo de helpa lingvo kontribuos potence, iom post iom elradikigi interhomajn malamojn.

Ni estas certaj pri nia venko, tamen neesperante ĝin tuja, ĉar ni konscias, kiel malfacile estas ĝispenetri al la profundo de homa koro. Sed kvazaŭ *guto malgranda konstante frapanta*, ni klopodas porti la semon de nia ideo tra la ŝtono ilin kovranta al, unu post alia, ĉiuj bonaj koroj. Tia estas la tasko, kiun fiksas al si la ĵus naskita HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO, ĉar ĝi estas la tasko, por kiu laboris kaj laboras la federacioj en konfederacio kunagantaj.

Ni memoras, amikoj, la diskutojn kaj senfruktajn disputojn antaŭ la starigo de nia KATALUNA FEDERACIO, kiuj alportis nenion rezultaton. Ni memoras, ke malmulte da samideanoj (5 grupoj kaj 50 privatuloj), malestimante admonojn senkuraĝajn, suspektojn kaj rivalaĵojn, kunigis sin kaj promesis antaŭenpuŝi sian projekton starigi tiun Federacion, kiun multaj eĉ ne komprenis utila. Kaj ni memoras, ke la entuziasmo de tiuj unuaj revuloj ame altiris al ili la ceterajn grupojn kaj izolitajn esperantistojn, kiuj dekolbligis la nombron de la komencintoj. Ni konstatas nun, kiam ni komencas vivi nian sepan jaron, ke nur danke al tiu kunigo de la entuziasmo ĉies sub la federacia ŝirmaĵo, iom post iom, per konstanta agado, ame daŭrigata, floras inter ni nia lingvo, se ne laŭmezure de nia deziro, almenaŭ sufiĉe kontentige por nia peno.

Oni komprenos pro tio, kial la katalunaj kaj baskaj samideanoj bedaŭras, ke en la unua momento de kreado, kiam sindonemo valorigas tre alte ĉian helpon, aliaj enlandaj organizaĵoj tenis sin flanke de la starigo de Konfederacio, kiun certe ili poste, eble tuj, helpas, eble jam nun helpas, simile tiel, kiel okazis ĉe la fondo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO.

Se niaj vortoj ne sukcesis allogi vin, amikoj karaj, kredantaj nin sur erara vojo, ni klopodos, ke niaj agoj vin aligu al ni, kaj ni estas ja certaj, ke ĉiuj hispanlandaj esperantistoj venos fine plilarĝigi niajn vicojn, kiam ili estos konstatintaj, ke nia komuna laborado estas fruktoporta.

Taŭgu tio ĉi por respondo sincera al la bedaŭrinda voko, per cirkulero (Decembro 1915) farita de la Komitato de *Hispana Societo* p. p. E. kiu montras, kiom ruinigis tiu sur malfortika fundamento starigita organizaĵo, kies diŝfalo ja ne montras, ke nia ideo ĉe ni pereis, sed ke la samideanoj irintaj sub la gvido de *Hispana Societo* senvoje erarvaginte laciĝis, ne trovante en tiu asocio fonton kapablan kvietigi ilian soifon de idealo. La Komitato de *Hispana Societo* timas, ke eble ĝiaj anoj kaj tiuj de KONFEDERACIO povus malamike kondukti inter si: ni ne estas kapablaj konscii, kial oni povas tion timi.

Apud nejuna, sekiginta arbo, ekstaris sukoplana arbeto, kiu etendas al la suno siajn novajn branĉetojn. Kia ĝojo por la arbeto se ĝi vidus ĉe foliigo, ke la seka arbo ankaŭ rejuniĝas kaj kovras sin per verdanta foliaro! Kiel karese ili interplektus siajn branĉarojn! — Sed, ve, ke la malforta arbo velkis, kaj oni ne povas esperi, ke ĝi rejuniĝos!

Samideanoj, amikoj, fratoj, kiuj ŝirmis vin kontraŭ la indiferteco sub la foliaro de l' nejuna arbo: se tiu ĉi jam ne ombrodonas al vi, venu al la heleverda nova foliaro de la juna arbeto, kiu ame, drolote kovros vin per sia foliaro. Ne timu: Frateco nin forgesigos ĉiam pri malnoblaj malamoj.

Esperantistoj de la tuta Hispanlando: la HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO malfermas, etendas al vi siajn junajn brakojn. Revekiĝu, ke por la unua fojo, okazos en tiu ĉi jaro tutlanda Kongreso, kie ni ĉiuj havos okazon unuritm, harmonie, batigi niajn korojn.

JOSEF GRAU



Niaj nunjaraj Kongresoj

VII^a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio

I^a Kongreso de Hispana Esperantista Konfederacio

EORPASIS apenaŭ kvin tagoj post nia Kongreso en Vilanova, kiam la Komitato de la K. E. F. jam ricevis esperoplenan komunikon de niaj samideanoj el Reus, per kiu ili sciigis pri la starigo de la kongresa organiza komitato kaj pri la komenciĝo de la prepara laboro.

La Organiza Komitato konsistas el la estimindaj, bone konataj samideanoj, S-roj Enric Aguadé Parés, *Prezidanto*; Josep Domènech Alberich, *Vicprezidanto*; Francesc Simó Rom, *Financisto*. Ĉirkaŭ ili la tuta samideanaro de grupo *Nova Semo* klopodas al la sukceso de niaj festoj.

La grava enurba societo «Centre de Lectura» proponis al la Organiza Komitato sian socian loĝejon, kiu entenas krom belaj salonoj ankaŭ vastan teatron, kie la Internaciaj Floraj Ludoj havos decan lokon. La helpo efika de la nomita societo havas tre altan valoron, ĉar ĝi altiros al ni la tutan loĝantaron de Reus. Ankaŭ aliaj asocioj promesis sian helpon al la laboro de la Organiza Komitato.

La tri enurbaj ĵurnaloj *Foment*, *Diario de Reus* kaj *Las Circunstancias* malfermis kongresan rubrikon, per kiu la O. K. sciigos pri la irado de la preparaj laboroj.

La dato de la Kongresoj estas fiksita por la 11, 12 kaj 13 de Junio nunjara; tio estas, por la Pentekostaj festoj. La situacio de la kongresurbo apud ĉefa relvojo rekte kondukanta al Zaragoza kaj Madrid; facile alirebla, tra Tarragona, de la samideanoj el Valencia kaj Murcia, kaj la oportuna dato de la Kongresoj, esperigas, ke la hispanaj samideanoj, kiuj plejmulte ne konas per propra sperto, kiom kuraĝigas la ĉeesto en Kongreso, volos amase partopreni en la I^a Kongreso de la HISPANA KONFEDERACIO, kiu okazos la nunan jaron kune kun la VII de nia K. E. F., kio, ni pensas, povas garantii pri la allogo kaj hela sukceso de la tutlanda kongreso por la unua fojo okazonta en Hispanujo, kiun certe sekvos aliaj samsukcesaj pro la zorgo de la *Baska Esperanta Federacio* kaj de la ceteraj enlandaj federacioj.

La Honora Komitato de la Kongresoj, de kies anoj la O. K. ricevis tre favorajn leterojn, konsistas el la jenaj ekscelencaj sinjoroj sub la prezido de lia Moŝto la Reĝo de Hispanujo. Certe multaj el ili persone ĉeestas la kongresajn solenojn kaj ni tial havos okazon montri al ili kun kia entuziasmo ni laboras por nia bela ideo. Samideanoj : promesu al vi mem, jam nun, ke vi iros refreŝigi vian kuraĝon ĉe la VII^a Kongreso de K. E. F. kaj I^a de H. E. K.

HONORA KOMITATO

Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII, *prezidanto*.

Lia Ekscelenca Moŝto la Ministro de Publika Instruado.

Lia Ekscelenca Moŝto Sinjoro Enric Prat de la Ribas, prezidanto de «Mancomunitat de Catalunya».

Lia Ekscelenca Moŝto la Civila Provincestro de Tarragona.

Lia Ekscelenca Moŝto Sinjoro Antolin López Peláez, Arĥiepiskopo de Tarragona.

Lia Moŝto Sinjoro Ramón Vidiella Balart, prezidanto de la Provinca Deputitaro de Tarragona.

Lia Moŝto Sinjoro Josep Balsells Cortada, senatano.

Lia Moŝto Sinjoro Josep Elías de Molins, senatano.

Lia Moŝto Sinjoro Eduard Calvet, senatano.

Lia Moŝto Sinjoro Josep Nicolau Sabater, parlamenta deputito.

Lia Moŝto Sinjoro Julià Nogués Subirà, parlamenta deputito.

Lia Moŝto Sinjoro Antón de Veciana Llari, parlamenta deputito.

Lia Moŝto Sinjoro Miquel Alimbau Minguell, provinca deputito.

Lia Moŝto Sinjoro Antón Borrell Sagrañes, provinca deputito.

Lia Moŝto Sinjoro Antón Estivill i de Llorach, provinca deputito.

Sinjoro Urbestro prezidanto de la Konstitucia Urbkonsilantaro de Reus.

Sinjoro Jugisto de la Distrikto Reus.


Sinjora Moŝto Direktoro de la Generala Teknika Instituto de Reus

Sinjoro Kolonelo, Militista Ĉefo de Reus.

Reverenda Sinjoro Prioro de Reus.

Sinjoro Kapitano de la Civila Gardio de Reus.

Sinjoro Prezidanto de «Centre de Lectura» de Reus.




EN VENONTA NUMERO APEROS

S O P I R O J

ORIGINALE VERKITAJ VERSSEPOJ

DE S-RO ARTUR DOMÉNECH

PREMIITAJ EN LA V^o INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



La Bajoneto¹

Devizo : Per aspera ad astra

ATENTU, ke ili ne falu!—kriis la maljunulo, kun akra, malbela voĉo. Kvazaŭ responde, el la amaso da armiloj falis bajoneto, longa malnova bajoneto, kaj la maljunulo faris salton malantaŭen.

— Atentu, diablono! — li rekriis, dum la alia ĵetis rigardon teren kaj ŝajnis duobligi la zorgojn, por ke aliaj armiloj ne falu.

La maljunulo kliniĝis kaj atente rigardis la armilon, kiu preskaŭ traboris lian piedon. — Ha, jen kial ĝi falis, — li diris kun malbela rideto, kiu montris longan vicon da flavaj dentoj, sub la lumo de la lampo — la klingo duontranciĝis la rimenon, kiu ĝin tenis, kaj la moveto, per kiu vi tremigis la amason, sufiĉis por tranĉigi la ceteron. Vi ĝin remetnu en ĝian lokon.

La servisto prenis la bajoneton, ĝin rigardis, kaj kun ridaĉo duone nekredema, duone superstiĉa, li diris:

— Via Moŝto eraris, ĝi ne falis pro tio: ĉu vi ne vidis la numeron, kiun ĝi havas?

La maljunulo rigardis, kaj murmuris:

— Strange! Certe en la milito ne multaj bajonetoj havas saman numeron! 131313! Trifoje 13! Ha! se mi estus superstiĉema!

Sed la maniero, per kiu li diris tiujn ĉi vortojn montris, ke li ne estis plene certa ne esti tia.

En stranga subtera kelo, zorge kaŝata al ĉies okulo, havis lokon tiu ĉi interparolado.

Ĉirkaŭe bareloj de ĉiu formo flankumis la murojn, kaj en unu el ili tiu el la du interparolantoj, kiun ni nomis la servisto, zorge enmetis kesteton, ĵus plenigitan je tiuj samaj diverskvalitaj armiloj, kiuj formis grandan amason en la mezo de la kelo. La mastro, preskaŭ sesdekjara viro, forta tamen kaj vigla, marŝis tra la ĉambro, murmuretante nekompreneblajn vortojn kaj serĉante kaŝi ian malkvietecon, kiu tamen lin regis.

— Kion vi pensas, mastro? — diris la servisto, post longa, peniga

1. Premijita en la V^a Internaciaj Floraj Ludoj.

silento. — Ke morgaŭ tiuj ĉi armiloj povus esti turnataj kontraŭ niaj soldatoj?

— Kontraŭ niaj soldatoj? Ha, neeble: ni ne havos militon kontraŭ ili.

Duafoje, en la sama vespero, oni sentis, ke li ne estis plene certa pri tio, kion li diris.

La maljunulo kaj lia servisto estis — kiel oni divenis — kontrabandistoj. Malgraŭ la severa malpermeso eksporti armilojn, du bareloj da ili ĉiusemajne transpasis la landlimojn, zorge kaŝitaj en biero, je kiu la lingardistoj kredis plenaj la barelojn. Nia maljunulo sentis ke lia ago ne estas el la plej honestaj, sentis, ke, ĉar lia patrujo malpermesis la eksportadon, ĝi devas havi kaŭzon: tiom pli li devus senti la devon ĉesigi komercadon, nun kiam lia patrujo ŝajnas ekmilitonta kontraŭ la apuda lando. Sed la gajno estas grandega, kaj la oro... *quid non mortalia pectora cogis auri sacra fames?*

Ĉu ne estas avido tiu stranga flamo, kiu nun brilas en liaj okuloj? Li fikse rigardas en la neniaĵon, kaj liaj dentoj grinças. Subite li skuigas.

— Ĉu vi finis? li demandas.

— Ĵus, sinjoro. Nur mi devas naĵli, tie ĉi.

Mallonga martelado, kaj ĉio estas preta.

— Jen la du bareloj, sinjoro. Morgaŭ niaj lingardistoj denove vidos bieron. Kaj denove ili estos trompataj. Ĉu vi scias, en mia knabeco...

— Silentu, silentu! mi konas vian malnovan sensencaĵon — maldolĉe interrompis la mastro.

— Kion li havas tiun ĉi vesperon? murmuretis inter la dentoj la servisto. — Mi neniam lin vidis tiel malbonhumora... Kaj li ekbruligis kandelon, por resupreniri.

— Bieron ankoraŭ? Ĉu ĉiam bezonas bieron tiuj malbenataj bestoj? Kaj ĉu ĉiam vi ĝin liverados?

Tion diris bela dudekjara junulo, honesta vizaĝo sub nigraj, liberaj haroj. Elegante vestita, li frapis per bastoneto, nerveme, kvazaŭ li volus ilin rompi, la du barelojn pretajn por ekspedo.

— Ne pensu pri tio, mia filo. Ci studu, ci laboru, kaj ne pensu pri la negocoj de ĉia patro. Kion mi faras, mi ne faras malbone.

— Hum! — murmuris la filo. — Ne malbone! liveri bieron al tiuj hundaĉoj, kiujn ni baldaŭ ekstermos! kaj li foriris grumblante, dum la patro ĵetis strangan rigardon al la servisto.

— Kia biero, he! — Kaj la servisto ridaĉis.

Tri monatoj pasis. Juna telegraphportisto eniras en la oficejon de la maljunulo : — Telegramon por vi, sinjoro!

La maljunulo tremetante subskribas kaj malfermas la folion, kvazaŭ antaŭvidante malfeliĉaĵon. — Ha! — li ekkrias, pala, kun frunto sulkoplena — mia filo!

Li legas : — Kaporalo F. heroo falis, vundata en la preno de la lastaj tranĉeoj de la monto Z. Li urĝe petas vidi familianojn. Hospitalo 18^a, malantaŭ la fronto.

Li pasigas la manon sur la vizaĝon, kvazaŭ por depuŝi fiksan ideon. — Dio volu, ke li ne estu grave vundita! Mi tuj devas iri. — Kaj, donante la ordonojn por la forveturo, li ŝajnas maljuniĝinta je dek jaroj.

— Kaporalo F.? 24^a regimento? Ha, jes. En la sesa ĉambro. Venu kun mi, sinjoro. — Ha, vi estas lia patro? Mi ĝojas fariĝi via konato. Vera heroo li estis. Rakontis al mi mia kolego lia kapitano, pri lia braveco. Li incitis siajn soldatojn, ĉiam kurante kie plej granda estas la danĝero; kaj antaŭhieraŭ, sur la monto Z., kuris kun bajoneto al la tranĉeoj prenotaj. La malamiko kontraŭstaris; vera giganto venis kontraŭ li, kaj serĉis trapikegi lin. Li ne cedis; malgranda duelo komenciĝis kaj fine li sukcesis venki. Sed alia soldato venis kaŝeme kaj trapikis lin per bajoneto, dum via filo sin liberigis de l'unua kontraŭulo. Sufiĉe grave lia brusto estas vundita, bedaŭrinde : li tuj perdis konscion, sed antaŭe li detiris la bajoneton de la brusto kaj ĝin tenis per krispiĝintaj fingroj. Ankaŭ kiam li rekonsciigis, li ne plu volis ĝin lasi. Stranga ideo, ĉu ne vere? Jen, ni estas en la ĉambro. Tie, sur la antaŭlasta liteto. — La militkuracisto, ĝis tiam parolinta, montris per fingro la liton; la patro alkuris kaj kliniĝis por kisi la filon. La filo lin pe rekonis : li sence paroladis:

— Kiel granda li estas. Ne, ne, mi venkos, kaj havos medalon!

— Li ĝin havos — murmuris al la patro la kuracisto.

— Alia, ankoraŭ — daŭrigis la vundito — alia malamiko kun bajoneto. Ne, ne, malproksimen. Kaj bajoneto, kie ĝi estas? Mi ĝin volas, kara bajoneto kun mia sango.

Li silentis dum momento, kaj restis senmova.

— Ĉu vi volas ĝin vidi, sinjoro? Jen. — La kuracisto malfermis tirkeston kaj montris al la maljunulo la batalilon, kiu preskaŭ mortigis lian filon.

— Donu al mi, sinjoro kapitano, donu. — Ion strangan la patro havis en la okuloj. La kuracisto ne rimarkis tion, kaj diris:

— Ne vundu vian manon, sinjoro.

La maljunulo avide rigardis la klingon kaj la numeron sur ĝi; liaj okuloj subite fiksiĝis, li portis manon al sia koro, kaj falis teren, kiel frapita de fulmo.

Du tagojn poste, estis entombigataj la kaporalo F., mortinta pro vundoj, kaj kune lia patro, samtempe lia naskinto kaj mortiginto.

BRUNO MIGLIORINI



La Najtingalo

I

KIAM la junaj najtingaloj estis lernintaj la *Kanton de Amo*, ili disflugis tra la branĉaro de la salikaro kaj ĉiu ekkantis al sia amatino — kiun ĉiu amis jam antaŭ ol koni.

Ĉiu ekkantis al sia amatino, krom Najtingalo kiu levis sian kapon, fikse rigardis la ĉielon kaj pasigis la nokton ne kantante.

«Li ankoraŭ ne scias la *Kanton de amo* — la ceteraj najtingaloj diris unu al la alia. — Kaj ili gaje kantadis miksan te al siaj mildaj arpegoj, sarkasmajn notojn.

II

Li ja sciis la *Kanton de Amo*! sed ve, la malfeliĉa Najtingalo estis vidinta supre, en la blua ĉielo, kie senfina nombro da steloj vojiras, stelon, kiu palpebrume lin rigardis.

Ŝi¹ lin rigardis kaj malrapide, malrapide subiradis kaj malaperis antaŭ la matenbeliĝo; kaj la malfeliĉa Najtingalo ŝin rigardis, ŝin rigardis ankaŭ fikse... kaj kiam la stelo estis subirinta, li restis absorbita kaj malgaja ĝis la proksima nokto.

Sed nokto alvenis, en kiu la Najtingalo ekkantis per mallaŭta voĉo — tre mallaŭta — al la stelo; kaj laŭtigante la voĉon tagon post tago, en la somermezo li kantis jam per laŭta voĉo tre laŭta; — li kantadis la tutan nokton ne flankigante la rigardon. Kaj de la ĉielo, palpebrume, la stelo ĉiam rigardis lin kaj ŝajne plezure lin aŭdis.

1. En kataluna lingvo, *stelo* estas virinsekso. — N. de la T.

Kiam forpasis la sezono de l'amoj, la najtingaloj silentis kaj forlasadis la salikaron, jen unu, morgaŭ alia. La malfeliĉa Najtingalo, ĉiam senmova sur la plej alta branĉo kantadis al la stelo.

III

Kaj pasis someroj post someroj, kaj la novaj amoj malaperigis la amojn malnovajn kaj la *Kanto de Amo* ĉiam renovigis kaj ĉiu najtingalo kantis al sia nova amatino... Sed la malfeliĉa Najtingalo ankoraŭ kantadis al la stelo.

Kaj en nokto, ne rimarkante ke ĉirkaŭ li jam nur kantas pli junaj voĉoj ol la lia; en nokto, eĉ ne supozante ke liaj fratoj estas jam ĉiuj mortintaj; kun la rigardo ĉielen kaj kantante al la stelo, la Najtingalo falis mortinta de la supro de la plej alta branĉo.

Tiam la junaj najtingaloj — kiuj ĉiunokte kantas al siaj novaj amatinoj — ne plu kantis kaj ili lin kovris per salikaj folioj, dirante ke li estis la plej poeto el ĉiuj najtingaloj. Sed ili neniam sciis, ke li estas, kiu plej suferis el ĉiuj najtingaloj de la salikaro.

Katalune verkis APELES MESTRES

Tradukis ESTANISLAU PELLICER



“Preciosa”

En soleco ne estas mi sola:
min ĉirkaŭas en dolĉo kaj mild'
flugpendante en brilo la luna
via kara, aminda la bild'.

Por vi pensas mi nur kaj laboras
inter ĝojo, dezir' kaj dolor'.
Kie migras aŭ restas, eterne,
apud vi sentas mia la kor'.

Briletanta kaj bona vi estas
kiel neatingebla la stel',
estas vi, eĉ en malproksimeco,
por animo la mia, ĉiel'.

Germane verkis A. WOLF

El originalo tradukis FELIX DIEZ

Al la gekantistoj el Terrassa¹

KIEL vi vekigis, amikoj el Terrassa! kian gajan krion vi eljettis al la naskiganta suno! Vi, la laboristoj: dormadis en via laboro, kaj laborante vi songadis. Kaj via songo estis jena. Estas forte dolĉe gajni al si la panon kaj ĝin porti hejmen; estas dolĉe vidi la gefilojn mangantaj kaj la maljunulojn tute vestŝirmitajn ripozadantaj ne mankaĵoj je io kaj la edzinon belvestitan mastrumadanta en la abundeco de la hejmo...; sed, ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Estas ebriiga la fiereco pri l' laboro, kiam oni sin sentas mastro de l' aferoj, kaj kiam oni ilin transformas ilin riĉigante kaj sin riĉigante per ili; estas plezuro fariĝi riĉa... sed, ĉu ne ekzistas io alia?... ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Estas profunda ĝojo laborakiri por si la necesajn kaj la superfluan, kaj batali kaj venki, kaj kontentiginte, povi al si ornamo la venkajn manojn per la brila superfluo de la orringoj, simboloj de la venkoj, kaj povi etendi la manojn tiel juvelornamitajn, kun rega gesto en domo granda, kaj bela, kaj nia, sur la personojn, kiuj en ĝi loĝas kaj sur tiujn, kiuj eniras kaj eliras, kaj grandigadi ĉirkaŭ ni nian imperion... sed, ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Ĉu ne ekzistas io pli bona ol la regadoj kaj imperioj, pli bona ol domo granda kaj propra, pli bona ol ringoj ĉe la fingroj kaj diademoj ĉe l' tempioj, pli bona ol oro, pli bona ol pano? (Dio mia, pli bona ol pano!) Tiu estis via songo, kaj tiu la maltrankvilo pro via songo. Sed subite vi malfermis la okulojn al la radio de la naskiganta suno, kiu ilin vundis, kaj ekkreis en unu kanto, vi, malriĉuloj kaj riĉuloj, malgrandaj kaj grandaj, mastrantoj kaj mastratoj, venkantoj kaj venkatoj de l' laboro, kaj vi spertis ke en tiu kanto ĉiuj vi egale ĝojas, kaj ke tiu frateco de la kanto estas pli bona ol la pano, ol la oro, kaj ol ĉiuj riĉaĵoj kaj regadoj sur la mondo.

Kiam malriĉulo kantas, li ridas je la riĉuloj kaj je iliaj riĉaĵoj kaj kiam riĉulo kantas li sentas sian ĝojon frata al tiu de la malriĉulo, kaj eĉ li donas al li la sangon. Efektive kiam oni kantas, oni sentas sin liberigita de ĉia bezono, de ĉia timo, de ĉia ambicio, ĉar tiam parolas en ni tiu senmorta parto de nia estaĵo, kiu ne povas suferi malsaton nek malvarmon, kiu ne povas esti ĝenata nek prenata de iu nek pro io en la mondo, nek ankaŭ ĝi havas bezonon de regado por fariĝi kon-

1. Parolado antaŭ voĉkoncerto. Jaro 1904^a.

Elreviĝo¹

DZVIZO : *Indas iri sangopage
al la land' de l' idealo*

Mo! Kian surprizon mi havis hodiaŭ, reveninte hejmen! Tie restis neniu; ĉio — solecel!

Malferminte la pordon de mia labortambro, mi renkontis vizitulon. Estis mallume; la pordo staris fermita, kaj tra la fendeto suba, inter pordo kaj planko, eliĝis grizeca lumo. Mi malfermis kaj mi restis mirante. Sinjorino Lanhelo estis veninta min viziti, kaj por oportune atendi mian revenon, estis sidiginta sur sofo, kaj ĉar ties loko ne estis sufiĉe vasta, ŝi etendigis sur mia labortablo, arĝentnuance kolorigante la paperojn dislasitajn sur ĝi kaj reflektigante sur la vitro de la inkujo.

Ĉu vi volas kredi, ke mi ne kuraĝis eniri? Starante ĉe la sojlo, mi restadis longe, ne kuraĝante enkondukiĝi antaŭ mian vizitanton. Sed — mi pensas — dezirante karesi min, ŝi penis diri, ke mi eniru; kaj... ĉu vi scias, kiel ŝi faris tion?

La alta fenestro de mia ĉambro rigardas aleon, kies arboj burĝonas nuntempe; iliaj branĉoj alteniras ĝis super la fenestro kaj fariĝas dum somero refreŝiga kurteno el ombro. La vento, petolinta la tutan tagon tra la urbo, jam ne blovis, kaj la ekkreskanta foliaro restis kviete; sed sinjorino Lanhelo blovigis ĝin, kaj filtrigante inter la branĉojn, kiujn ĝi movas, ŝi faris tiajn gestojn, ke mi komprenis ŝian deziro, ke mi eniru. Kaj ĉi tion mi faris.

Dolĉa kiso estis ŝia unua kareso kaj ankoraŭ mi ne estis trankviliginta je l' emocio, kiam ŝi tute min ĉirkaŭprenis. Ŝi forlasis la sofon, kie ŝi sidis, kaj min igis eksidi. Kiom, tie, da karesoj kaj dorlotoj! Silente ŝi almetis siajn belajn negokolorajn brakojn ĉirkaŭ mian kolon kaj superlumis min per sia brilega hararo; kia ĝojo!

Strange: ŝiaj mildaj karesoj ne ŝajnis al mi ĵaluzigaj; ili ne rompigis al mi fidelecon; mi ilin akceptis plezure kaj ilin ĝuis ekstaze.

Ŝi daŭre min dorlotis; de tempo al tempo sin movante tra la branĉoj, kiujn la vento skuas, ŝajnis kvazaŭ ŝi volus min tikli; ŝi

1. Premiita en la V^a Internaciaj Floraj Ludoj.

amuziĝis alifoje forlasi min momente, por sin ĵeti subite sur min, ĉirkaŭprenante min per sia lumradiaro.

Fine, ŝi kvietiĝis kaj trankvile parolis al mi. Ŝi ŝajnis feino; ŝiaj piedoj ne surtuŝis la plankon, ili flosis en la aero; lazuraĵo hela sin tute ĉirkaŭis; ŝia vizaĝo estis blankega, tiel ke nenio povas eĉ prezenti similon je ĝia blankeco: senmakula neĝo estus pala apud ĝi; ŝiaj manoj estis la blanko mem; kaj ŝiaj haroj? Ŝiaj haroj estis kaskaĵo el argento, el ondoj nepriskribeble blankaj! Ĉu vi vidis iam la riverakvon, kiun pluvadoj malpurigis, formantan fluante girlandojn el ŝaŭmo, blankajn spite la ruĝeco de l' akvo ilin kreanta? Imagu, do, kiel blanknuancaj estis la lumondoj de ŝia hararo, formitaj de la plej pura argento!

Kaj ŝi pri vi alparolis al mi; ŝi diris, ke ŝiaj karesoj ja ne elvenas de ŝi; ke vi estas kin ilin faris, ĉar ŝi multfoje surprizis vin pensantan pri mi kaj estis leginta en via penso kaj akceptis la komision transdoni al mi viajn amaĵojn. Tiam mi komprenis, kial mi trovis ĉarmaj ŝiajn dorlotojn, kial ŝiaj kisoj estis dolĉaj; ja estas vi, kiu ilin al mi faris!... Kaj ŝi elvolvadis sian rakonton.

Ŝi diris, ke kiam ni reostos kune, ŝia bonvola lumo helpos nin revii; ke en belaj someraj noktoj ŝi alsendos al ni kun siaj radioj garbojn de florplenaj iluzioj; ke kiam, tuŝinte realaĵon, ili velkos, ŝi dolĉigos per sia heleco la amarecon de l' disreviĝo. Kaj ankoraŭ kiom da belajoj ŝi al mi diris! Ŝi parolis tiel milde, tiel belsonoraj estis ŝiaj vortoj, tiel ravaj ŝiaj frazoj, ke mi ĝuis ĉielan feliĉecon.

Post silento, iom post iom ŝia vizaĝo aliformiĝis, ŝiaj trajtoj ŝajnis al mi bone konitaj; ŝiaj lipoj ekridetis tiamaniere, ke mi pensis, ke ŝi estas vi; ja sendube vi estas ŝi!... Mi rapide stariĝis, alproksimiĝis al vi, kaj dum mi ĉirkaŭpremis vin en miaj brakoj, ĉio malaperis.

La ĉambro estis malluma. La obstina vento pelis la nubojn kaj envia je mia feliĉo, forkovris Lunhelon per la plej malplaĉega el la nigraj nubacoj.

La revo elfiniĝis; mi frotis miajn okulojn kaj mi elvekiĝis. La ĉielo postnubiĝadis; la nuboj puŝitaj de l' vento sin intermetis inter mia feino kaj mi kaj kvazaŭ grimacante, lasis kelkfoje veni ĝis mi tra iliaj randfendoj radiojn el hela lumo; unu el ili, kiu brilis pli o ngtempe ol la aliaj, estis kvazaŭ adiaŭo.

Ĉe la malfantaziema, veriga lumo de elektra lampo, mi priskribis al vi poste la agrablan viziton.

Rigarde al mar''

I

Apud la mar' eterne malkvieta
floras sentmove pomcarbo blanka
kaj persikujo ruĝa, kinj brilas
ĉe l' malkvieta, kvietiga maro.

II

En tag' simila bona Jezukrist'
sur maro paŝis : akvo kaj ĉielo
estis glataj kaj bluaj kiel nun...
Rapide iris la Vizi' renkonte
al ravitaj disciploj sur boato.

III

Serena ĉiel' per ĉarma nuanc'
bluigas la maron ĉe mezo de tag' :
sub pinoj mi estas... Du aĵoj, en par'
vidataj, pliigas la koron je grand' :
verdeco de pin', blueco de mar'.

IV

La vent' liberiĝas :
jen maro — kantanta.
Mar' brava, mar' verda, maro ŝaŭmadanta.
La ondo starigas,
silenta, giganta;
la ŝaŭmo heligas
de l' suno brilanta;
la ondo fendiĝas
kaj falas, sonanta.
Mar' brava, mar' verda, maro ŝaŭmadanta.

1. Joán Maragall dediĉis tiun versaĵon al Víctor Català, kiu por danki sendis al li la glosan, kiun ni kune publikigas. — N. de la R.

V

Unuope, — en dancon virgulinaj —
 gliteniras boatoj al la mar',
 — velo sterniĝas laŭ flugil' al sun' —
 kaj tra vidataj nur de ili vojoj
 malproksimiĝas maren...

Ho bluaĵ mar', ĉiel'! Dezerta bordo
 flava de sun'! Apude, mar' vin kantas,
 dum vi atendas la revenon ravan,
 je sunsubir', de la boat' unua,
 kiu el mar' elnaĝos odorplena.

Katalune verhis JOAN MARAGALL

Rigarde al mar'

(Glosa)

I

Apud de mar' l' eterna malkvieto
 revas eterne sen kviet' poeto
 de l' animo giganta,
 vidante, ke florigas pomarb' blanka
 sian revon je flor' blindiga hele,
 dum li florigas strofon ravan bele.

II

La mar' estas poeto de la kreitar',
 poeto estas mar' en la anim' de homo.
 Tremas de emoci' poeto kaj la mar',
 vidante apud si la ĝermon de la pomo
 fiere flori je
 eterna tentofar'.

III

Libera je regulo kaj mezuro,
 la mar' — poet' giganta de Naturo —
 paradas per radia per beleco,
 jen plena de teruro,
 jen plena de dolĉeco.

Libera je la ritmo kaj la rimo,
 poet' — ne sklavo de malvasta bar' —
 rimon li portas en si mem kaj ritmon,
 kiele blua mar'.

IV

Mar' blua, mar' verda, maro ŝaŭmadanta!
 Kant' via — deliro; koler' — plendo kanta!
 En pac' aŭ ribelo, terur' aŭ kvieto,
 vi ravos ĉiame pomarbon la blankan,
 ĉar vi — la Poeto.
 Poet', observanta apude de l' mar'
 la venon de ŝtormoj, forirojn de bark';
 la koron je granda pliiĝi, sentanta:
 paradu, poeto, per fort' radianta,
 ke ankaŭ vi ravas, ĉar vi — mar' giganta.

Katalune verkis VÍCTOR CATALÁ

Tradukoj de JOSEF GRAU



AGONIO

EL J. MASSÓ TORRENTS

TRADUKO DE S-RO ARTUR TORNÉ

APEROS EN PROKSIMA NUMERO



Mezepoka amo¹

DEVIZO : *De unu ĝis alia poluso, Esperantujo*

Traflugas tra l' aero
la bru' de nova vivo,
de floroj la sezono
alvenas kun fervor'.

Ekfloras el burĝonoj
diverskoloraj floroj,
el nia juna koro
ekfluas granda am'.

Sin vestas per la ĝojo
ĉiel' kaj ter' kaj maro,
animojn replenigas
viviga feliĉec'.

Kaj kun luto ploras
dolore la poeto,
kaj ĉiam fortan senton
li kantas de la kor'.

Fernando la printempan kanton estis fininta, kaj, tra la pala subira ombro, la bela Margareto aperis el granda fenestro de la kastelo.

Li, pro tia vizio, sentis tremetanta la koron, kaj li estus dezireginta tien, kiel aglo, flugi.

Ekfloras el burĝonoj
diverskoloraj floroj,
el nia juna koro
ekfluas granda am'.

La lastaj melodioj de la kanto ankoraŭ vibris tra l'aero, kiam la mallumo elprenis el amanto la vidon de Margareto, kiu, kiel timema turtineto, estis kun la animo plena de teruro pro la timo esti surprizita de sia onklo; kaj ankoraŭ ŝi timis pri la vivo de Fernando.

Ŝi per eta agito de silka vualo la saluton donis al juna poeto, kaj ŝi malrapide reeniris.

Sube tra la malluma valo la eĥo de la rekantaĵoj tariĝis de tempo al tempo pli palaj; kaj

Sin vestas per la ĝojo
ĉiel' kaj ter' kaj maro,
animojn replenigas
viviga feliĉec'.

Ĉirkaŭe la terura silento estas nur trafendata de la kadenca kaj raŭka siblo de ia nokta birdo.

1. Premiita en la V^a Internaciaj Floraj Ludoj.

Margareto estis la lasta ido de povantega baroneco, kiu per politikaj kaj sangaj bataladoj ĉiujn siajn anojn perdis.

Margareto sole restis, kiel lasta stelo de estinta terura potenco.

Ŝi ankaŭ estis pereonta dum la detruo de la patra kastejo, sed ŝia natrustino ŝin ĝusttempe elprenis kaj savis tra multaj danĝeroj, kaj portis ĉe maljuna frato de la patrino, kiu dum la lastaj tagoj de ŝia vivo estis pace lasita de la malamikoj, kiel senutila estantaĵo, kiu post malmulte da tempo devos malaperi.

Sed la bela junulino, perdiante siajn karulojn, vivis tre malfeliĉe.

La maljuna onklo, malafabla kaj farte ne sana, eble nun atingis la premion de la pasintaj krimoj, kiujn tiutempe la leĝoj estimis kaj nobligis.

Li malafable traktis la nevineton kaj sola ŝin lasis dum la tuta tago, kaj neniu sciis kiajn ideojn li havas pri ŝia estonteco.

Ne, tiu ne estis la ĉirkaŭaĵo por Margareto, kies koro nune eliris al la vivo. Ŝi deziregis jam aliajn aferojn. Ŝi sentis en si mem ke ŝi ne povas tiel daŭri. La ploro ŝin konsolis, la ploro estis por ŝi amiko, konfidanto kaj unika plezuro, unika ĝojo de ŝia varma koro, de ŝia naskiganta pasio.

Okazis ke juna poeto gajigis la kastelon per dolĉaj, sentaj kaj amaj kantoj.

Kaj kun liuto ploras
dolore la poeto,
kaj ĉiam fortan senton
li kantas de la kor'.

La melodio, la pasio, per kiuj la junulo sian internon esprimis, la virgan koron de la junulino konfuzis, kaj ŝi dum la nokto ne dormis pro mistera deziro lin vidi ankoraŭ.

Kaj jen, dum la noktaj birdoj peze frapís per la nigraj flagiloj la pintojn de la turoj, ŝi ekaŭdis la akordeojn de la liuto kaj la dolĉan melodion:

Traflugas tra l'aero
la bru' de nova vivo,
de floroj la sezono
alvenas kun fervor'.

Kaj vere ŝi sentis novan kaj fervoran vivon. Precipe nune ŝi ekvidis ke ŝi estas suferanta pro la koro sklava kaj ligata.

Ŝi eksaltis el la lito, sur kiu de post kelkaj horoj ŝi senripoze maldormis; ŝi alproksimiĝis al fenestrego... kaj ĝin malrapide malfermis.

Freŝa, aera ondo portis ĝis tie la pasian kanton:

Ekfloras el burgonoj	Sin vestas per la ĝojo
diverskoloraj floroj,	ĉiel kaj ter' kaj maro,
el nia juna koro	animojn replenis
ekfluas granda am'.	viviga feliĉec'.

Nenion vidis Margareto tra la malluma intermontaĵo, sed la dolĉaj sonoj supreniris... ĉiam dolĉe supreniris kaj tuŝis la animon.

La tagiĝo malrapide maldensigis la mallumon, kaj ankaŭ la kanto de la poeto, pason post paŝo malproksimigante, estingiĝis.

La belulino kun mistera tremo en la koro reeniris; ŝi kuŝigis la lacan korpon, kaj longe kaj dolĉe sonĝis.

*

Ĉiunokte la ama idilo rompis la unuŝtonecon de la ŝoko kaj la du gejunuloj ĝojis.

Margareto post kelkaj noktoj vane atendis, senutile esploris per la okuloj tra la ŝtonegoj de la substanta valego; senutile la konitan kanton ŝi atendis.

Fernando tian vesperon ne venis.

Kio okazis al li? — ŝi pensis.

Ŝia penso vagis por serĉi ian senkulpigon... Sed nenio... Ŝi ankaŭ pensis ĉu li eble dum tiu tempo kantas al la bela kastelmastrino siajn kantojn, sed ŝajnis al ŝi lin ofendi kaj ŝi ruĝiĝis pri tiu dubo.

Margareto tre malkuraĝiĝis, kaj dum tiu nokto dormis. Apenaŭ la tagiĝo en la oriento blankigis la korizonton, ŝi leviĝis el la lito, malsupreniris ĝis la larĝa korto, sidis inter la kolonegoj de la portiko kaj ploris... kaj ploris.

Post ne longe, rapide ŝi leviĝis kaj ŝajnis ke ŝi estas preninta fieran decidon.

Ŝi sin direktis al la pontego kaj estis alvokonta la gardostarantojn kiam:

Kaj kun liuto ploras
dolore la poeto,
kaj ĉiam fortan senton
li kantas de la kor'.

Ho Dio! La melankolia kanto elvenis el subtera galerio, kaj la kanto enhavis doloregan tonon.

Kial? ... Ŝi divenis.

La onklo ĉion malkovris kaj estis jetinta Fernandon en la profundan mal-liberejon, ĉar li estis farinta la krimon ŝin ami.

Kio okazos nun pro tio?

Ŝi revenis en sian ĉambron.

Kion ŝi devas fari?

Kia malfeliĉa vivo! Ne ia amika persono al kiu kontidi siajn dolorojn kaj demandi konsilon... Neniu!...

— Patrino mia, ŝi ekkriis, ha, kial nun mi ne estas kun vi?

*

La sonoro de la trampetoj, kin alvokis la soldataĉojn de la kastelo, la sangon frostigis en la vejnoj de la senespera junulino. Ŝi la kialon komprenis de tiu movo kaj ektimis.

Estis neutilje peni por venki la obstinan koron de la onklo... Lia severeeco estis tiel terura!...

Post malmultaj horoj Fernando estos pendigita el la plej alta turo; malindulga estis la onkla leĝo.

Nur restis al ŝi la senprokrasta iro en malliberejon por lia certigi pri eterna amo. Do, maltimante la koleron de la onklo, ŝi rapide alkuris al la fera pordo, ŝi venkis la malfablecon de la malgentila ulaĉo, kiu ĝin gardis, kaj ŝi eniris en malsekan kaj malluman koridoron.

Ŝi malsupreniris kelkajn malfirmajn ŝtupojn... kaj... mallaŭte ŝi aŭdis:

Kaj kun liuto ploras
dolare la poeto,
kaj ĉiam fortan senton
li kantas de la kor'.

— Fernando!... ŝi ekkriis per ama voĉo.

— Margareto!... li respondis ellevigante el mallarĝa flanko. — Margareto, hodiaŭ pro ci mi devos morti. Sed pro ci estas dolĉa la morto... nur min ĉagrenas la penso ke eble la voĉo de la onklo cin altrudu min forgesi.

— Mia Fernando, interrompis Margareto, mi estas malfeliĉa kaj mi antaŭvidas ke mia vivo estos plena de doloro kaj de senĉesa malfeliĉeco. Mi ĵuras, Fernando mia, je nomo de miaj mortintaj gepatroj, ke neniu mian koron perfortos, ĉar de nun ĝi estos tute cia. La memoro al ci estos por mi balzamo dum la doloroj, kiujn mi atendas; ci sola estos ĉiam la celo de ĉiuj miaj pensoj, ho mia Fernando!...

Plora eksplodo malpermesis daŭrigon kaj, apoginte la fronton sur lia ŝultro, longe ŝi ploris.

La bruo de la armiloj skuis tiajn animojn, kaj li elprenis tufon da siaj blondaj haroj. — Prenu, li diris, jen la garantiaĵo de mia amo, pensu ĉiam kaj ĉiam ke Fernando pro ci, pro la amo mortis...

Kaj kiso estis la sigelo de ilia amo.

*

Malĝoje noktiĝis kaj la korvoj super la turo raŭke blekis, post kiam ili finis la disŝiron de la korpo, kiu de malmulte da horoj tien estis alpendigita.

FRANCESCO PIZZI



VI^a Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- VI. De LITERATURA KAJ LINGVA FAKO DE «CENTRE DE LECTURA» de Reus. — TEMO : *Al la plej bona traduko de la versaĵo Los Nius de D-ro Artur Masriera*, Mestre en Gai Saber. PREMIO : Arta objekto.
- VII. De URBKONSILANTARO DE REUS. — TEMO : *Laŭvola*. PREMIO : Arta objekto.
- VIII. De ILIAJ MOŝTOJ SINJOROJ RAMON VIDIELLA, ANTON BORRELL KAJ MIQUEL ALIMBAU, provincaj deputitoj. — TEMO : *Utileco de Esperanto por la laboristoj*. PREMIO : Artaĵo.

GARANTIA KAPITALO DE K. E. F.

LISTO DE GARANTIANTOJ

Antaŭa sumo : 795 ptoj. — *Limon* (Terrassa), 50 ptoj; S-ro Joan Aulina, 15 ptoj.

Por kompletigi la sumon da 1000 pesetoj por la garantia kapitalo fiksitan de nia lasta Kongreso, mankas 140 ptoj.

La garantia kapitalo estos elspezata nur kiam la propagandaj elspezoj kaŭzus deficiton. Tial anstataŭ tuj pagi la monon, oni subskribas la sumon, kiun oni volas, kaj en okazo de defikito la subskribinto pagus ne la tutan sumon, sed *proportie* laŭ la "mono de li subskribita kaj la defikito pagota.

Ni invitas, do, nian samideanaron alhelpi la perfektan funkcion de nia organizacio, garantiante ĝin per bonvolaj donacotaĵoj.

Esperantistaj gazetoj ricevataj dum la monato

Esperanto (Svisujo), Jan. 1916. — *La Mondo Esperantiste* (Francujo), Dec. 1915. — *The British Esperantist* (Anglujo), Jan. 1916. — *La Holanda Pioniro* (Holando) Dec. 1915. — *Svisa Espero* (Svisujo), Jan. 1916. — *La Babilanto* (Usono) Dec. 1915. — *Japana Esperantisto*, (Japanujo), Nov. 1915. — *Bulletin d'Information Esperantiste* (Francujo), Dec. 1915. — *La Ondo de Esperanto* (Rusujo), Dec. 1915. — *Amerika Esperantisto* (Usono), Dec. 1915.

BIBLIOGRAFIO

El Esperanto como medio práctico de relación entre la Tipografía Internacional.
Conferencia por PEDRO BRUNET.

Nia samideano Brunet, kiu kun admirinda konstanteco kolektis kaj ordigis tipografiaĵojn el multaj nacioj pere de Esperanto, legis en la inaŭguro de ties ekspozicio ĉe *Paco kaj Amo* (Barcelona) la paroladon en kastila lingvo, kiun tiu grupo poste eldonis por disendi senpage. Por la parolado kaj ankaŭ por la ekspozicio ni gratulas nian samideanon S-ro Brunet, kies entuziasmo ja ne bezonas kuraĝigojn.

Vulkanismo kaj la Vulkanaj regionoj de Olot (Katalunlando). JOAN ROSALS
Parolado farita dum la IV Kongreso de K. E. F okazinta en Olot la 1913^{aa}.

Niaj federaciaĵoj bone konas la emon de S-ro Rosals al nia lingvo kaj al geologio. Per la eldono de tiu simpatia broŝuro, nia amiko havigis al si la okazon kunĝui samtempe siajn plej ŝatatajn sciojn, en kio partoprenas ankaŭ la leganto, kiu tralegas tiun paroladon faritan en Olot okaze de nia IV^a Kongreso. Estas bedaŭrinde, ke kelkaj preseraroj enŝoviĝis, kiujn tamen oni tuj povas korekti, ne ĝenante la belecon de la verko. Oni permesu al mi, ke mi rimarkigu la strangan intermikson de geografiaj nomoj en Esperanto kaj kataluna lingvo, ekz. : *Sra Margareto sa-Cot* (p. 6) kaj *Sra Marguerida* (p. 13). Mia opinio oni devas ne esperantigi la lokajn nomojn, montrante tamen per noteto ilian elparoladon. Malgraŭ tiuj makuletoj la verko de S-ro Rosals estas tre leginda.

Documento importante para la Historia.

Sub tia titolo la «Federación Esperantista Levantina» publikigis flagfoŝion, kiu entenas la Alvokon al la Diplomatoj, de D-ro Zamenhof kaj ĝias kastillingvan tradukon. Per tiu eldono la F. E. L. bone helpis la propagandon de nia pacama ideo.

Pri Cervantes kaj lia famhonata verko «El Quijoto». — Eldono de MADRIDA ESPERANTISTA GRUPO. Prezo 1 peseto (0'400 Sm), Madrid, 1915.

Okaze de la jarcenta tria jubileo de Cervantes, estos festata en Hispanujo lia glora verkaro, kies plej hela valoro brilanto estas «La sprita junkro Don Kihoto de la Manĉo». La grupo de Madrid volas porti sian helpon al la soleno honorante siavice la grandan verkiston kaj tiucele ĝi eldonis broŝuron (kiu

entenas krom interesa biografio pri Cervantes verkita de bohema A. Píkhart, kiun tre bone tradukis S-ro Ed. Kuhn, diversajn laŭdajn verkojn de kelkaj kleraj pioniroj, supozante, ke per aĉeto de la ĉarma eldonaĵo multaj samideanoj volos kontribui al la sukceso de tiu homaĝio.

Pri la boneco de la verko ni ne devas paroli, ĉar ni mem partoprenis en ĝia redaktado; pri tio juĝos persone ĉiu. Ni nur konsilos niajn legantojn aĉeti tiun libron, por montri samideanan helpemon al la entrepreno de la esperantistoj el Madrid. Pri la disvendado zorgas la *Barcelona Hejmo de K. E. F.*, kien oni povas sin turni por petoj sendante kune la monon.

Nia Ĉiutaga Pano. Kompilita de W. WILSON TRAINER. Prezo 1 ŝilingo (Ŝm o 500). Vendata de «Internacia Ligo de Laborantoj» 4, York-Street. Glasgow, 1915.

Tiu verko, kies celo estas propagandi vegetarismon, estas eldonita esperante, kvankam oni petis la aŭtoron ke li anĝle eldonu ĝin, por samtempe fari propagandon por Esperanto. Pri la efiko de kelkaj el la montritaj argumentoj favoraj al vegetara vivado ni multe dubas, ĉar ili estas ne sufiĉe iundamentitaj. La stilo de la tuta verko estas ne tre bona, eble tial ke la aŭtoro malmulte sin nutris per legaĵoj el verkaro de bonaj internaciaj verkistoj; krom tio troviĝas kelke de gramatikaj eraroj kaj vortoj ne ĝustasence uzitaj, pri kio certe oni povus zorgi ĉe nova eldono.

Sinjoro Alsanoj en Barcelona (Scenoj el la Barcelona Esperantistaro).—JOHANO POPLÓ. Vilassar de Mar, 1915. Prezo ne montrita.

La aŭtoro de tiu 33-paĝa broŝuro celis priskribi spritan, neĝenan kvankam ŝercan, portreton de multaj el la konataj esperantistoj de Barcelona. Ni devas konfesi, ke nia opinio li bedaŭrinde ne sukcesis; ĉu kaŭze de trorapida observado, ĉu tial, ke li ne posedas observokapablon? Ni sincere ne scias. Multaj eraroj, pro presado kaj stilaj, makulas la verkon, kies aŭtoro konservas sin sub pseŭdonimo. Ni bedaŭras, tial ke tio malebligas, ke li atingu la rekompencon, kiun lia verko meritas. Kiom da energioj foruzitaj!

Gvidfolio de Molins de Rey. Eldonita de la grupo STELANOJ.

Ĝi entenas katalune kaj esperante ĉiujn detalojn pri Molins de Rey kun unu bildo el la vilaĝo. La grupo *Stelanoj* ankaŭ eldonis migrantan karton, kies ekzempleroj vendiĝas po 10 centimoj ĉiu. Por grupoj oni faras rabaton.

Ilustrita Gvidlibreto de la banurbo Rimini. Prof. M. CAROLFI. S. Vito al Tagliamento. 1915. Prezo: Fr. 0,80 (Ŝ. 0,320).

Bele ilustrita, bone verkita, kompleta broŝuro, kiu helpas tre bone diskonigi la famon de Rimini kiel banurbo.

Universala paperujo por ĵurnipapero.

Nia samideano Domingo Talens el Alcoy, paperfabrikanto, fabrikas ĵurnipaperon «Esperanto», kies ujoj ĉin entenas unu lecionon de nia lingvo. Tio povas esti bona propagando.

Civitanoj de la Mondo de YERVANT H. ISKENDER, fondinto. Ĉefoficejo: Tomna-Monachan, Pitlochry, Skotlando.

Porpacifisma pĉedo beĵe eldonita, invitanta aliĝi al la movado, kies nomo titolas la broŝuron.

—En la Festo de la V^a Internaciaj Floraj Ludoj estis disdonata al ĉeestantoj okpaĝa broŝureto, enhavanta la verkon gajnintan la Naturan Floron kaj la originalen katalunan de «La Sunhorloĝo». Post antaŭparolo propaganda oni aldonis katalune gramatikan regularon kun ekzemploj kaj liston de radikoj uzitaj en la traduko, per kio neesperantisto povos kompreni ĝin.

Tiu folio propaganda estas sendata al instruistoj, literaturistoj, k. t. p. senpage. La grupoj, kiuj volas mem fari saman propagandon povos aŭ aĉeti po 5 centimoj ĉiun ekzempleron, aŭ sendi al la *Barcelona Hejmo de K. E. F.* liston de personoj, kiuj povus frukte ricevi la broŝureton.

MALGRAU



ENLANDA MOVADO

BARCELONA. — Post la kristnaskaj kaj novjaraj festoj la kurso de la Universitato rekomenciĝis la 12^{da} de Januaro. Ĝi daŭras de la 7^a ĝis 8^a vespere, lundojn, merkredojn kaj vendredojn.

— *Barcelona Stelo* okazigis sian ĝeneralan kunsidon la 8^a de Januaro. Pritraktinte internajn grupajn aferojn, la kunsidantoj elektis la jenan Komitato:

S-roj Pere Navas, *presidanto*; Artur Doménech, *vicepresidanto*; Josep Guixà, *sekretario*; Palmiro Guilleumot, *vicesekretario*; Joan Iduarte, *kalkulisto*; Josep Beltri, *asisto*; Joan Delclós, *bibliotekisto*; Francisco Alfonso, Joan Coca, Joan Gili, Josep Grau, Pere Llitasas, Manuel Sorolla, *membroj*.

— La 9^a de Januaro *Esperanto* kaj *Patrujo* elskurso vizitis la novan konstruaĵon Hospitalo de Sant Pau; ĉeestis ankaŭ multaj gegrupanoj de *Paco* kaj *Amo* kaj *Barcelona Stelo*.

BANYOLES. — Entuziasma samideano, S-ro Johano Bosch, mortis dudekkvinjara post longa kruela malsano, reveninte de sia edzigovojaĝo. Al

Via edzino kaj familianoj kaj al karaĵ anoj de *Esperanta Amikaro* ni prezentas nian sinceran kondolecon.

MOLINS DE REI. — Ĉe la grupo *Stelanoj*, nove aliĝinta al la K. E. F., S-ro Canals, prezidanto, klarigas gramatikan kurson, bone daŭrigante la laboron de pastro N. Pomés, fondinto de la grupo. La gegrupanoj, kiuj havas eksterlandan korespondadon, ricevis «migrantan» gazeton, t. e., gazeto, kies artikolojn po una verkis ĉiu ricevinto; el la tuto oni faros presaĵon, kiu estos dissendata al ĉiu verkisto. — *Korespondanto.*

PALMA DE MALLORCA. — Ĉe la grupo *Esperantista Klubo Palma*, S-ro Narciso Bofill klarigas ses klasojn (tri por viroj kaj tri por fraŭlinoj) ĉiusemajne, kiujn ĉeestas ĉirkaŭ tridek gelemantoj. Pro la efika propagando farita de la nomita Grupo lastatempe la nombro da ĝiaj anoj pligrandiĝis; nune ĝi enhavas 80 membrojn.

— En la lasta regiona kunveno de U. E. A. oni elektis S-ron Narciso Bofill delegito kaj S-ron Mariano Jaquotet vicdelegito.

S-ro Bofill dissendis tra la insulo bone verkitaĵn propagandajn foliojn pri la utiloj liverotaj de nia lingvo, kiuj certe alvarbos al nia ideo nombron da personoj.

TARRAGONA. — En la societo *Tarragono Esperanta* oni malfermis novan kurson de Esperanto sub la gvidado de la Oficisto de la Normala Lernejo de Instruistoj S-ro Vidal i Ras. Ĉeestas trideko de gelemantoj.

Tarragono Esperanta kaj *Tarragono Katolika* ope ĉeestis la VI^{ta} Kongreson de K. E. F. en Vilanova, por kio la fervoja kompanio konsentis rabaton. La 17^{ta} de Oktobro, matene ili alvenis al Vilanova, kie T. K. okazigis meson, post kiu ili veturis al Sitges viziti tieajn interesajojn. Je la 11^a ili reestis en Vilanova kaj ĉeestis kongresan kunsidon. Ili vizitis posttagmeze Industrian Lernejon, Muzeon, Plajn Skolojn, Urbodomon kaj Esperantan Ekspozicion. Vespere ili kunmanĝis en intima festeno kun ĉeesto de S-ro Joan Rosals, al kiu estas ŝuldata la starigo de T. E. Oni entuziasme toastis por sukceso de nia lingvo.

La sekvintan tagon la elskursintoj revenis al Tarragona plene de entuziasmo. — *Korespondanto.*

VALLS. — Nia Tarragona korespondanto sciigas nin pri la fondiĝo de *Geinfana Nesto* en la lernejo de nia samideano S-ro Amadeu Martorell. La lernantoj estas 9-10 jaraĵ kaj «viglaĵ kaj kaplabaĵ lerni profunde Esperanton». Komitato konsistas el jenaj samideanetoj: F. Jové, *prezidanto*; Mercè Molet *sekretariino* kaj Joan Serra, *kasiŝto*. Kurso okazas dufoje en semajno kaj dumande oni praktike interparolasas.

Imitinda ekzemplo, tiu de S-ro A. Martorell! Ni lin kore gratulas.

TERRASSA. — Nova Konkurso estas malfermita inter la anoj de *Lumon*, kies temoj estas verki originalaĵon, humoraĵon aŭ tradukon de *esperanta poezio*.

la premioj konsistas el bela pentraĵo sur tolo de nia samideano kaj premilita artisto S-ro J. Bassó, portreto silke teksita de D-ro Zamenhof kaj tragedio «Mazepa de Slovacki».

— La 29^{an} de Decembro mortis post longedaŭra malsano nia samideano S-ro Josep Vinyals, modesta kaj fervora junulo, membro el nia societo. Al lia senkonsola familio niajn plej korajn kondolencojn.

— Nia samideano S-ro Miquel Garriga edziĝis la 1^{an} de januaro kun bela kaj simpatia F-ino Rafela Rius. Gratulojn kaj feliĉojn.

— La 12^{an} de Decembro okazis festo por solenigi la 56^{an} datrevenon de la naskiĝo de la elpensinto de Esperanto; legis poeziojn S-roj Ventura kaj Grané, diris paroladojn S-roj Alavedra, Chaler kaj Solà.

— La 25^{an} de la sama monato ni havis la plezuron saluti en nia grupo S-roon Richeld Kyftenbelt el Holando, kies viziton dankas ĉiuj esperantistoj el nia urbo.

— La grupo *Lumon* aliĝis al la «Katalunlingvo-Tago» okazinta dum la 1^a tago de Januaro.

— La urbkonsilantaro voĉdonis por la grupo *Lumon* subvencion da 100 pesetoj por la nuna jaro.

— Urbkonsilanto S-ro A. Colomer vizitis la 25^{an} de Decembro nian societon.

— La 9^{an} de Januaro okazis la jara kunsido de *Lumon* en kiu oni elektis por la nova jaro la jenan komitaton: S-ro J. Ventura, *prezidanto*; S-ro A. Soldevila, *kasisto*; S-ro J. Girona, *bibliotekisto*; S-roj Ll. Martí, S. Chaler, J. Bassó, *voĉdonantoj* kaj S-ro M. Solà, *sekretario*. Al S-ro V. Alavedra, kiu dum kvin sinsekvaj jaroj tiel lerte kondukis nian societon kaj kiu ne plu deziris reelekton la grupo decidis esprimi la plej korajn dankojn por lia laboro por Esperanto, al kiuj ni aldonas ankaŭ niajn plej varmajn. — *La Korespondanto*.

BILBAO. — Novaj kursoj estis malfermitaj en Januaro, pri kiuj ni parolos en proksimaj numeroj.

SEVILLA. — La ĉi tiea esperantista grupo komencis sian vintran laboron, la 2^{an} de Oktobro.

Danke al la klopodoj de S-ro Trinidad Soriano helpata de la grupsekretario, S-ro Joaquín Machuca, oni klarigas du novajn kursojn laŭ du gradoj; elementa kaj supera.

La kursoj okazas ĉiutage ĉe la «Sevilla Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando», de la 5^a ĝis la 7^a horo.

Ankaŭ nia entuziasma kaj fervora animo F-ino Carmen H. de Santaolalla malfermis specialan kurson por fraŭlinoj kaj ŝi klarigas ĉiutage Esperanton al 26 fraŭlinoj.

Dimanĉon, la 19^{an} de Decembro nia grupo kunsidis oficiale kaj estis elektata la jena estraro por la jaro 1916^a.

Honora Prezidanto, S-ro Casto Vilas García; *Prezidanto*, S-ro Trinidad Soriano Hidalgo; *Honora Viceprezidanto*, S-ro Enrique F. y García de la Villa; *Viceprezidantoj*, S-roj Manuel Sánchez Sánchez, F-ino Emilia Alcaide Munilla;

Ŝekretario, S-ro Joaquín Machuca de los Santos; *Vicŝekretario*, S-ro Marcelo Rufo Rufo; *Kasisto*, S-ro Ignacio Añón Chacón; *Kontrolisto*, S-ro Carlos Martínez Fernández; *Bibliotekisto*, S-ro Rafael Fiol Paredes; *Bibliotekistino*, F-ino Carmen H. de Santaolalla; *Volĉdonantoj*, F-inoj Purificación Pérez, Mercedes Alcaide, María Baturones, Rosa Pérez de Cárdenas, Trinidad Manjón, Angelina Mansilla.

Ankaŭ estas sciinde, ke nia urbestro sinsekve kiel antaŭ kvar jaroj, decidis monhelpi nian esperantan societon, per la sumo da 1500 pesetoj.

Oni vidas do, ke la esperanta movado, tre bone progresas en tiu ĉi urbo. — *La Ŝekretario*, J. Machuca.

VICH. — En la renovigita salono de «Círcol Literari» okazis la 26^{aa} de Decembro la festo propaganda organizita de *Vika Esperantistaro*, kiun ĉeestis multenombra kaj distinginda personaro. Estis tre bone ladataj kelkaj muzikaj verkoj; S-roj Mas kaj Cunill bele kantis, kaj oni legis versaĵon *El rolloge de sol*, katalune kaj esperante. Sinjorino Antonia Bardolet legis bone verkitan paroladeton pri la utileco de Esperanto, kaj fine S-ro Josep Grau disertaciis pri la temo: *Transcendeco de la faktoj. Esperanto, vivanta lingvo*. Ĉiuj partoprenintoj estis varme aplaŭdataj, kaj la festo estis tre efika.

La nova Komitato de *Vika Esperantistaro* estas elektita. Ĝin konsistigas D-ro Josep M.^a Terricabras, *prezidanto*; S-ro A. Toboso, *viceprezidanto*; S-ro Jacinto Comella, *ŝekretario*; S-ro Joan Comill, *viceŝekretario*; Pastro Antoni Ribas, *kasisto*; S-roj Josep Miró kaj Jaume Panadés, *membroj*.

GIRONA. — *Gerona Espero* en ordinara ĝenerala kunveno, la 23^{aa} de januaro, krom la laŭregala renovigo de la Direkta komitato kaj aliaj internaj aferoj, decidis proponi temon kaj premion el 50 ptoj., por la VI^a Floraj Ludoj soĝenigitaj ĉi-tiun jaron en Reus.

Malgraŭ la krizo, kiu invadis la ĝeronajn esperantajn vicojn post la foriro de nia bedaŭrata S-ro Doménech kaj kaŭze de la universala eventuala krizotato, tamen ne mankas fervoruloj, kiuj sendeflanke staras sur la esperanta posteno en nia urbo.

Estas ĉi tie vera espero la ĉiam dikiganta *Studenta Juneco*, kiu konstante varbadas novajn kamaradojn kaj helpantojn. — *La Korespondanto*.

GAZETARO KAJ ESPERANTO. — *El Día Gráfico* (Barcelona) publikigis fotografiaĵojn de la Komitato de la grupo de Sevilla; du fotografiaĵojn de la ekskurso de *Esperanto kaj Patrujo* kaj diversajn sciigojn. *La Unión Ferroviaria* (Barcelona) enhavis sciigojn pri la kursoj de *Fervojista Stelo. Acción Libertaria* (Madrid) aperigis artikolon de nia samideano S-ro Calahorra. *Gazeta de Vick* raportis pri esperantaj festoj. *Tierra y Libertad* (Barcelona) publikigis artikolon propagandan de S-ro Piñol, kaj en Reus la enurbaj ĵurnaloj malfermis esperantan rubrikon okaze de la preparo de niaj kongresoj.

OFTE...

Neesperantisto demandas, fine konvinkigonte kaj preta alvarbiĝi al nia ideo: — Ĉu aperas gazetoj en Esperanto?

Esperantisto: — Jes, multaj.

Neesp.: — Nu, tial Esperanto estas jam grava afero. Ĉu ekzistas enlanda gazeto esperanta?

Esp.: — Jes, sinjoro: KATALUNA ESPERANTISTO. Ĝi aperas ĉiumonate. (Tiam li laŭdas ĝin, k. t. p.).

Kaj multajn fojojn tiu, uzinta kiel finan argumenton la ekzistadon de nia gazeto, *ne subtenas ĝin!*

Se ĉiu membro de ĉiu grupo helpus per abono al nia gazeto la ĝeneralan movadon, tiu ĉi en unu jaro duobligus!

AL LABORO, KARAJ KUNBATALANTOJ!

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO rajtos unufoje dum la jaro publikigi malgrandan anoncon, kiu senpage aperos ankaŭ sur *Amerika Esperantisto*

Deziras korespondadon:

S-ro Narciso Bofill, inĝeniero. str. Sindicato (Ensanche) Palma de Mallorca.

S-ro Joan Iduarte, Borrell, 5, 1^a-2^a: Barcelona.

S-ro Lluís Bover, Mieras (Por Banyoles) Ĝerona.

S-ro H. M. Torrey, P. O. Flint. Mich. Usono.

S-ro F. W. Spencer, Blackloam. B. C. Can. Usono.

S-ro P. At. Kolev, 46. str. Regentska. Sofio (Bulgarujo): Pri kulturado de abeloj, kokoj, kunikloj, k. t. p.

Membroj de la Turista Societo, Hoŭskova 4, Plzen. Bohemujo, Aŭstrio.

S-ro Emil Lelièvre, Bureau des Renseignements, 37 Reg. d'Infant. Troyes. Francujo.

QVADERNS D'ESTVDI

Revista dedicada especialment a Mestres i Professors

Publicació mensual del Consell d'Investigació Pedagògica de la Diputació de Barcelona sota els auspicis de la MANCOMUNITAT DE CATALUNYA

Preus de subscripció anual

Catalunya, València i Mallorca.	4 pessetes
Reste d'Espanya	5 "
Estranger	5 francs

Número solt : 50 cèntims

Se distribuiràn gratuïtament a tots els mestres oficials de Catalunya i a tots els professors de Centres d'Ensenyança sostinguts per la Diputació

U. E. A.

Kio estas U. E. A.? U. E. A. estas la internacia asocio de ĉiuj Esperantistoj kiuj deziras praktike uzi Esperanton. Ĝi celas plifaciligi la rilatojn inter diverslandanoj kaj krei sistemon de servoj por siaj membroj.

Kiun utilon alportas U. E. A.? U. E. A. donas membrokarton, kiu rajtigas je diversaj favoroj. (Legitimacio ĉe poŝtoŝeĝoj, enirigo de bicikloj en fremdajn landojn, rabatoj, k. t. p.). Ĝi sendas al la membroj senpagan Jarlibron kun la adresoj de la pli ol 1000 Delegitoj, de la aliĝintaj esperantistaj grupoj, entreprenoj, hoteloj, kun geografiaj kaj turismaj informoj, k. t. p. En sia regule kontrolita membrolisto U. E. A. havas la plej grandan kaj fidindan adresaron de la Esperantistoj kaj tial ebligas facile rilati kun fremdlandaj samideanoj. La Delegitoj respondas al la informpetoj de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo.

Kiel oni aliĝas? Pagante jaran kotizaĵon de Fr. 2'50, kiel simpla membro aŭ minimume Fr. 5, kiel Subtenanto. La oficiala organo de la Asocio estas la gazeto *Esperanto*; jara abono Fr. 5, por ordinara, kaj Fr. 6'25, por la luksa eldono. La kotizaĵo estas pagebla ĉe la Delegitoj aŭ sendota poŝtmandate al la Centra Oficejo de

Universala Esperanto-Asocio

Rue de la Bourse, 10 : Genève (Svisujo)

KATALUNA ESPERANTISTO

Monata Esperanta Gazeto

JARO VII^a : MARTO 1916

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

== PALLA, 8, PRINCIPAL : BARCELONA ==

Honora Direktoro : FRED. PUJULÀ

<i>Direktoro</i>	JOSEP GRAU
<i>Redakcia sekretario</i>	ESTANISLAU PELLICER
<i>Redaktoroj</i>	ARTUR DOMENECH
	JOSEP VENTURA
<i>Administristo</i>	JOSEP SERRAT
<i>Administracca sekretario</i>	JOAN AMADES

KUNLABORANTOJ

Narcís BOFILL (Palma de Mallorca).—Manuel BORDAS (Barcelona).—D-ro Jacinto BREMIÓN (Barcelona).—D-ro Josep CASANOVAS (Girona).—D-ro Joaquim COLL (Barcelona).—Delfi DALMAU (Bahia Blanca, Rep. Argentina).—Victor O. DE ALLENDE (Bilbao).—Félix DIEZ (Bilbao).—Josep DOMENECH (Reus).—Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú).—Joan GILI (Barcelona).—A. NOVEJARQUE (Valencia).—Pastro Josep PLANAS (Barbarrà del Vallès).—Joan ROSALS (Barcelona).—Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).—Josep ROSELLÓ (Sant Joan, Mallorca).

KORESPONDANTOJ

B. Castell (*Andratx, Mallorca*). — J. Feliu Sureda (*Anglès*). — A. Romagosa (*Arbós del Penadés*). — P. Avellana (*Argelaguer*). — P-tro M. Pamies (*Argentera*). — J. Armengol (*Armentera*). — R. Teixidó (*Badalona*). — J. Aulina (*Banyoles*). — J. Cardona (*Berga*). — F. Rubinat (*Borges Blanques*). — J. Jané (*Calafell*). — F. Barberó (*Flix*). — G. Menéndez (*Gijón*). — A. Mosella (*Igualada*). — B. Nogué (*Mallén*). — J. Albagés (*Manresa*). — P. Domenech (*Martorell*). — R. Riera (*Misras*). — Ll. Santacana (*Molins de Rei*). — J. Vilà (*Olot*). — F. Sagrera (*Palafreuil*). — P-tro Tomàs Alsina (*Prades*). — P. Llopart (*Queralt*). — E. Aguadé (*Reus*). — P. Solanas (*Rubi*). — R. Martorell (*Sabadell*). — E. Presas (*Sant Felip de Guixols*). — J. Rosal (*Sant Joan Les Fonts*). — P. Costa (*Santa Coloma de Farués*). — J. Girona (*Silva del Camp*). — J. Vidal (*Tarragona*). — M. Solà (*Terrassa*). — F. M. Brú (*Tivissa*). — F. Guitart (*Vendrell*). — R-do P. Plana (*Ventalló*). — P-tro Antón Ribas (*Vich*). — A. Robreño (*Vilafranca del Penadés*).

Nia devizo: *Maro estas gutero*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

FAJ DE Baska Esperanta Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Palla, 8, principal : Barcelona

El sperto

PLEJ granda malamiko de espero estas tro alta memestimo. Sirmu vin bone kontraŭ ĝi, karuloj!

Kiom da personoj allonge post sia eniro en nian rondon kvazaŭ eksentis, ke kaŭze de ilia aligo al nia ideo tiu ĉi *baldaŭ* plene venkos! Kiom multaj nur pro tia sento laciĝis kaj flankenlasis laboradon, tiel farigante peza balasto por la ceteraj!

Ne sola, en kia ajn socia rango, eminenteco de samideanoj igos triumfi nian ideon, sed grandeco kaj boneco ĝiaj. Certe, se ĉiuj eminentuloj en la mondo aliĝus al nia movado, venko kronus ĝin. Sed, bedaŭrinde, tia rezultato estas, kvankam nepre certa, neproksima.

Dume, inter ni, esperantistoj, valoras ĉiu persono nur laŭ la plenumita laboro. Nia tasko estas longa: estas pli bone marŝi firme, ol rapide, se rapideco malutilas al fortikeco. Ni ĉiuj, ĉiu el ni, valoras kaj valoros kiel unu, ĝis kiam venko estos kroninta nian klopodon, — nia kaj de niaj posteuloj. Tiam, nur tiam, bone vidiĝos la graveco de nia privata, de ĉiu aparta, laboro en la komuna rondo. Ĝis tiu tempo ni ne povas pretendi eminentecon. Kaj oni — ĉiuj! — sentu en tiu *ni*, unue, kaj ekster, kaj krom ĉio alia, sian propran *mi'*on.

Ne nia nuna paveca parademo, estos ŝatata, kiel valorajo; sed kontraŭe: ju pli en modesteco, en ĝusta memestimo, plenumiĝos nia tasko, des pli multe ĝi meritos ĉies laŭdon.

Ni ne tro alte nin taksu: ni klopodu nin ĝuste koni. Jen nia plej forta ŝildo.

Kaj jen niaj, ankoraŭ, plej fortaj armiloj: *l'espero*, *l'obstino* kaj *la pacienco*.

JOSEF GRAU

Hispana Konfederacio



En la monato Aŭgusto mi rezonis, en ĉi tiu gazeto, la konvenon de kreo de Konfederacio, konforme kun la opinio de S-roj Piñó, Perogordo kaj Pujulá, kaj aldiris ke la unua tasko de Konfederacio estas kavi gazetorganon. Mi ankaŭ proponis, ke KATALUNA ESPERANTISTO estu tia organo.

Profitante mian libertempon, kaj kune kun mia edzino, mi vizitis en Novembro Zaragoza'n, Barcelona'n, Valencia'n kaj Madrid'on, sekve la grupojn tie starigitajn.

En Barcelona mi sciigis, ke la Kongreso de Vilanova i Geltru aklame decidis subteni la tuj starigitan HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO'N; ke KATALUNA ESPERANTISTO akceptis fariĝi eventuale ĝia organo ĝis kiam la konfederacio opinios necesa la publikigon de definitiva organo. En tia okazo KATALUNA ESPERANTISTO refariĝos organo de la K. E. F. kaj ĉi tiu federacio subtenos la gazeton, definitiva organo, laŭ la starigota regularo.

En Valencia mi havis la plezuron saluti S-rojn Piñó, Novejarque, Duyos, Gimenez Loira kaj kelkajn aliajn de la grupo *Antaŭen*. Mi konkludis el ĉio kun ili pritraktita, ke S-ro Gimenez Loira ne plu reaperigos «La Suno Hispana». Ili ĉiuj estas pretaj apogi kaj subteni KATALUNA ESPERANTISTO.¹

En Madrid mi parolis, sed malmulte, kun S-ro Mangada pri la Konfederacio kaj gazeto.

Post la supre cititaj decidoj de la Kongreso de Vilanova restas nur al ĉiuj regionoj, provincoj aŭ grupoj formi la koncernan federacion por starigi la HISPANA KONFEDERACIO'N, ĝian regularon, organizon k. t. p.

Konvenas ke ĉiuj hispanaj esperantistoj konvinkigu, ke ni devas starigi kiel eble plej rapide taŭgan por la propagando organizon kaj rekomenci gravan propagandon, tiel necesan en la nunaj internaciaj cirkonstancoj.

VICTOR O. DE ALLENDE

Vojingenero

1. La listo de abonintoj de *La Suno Hispana* estis liverita al mi. Por tiu amika helpo ni plej kore dankas. (*Nota de la Redakcio.*)

Sopiroj¹Devizo : *Non bis in idem*

Dum multaj per sopiro
kvieton trovas,
al mi sopiroj plu
ĉagrenon donas;
mi ne komprenas:
vivigo por l' aliaj
mort' por mi estas.

Feliĉa l' olven' via,
ho hirundetoj!
printempon ĝi anoncas...
al vi bonvenon!
Tamen por ĉiam
de longe la printempon
mi perdis, mian.

La kant' de suferanto
estas sopiro
vaganta tra l' aero,
tra l' infinito...
multaj kuniĝas,
kaj tiam la ventegoj
blekas timigaj.

Mi kredis min, trafinta
fine la celon *
mortigi mian amon,
ho, naiveco!
Kiel fenikso,
ĝi renaskiĝas forta
el siaj cindroj.

Ke mi devas ja fini
mian ĉagrenon,
neniu ĉar eterne
daŭras sufero?

Unu ekzistas:
en mondo sen patrino
resti por ĉiam!

Patro diris, feliĉon
mian zorganta:
vi lernu, vi kleriĝu,
fariĝu saĝa...
patrino mia,
kisante min, nur diris:
fil', estu virta!

La floroj ornamantaj
vian fenestron
ĉiumatene montras
fluidajn perlojn;
de l' koro mia
la larmoj estas ili...
plor' rosiĝinta.

De velboat' mi vidis
dum longaj horoj
l' iradon malrapidan
en horizonton...
de l' perfid' via
samiras la memoro,
sammalrapidas!

Mi vidis grandan fajron
brile brulantan
kaj cindron nur produktis
la brilo fajra...
tiel de l' vivo
plej brila, post la morto
restas nur cindroj.

ARTUR DOMENECH

1. Premiita en la V^a Internaciaj Floraj Ludoj.

Agonio¹

DEVIZO : *Estas tradukado plej bona ektercado*

Mi, en miaj tempoj de knabo, konis kuraciston, kiu ĉion sanigis. Neniam li lasis iun malsanulon mortiĝi. Se li nun estus tie-ĉi, malfeliĉa Karmeno! Ja ŝi eliĝus el ĉi-tiu. Sed nun, ho, ve! li mortis : estas al li nepove porti konsolon al familioj, kiel li kutimis. Se vi estus lin vidintaj kontraŭ malsanulo, je kia ajn malsano, li ja ne multe hezitis! Li lokis sin apud la kapejo de la lito kaj kun fingro sur la pensilo, pensade kaj medite, trasertis tie kaj apude interne de la frunto la tutan sciencon, kaj post ne multe, li eltiris longan kraĵonon el la poŝo kaj vi estus vidintaj, kiel li skribas rapide... rapide...

— Je multo li devis scii!

— Pri ĉio li sciis. Tamen, kiom li havis da skribo, mankis al li da parolo. Li estis senvorta kiel mia mulino mortinta ĉe Pasko, kiu faris, faradis, kaj nenion diradis. Kaj, do, li, skribe kaj skribe, sed tiamaniere, ke vi, filo Giu, ĉeestinta lernejon, estus kompreninta eĉ ne guton, ĉar ĉia skribitaĵo de lia mano, *tras tras*, kvazaŭ senatente, estis farita por esti legebla nur de la apotekisto kaj de neniu alia. Ĉu vi komprenis?

— Nu! nenion mi diris!

— Do, kiam la receptaĵo estis veninta en la domon, ja ĝi estis kiel oleo en lampon : la malsanulo saniĝis. Sed li, pri kio estis pli sperta, estis por la kuracado de la kapmalsanoj.

— Ĉu eble ĥemikranio?

— Nu! fi! Ĉiam vi estos sama, abismiganto de muloj! Mi volas diri tiujn suferantajn malsanon de malsaĝo, kiajn ni ĉiuj konis : la frenezuloj, fine! Li prenis la malfeliĉulon, kiu suferas ekkolerojn aŭ lunfazojn, kio por la okazo estas same, eĉ se li estis el tiuj prenitaj de tia speco de manioj, kiujn oni ne povas teni hejme; prenis lin, mi diras, metis lin, forte premante lian kapon, inter siajn genuojn, elpoŝigis tranĉilojn kaj tondilojn, kaj vi estus vidintaj, kiel li levas la kapŝelon, mallonge serĉas kiel en poŝo interne, refermas, kun-

1. Premiita en la V^o Internaciaj Floraj Ludoj.

kudras la haŭton; bandaĝojn, ŝmiraĵojn kaj ĉarpiojn, ok tagojn en lito, kaj al kampolaboro sanigite por ĉiam plu en la vivo.

Ĉiuj kvar transportistoj alproksimiĝadis unu la alian, kvazaŭ por komuniki al si varmon. La lanterno pendanta de la plafono donis malklaran lumon, plenigante la grandan ĉevalejon per strangaj ombroj. Sur la tablo, la ludkartaro, ne tuŝita ankoraŭ, kaj ĉirkaŭe restis la viroj envolvitaj en siaj manteloj, spite la varmelspiro de la stalo. Ekstere neĝis kaj la malvarmo ŝajnis filtriĝi tra la muroj. La kvar viroj ne trovis plezuron, tiun nokton, restante silentaj kaj kuŝantaj, kaj parolis, paroladis, kvazaŭ volante mortigi plej rapide horojn tro longedaŭrajn. La filino de la gastejmastro elfiniĝadis; kaj se la viroj hazarde silentis momenton, ili pli rimarkis la bruojn de la bestaro, la hufobatojn, aŭ la ies ĉevalan maĉadon: instinkte ili aŭskultis kun atento kaj ŝajnis, ke ili aŭdas la molan falon de la neĝeroj ekstere kaj super, ĉe la domo, la iron kaj revenon de paŝoj, kaj streĉante aŭskulton iu eĉ atingis aŭdi la daŭran kaj angoran spiregon de tiu, kiu antaŭ kelke da semajnoj, estis belkreska fraŭlino kaj nun per unu sola fadeno alkroĉas sin al la vivo.

Dum la momentoj de silento pli ol unu rigardis al la pordo, atendante la aperon de la gastejmastro, subite, post minuto, dironta, ne preterpasinte la sojlon, ke ĉio estas finita.

Tial ĉiuj klopodis, ke la silentoj estu tre mallongaj kaj reprenis konversacion; sed nur venis al ilia penso aferoj pri malsanoj kaj malfeliĉoj.

— Kaj kiel okazis, ke mortis tiu fama kuracisto?

— Tute certe mi ja ne bone scias, ĉar mi, pro aferoj kies sciigo ne interesas vin, ne plu vojaĝis tra tiu regiono. Tamen mi estas certa, ke li estis suferonta tian samspecan malsanon, kian li kuracis. Memorigas al mi bone, ke iun tagon, irante de Amer al Sankta Pau (pri kio mi estis aŭdinta diri, sed mi ne kredis) mi estis alestanta al plej stranga afero el tiuj de mi iam viditaj. Mi iris, do, kiel, mi diras, de Amer al Sankta Pau kaj la nokto estis ne pli bona ol tiu-ĉi; en farmdomo de Ansjes mi estis kontraktinta kelkajn porkidojn kaj du sakojn da terpomoj (mi rememoras kiel nunan okazon, kvankam forpasis jam fasko da jaroj) kaj kiam mi penetris kun miaj muloj en la arbaron, ekvidiĝas al mi la normanda ĉevalino de la kuracisto, alligita al kork-arbo, pro kies karakteriza aspekto, mi facile divenis ŝin; tia ŝi restis en mia memoro, ke mi estus ŝin koninta eĉ meze de la foiro de Sankta Mikaelo. Mi haltas, mi proksimiĝas kaj mi vidas antaŭ mi la kuraciston, kiu rejetas sin sur teron kaj splitigas sian kapon kontraŭ la kverkoj, tiele ke li aspektas spiritposedite. Mi, vi-

dante viron tiel scian en tia ago, sentis ian ĉagrenon... Sed ankoraŭ mi kuragiĝis diri al li. — Kion diable, vi faras tie-ĉi, sinjoro kuracisto? Ĉu vi ne vidas, ke vi fendos al vi la kapon? — Kaj li tiam subite ĉesis fari strangaĵojn, rigardis min per malgajaj okuloj, kaŭzantaj respekteton tiel, ke mi mem, tiam juna kaj fraŭlo, sentis ektimon; ŝajnis al mi, ke li ne bone rigardas min, ĉar mi estas lin malhelpinta de tasko al li plaĉa kaj kvazaŭ mi ankoraŭ aŭdas lin, — *Ha! Bielo'* — li diris. — Se tiel same, kiel mi malfermas tiujn de la aliaj, mi povus malfermi la mian, la kapon, por scii, kio estas en ĝia interno tiom min suferiganta!

La maljunulo silentis momenton, ĝis kiam ekdiris *Leporo*, maturaĝa transportisto.

— Nu! *Bielo'*! Vi estas ja sperta homo; sed malmulton mi kredas el tio, kion vi diris. Mi ne ŝatas la kuracistojn. Jen! Certe pli ol paro el ili supreniris viziti Karmenon. Mi estimas pli la *saladiston*¹ kiu loĝas en Ĝirona, por kiu estas nenio nedivenebla, kaj kiu faris tiajn kuracojn... tondr'!... ke la kuracistoj, ĉiuj staras al li sub la ŝuoplando.

— Kviete, kviete, *Leporo*! Ĉiam vi estos pli besta ol tiuj, kiujn vi kondukas. Ne estas ĝustahoro por frapi la tablon kaj brui.

— Do, laŭte aŭ mallaŭte, mi diras ke mi ne alkonsentas; kaj se mi tion diras, mi jam scias la kialon, — diris *Leporo* kun mieno obstina. — Ankaŭ ĉe min mi venigis kuracistojn, kaj neniam mi vidis ilin certaj pri farotaĵo: tial oni nomas ilin *dubtoroj*, ĉar ili ĉiam dubas.

— Vi estas ja malsaĝulo! Ha, prave. Mi jam aŭdis diri pri tio. Ĉu ne estas la kuracisto de Castellfullit, kiu mangiĝis al vi paperon?

— Tutvere, nu! Al ĉiu povus okazi simile. Li diris — mia edzino ankaŭ alestis — ke li receptos al mi papegetojn. Kaj nu! Kion mi devis fari? Kiam ili alvenis el la apoteko, mia edzino donas ilin al mi kaj mi ilin mangas. Ĉu ne estas dirite, ke oni devas fari ĉion ordonitan? Sed, estas dirinde: malgraŭ ke ili estis bone falditaj, diable! kiel malfacile estis engluti ilin! Bonŝance, ke mia edzino donadis al mi buljonon, kaj kun peno ili povis malsupreniri ĝis la ventro. La alian tagon venis la kuracisto, kaj kiam mi plendis, ke lia medikamento ne estas facile englutebla, li ekridas kaj ridadas, kaj zorgis diskonigi tion tra la ĉuta vilaĝo, mi ĝin scias! Nu, do, kion mi devis fari? De tiam mi volas servodungi nenium alian kuraciston.

1. Tiel estas nomataj en Katalunlando la supertiĉaj resanigistoj.

— Eĉ por via edzino, ankaŭ ne? Kaj kiel fartas via edzino, *Leporo*? Kiel iras ŝia okulmalsano? — Ja estas tre malbela, efektive, via edzino!

— Ĉiam pusigas al ŝi la okuloj, precipe la maldekstra, tiele ke mi diras, ke eble putriĝas al ŝi io interne la kapon, kaj ŝi ankoraŭ pli koleras.

— Kiel malsaĝa vi ja estas!

— Jen, nul ne tiom, kiel multaj aliaj! Vi ja ripetas tro ofte tion, *Bielo*!. Mi povas certigi al vi, ke se mia edzino mortus, Dio aŭ la diablo ŝin forportus, ne tiom mi ĉagreniĝus, kiel la gastejmastro pro sia filino. Mi juras, ke mi ne estus tiel malsprita!

La aliaj ridis kaj silentigis *Leporon*, tial ke ne estis komparinda lia edzino, tiel malbela, al Karmeno, tiel juna, agrabla kaj bela.

Malfermiĝis la pordo de la strato kaj, samtempe kun malvarma blovo, eniris belaspekta fraŭlo, kiu tute serioze skuis la neĝon el la mantelo kaj el la *baretano*,¹ kaj kun bruego de galoŝoj alproksimiĝis al la transportistoj, demandante:

— Kiel ŝi fartas?

— Ve! Malbone. Afero je kelkaj horoj, ŝajne. Oni jam diris al mi la alian fojon, ke vi estimas Karmenon. Kaj certe, laŭ tio, kion mi ekdivenis, ŝi ankaŭ portis al vi estimon.

— Portis, vi jam bone diras!

Kaj la fraŭlo restis muta kaj serioza, apogante sin per kubuto sur rando de la tablo.

Leporo rompis la silenton.

— Kia nokto! Nek por lupoj!

— Ĉu lupoj, vi diris? Eble vi estas vidinta neniun, vi, kiu parolas.

— Neniam mi estas renkontinta lupon, sed hieraŭ mi renkontis serpenton, kiu min ektimigis. Mi troviĝis ne tre malproksime de la arbaro de *kan Tej*, kiam subite ĝi prezentigis, tiom granda, kia ĝi estas, dika kiel femuro. Mi estis fraponta al ĝi vergobaton, sed...

Unu, kiu ankoraŭ ne estis malferminta la buŝon, diris:

— Se tiom dika ĝi estis, ne povas esti alia, krom tiu de la flava lilio. Ĉu ĝi ne havis flavlilion tie sur la kapo?

La gastejestro persone prezentigis ĉe la sojlo de la interna pordo. Tio estis la vizio, kies aperon la viroj atendis de unu al alia momento. Ne moviĝante de la pordokadro, li diris:

— Ĉio estas finita!

1. Tipo kataluna ĉapo.

Eĉ atente aŭskultante oni ne aŭdis la stertoron de la agoniantino. Ekstere neĝis pli kaj pli intense, kun obstina konstanteco; la neĝo amasiĝis en la stratoj, ŝajne ŝvelantaj, kvazaŭ ili volus enmurigi la antikvan gastejon, kie ĵus finiĝis tiu fraŭlino freŝa kaj gaja, kiu logis ĉiun vojiranton.

La kvar transportistoj stariĝis, kaj la junulo, serioza kaj ĉagre-nita, sen eĉ vorto sur la lipoj, kondensante la tutan animon en geston, demetis la *baratenon* kaj reĵetis ĝin teren.

Katalune verkis JAUME MASSÓ TORRENTS

Tradukis ARTUR TORNÉ TURULL



La esperantistaro funebras:

Harold Bolingbroke Mudie

la prezidanto de la *Brita Esperanta Asocio* kaj de U. E. A., membro de la *Lingva Komitato*, ĉefa organizinto de la III^a Universala Kongreso de Esperanto en Cambridge, eldoninto de la unua brita esperanta gazeto, eminenta samideano, altvalora kaj entuziasma pioniro, mortis pro aŭtomobila akcidento en Francujo, la 6^{an} Januaro 1916^a.

Al liaj gepatroj kaj al la *Brita Esperanta Asocio* ni prezentas nian sinceran kondolencon

Niaj nunjaraj kongresoj

VII^a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio

I^a Kongreso de Hispana Esperantista Konfederacio

Reus : 11, 12, 13 Junio 1916

A Organiza Komitato ricevis diversajn demandojn, rilate la Kongresojn, kiuj montras ke la VII^a Kongreso de nia Federacio atingos sukceson kompareblan al tiu de la antaŭaj, kaj ke la I^a Kongreso de la Konfederacio montros, ke tiu ĉi bone kapablas preni sur sin la taskon starigi en Hispanujo nian karan lingvon.

Por ĉeesti la Kongresojn oni bezonas nur fariĝi membro de la HISPANA KONFEDERACIO, aliĝante al la Federacioj, kiuj ĝin konsistigas. La koncerna membrokarto rajtigas la ĉeeston kaj partoprenon en la kongresaj solenoj. Ankaŭ la abono al KATALUNA ESPERANTISTO, kiu donas la rajton de K.E.F.-ano, sufiĉas por rajtigi senpagan ĉeeston en la Kongresoj.

Por faciligi veturadon al Reus la O. K. petis de ĉiuj hispanaj fervojoj rabaton por la kongresanoj, kies buĝeto malpliĝos per tio. Kiam la rabato estos firme konsentita, la O. K. sendos al ĉiuj hispanaj grupoj, kaj ankaŭ al izolitaj samideanoj, kiuj tion petos, la cirkuleron per kies helpo ĉiu povos antaŭkalkuli siajn elspezojn por partopreni en la Kongresoj.

Sciigoj el multaj urboj garantias la alveturon de multe da personoj: ĉefe en la urbo de nia lasta kongreso eĉ multaj neesperantistoj deziras ĉeesti tiun en Reus allogite de la beleco de la kongreso en Vilanova. Ankaŭ el Zaragoza, en la sidejo de kies grupo, *Fratego*, S-ro Maynar faris paroladon pri la de li vizititaj kongresoj de K. E. F., certe venos al la I^a Kongreso de la HISPANA KONFEDERACIO granda nombro de samideanoj.

Ni insiste petas ĉiun personon dezirantan partopreni la kongresajn festojn, sentime turni sin al la O. K. kun la koncernaj demandoj necesaj por efektivigi la deziron. Estos plezure por la membroj de la O. K. respondi ilin.

Estas necese por la bono de nia ideo, ke niaj nunjaraj kongresoj atingu helan sukceson. Samideanoj, helpu al ĝi!

VIⁿⁱ Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- IX. De PROVINCA DEPUTITARO DE TARRAGONA. — TEMO : *Laŭvola*. PREMIO : Artaĵo.
- X. De ESPERANTISTA GRUPO «GERONA ESPERO», de Girona. — TEMO : *Al la plej bona traduko de la klasika tre konata Madrigal de Gutierre de Cetina*. PREMIO : 50 pesetoj (20 Sm).
- XI. De MILITA KOMANDANTEJO DE REUS-DISTRIKTO. — TEMO : *Laŭvola*. PREMIO : Arta objekto.
- XII. De LIA EKSCLENCIA MOŝTO SINJORO ENRIC PRAT DE LA RIBA, prezidanto de «Mankomuneco de Katalunujos». — TEMO : *Laŭvola*. PREMIO : Unu ekzemplero de la Jarlibro de «Institut d'Estudis Catalans».
- XIII. De KONSTITUCIA URBESTRARO DE TARRAGONA. — TEMO : *Laŭvola*. PREMIO : Artaĵo.
- XIV. De ESPERANTA TARRAGONPROVINCA LIGO. — TEMO : *Originala versuo povanta taŭgi kiel devizo de la E. T. P. L.* PREMIO : Titolo de Honora Membro de la Ligo.
- XV. De KATALUNA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ. — Eldono kune kun la traduko de la verko atinginta la premion de la unua eksterordinara temo. La laŭreato ricevos 50 ekzemplerojn el la eldonaĵo.



EN PROKSIMA NUMERO:

EN MAJA TAGO

EL VÍCTOR BALAGUER

TRADUKO DE MARIAN SOLÀ

PREMIITA EN LA VI^a INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



Miniaturo romantika¹

DEVIZO : *Kiel etendita para vosto*

Mi rikoltis por vi, ho amatino, la plej delikatajn el la floroj, kiuj per sia parfumo rave odorigis la verdan kamparon. Mi kunligis por vi milde freŝajn violejn kun blankaj le-
kantoj, kaj aldonis la herbojn odorajn, kiujn naskas la fluo de akvo. Kaj resonis en tiu bukedo la ĉarma amkanto de la najtingaloj, harmonia murmuro de arbaroj kaj belsona bruetado de fontoj. Kaj ĉiu floro iluzion entenis, peto estis en ĉiu aromo kaj en la tuto, amo mia. Mi proponis al vi la bukedon, kaj malŝate vi ĝin malakceptis per gesto de ofendita reĝino.

Kompaton, amatino!

Donaco mia ne havas la ĉarmon de palpebruma brilado de steloj; mankas al ĝi la grizbluo de l' monto, kiun luno arĝentas, la ora flavo de suno somera kaj la impona sonado de l' akvo de rivero falanta en abismon. Sed ja ĝi entenas sincerecon de koro amanta, naivecon de miaj sopiroj kaj fajron de virga pasio.

Animon de junulo.

Ĉu vi rifuzos ĝin ankoraŭ? Kion vi volas, ke mi oferu por atingi la favoron de via ĉarma rideto? Ĉu vi postulas grandan trezoron ŝanĝedononte vian amon?

Kaj vi diris per vōĉo gracia : Gloron vi devas alporti!

Ĉu vi memoras, ho amatega, la helan tagon de tiu respondo? Vi konstatis jam nun, ke la Gloro konsistas por mi el nur via amo? — Kisis la Poeto sur la lipoj de l'edzino, loge similaj al ruĝaj diantoĵ printempaj, kaj, responde, ŝia buŝo de diino jeson eldiris.

Kaj super ili, — Gloro de Amo — floris hela rozkrono.

MIQUEL DE SA COT

1. Unua mencio en la V^a Internaciaj Floraj Ludoj.

ENLANDA MOVADO

«HISPANA SOCIETO P. P. ESPERANTON. — Lasta cirkulero — Solviĝo de la Societo. Karaj kunsocietanoj:

Senutile ni atendis favorajn respondojn al nia lasta Cirkulero. Tio estas: respondojn, kiuj enhavus nomaron de kleraj samideanoj, kiuj entuziasme aŭ almenaŭ bonvole premus sur sin la taskon direkti nin.

La plej granda parto de tiuj respondoj voĉdonas kiel antaŭe: ke «Hispana Societo» pro neniu motivo mortu; ke ĝi loĝu en Madrido, kaj tiel plu; sed neniu proponas nomojn de personoj, kiuj akceptos postenojn en nia Centra Komitato. Nur du respondoj opinias, ke ni devas helpi la Konfederacion.

Ni jam diris en la lasta paragrafo de nia antaŭa Cirkulero, ke se ni ne ricevus kandidataron por la nova Centra Komitato ni ĉesus funkcii. Ni jam tion faras. Sed anstataŭ demandi kion ni faros kaj kie ni sendos nian tutan havajon, ni konsultis nian Regularon, kaj tin ĉi ordonas per ĝia artikolo 14^a kion ni devas fari; tio estas: elspezi la restantan monon en propagando de Esperanto.

Do, en la lasta kunsido de nia Centra Komitato, kiu okazis la 5^a de la nuna monato ni decidis: Solviĝo de la Centra Komitato. Fordoni al nia loka Sevilla Esperantista Grupo ĉiujn niajn paperojn, librojn, broŝurojn kaj arĥivon, por tio, ke ĝi bonvole ilin gardi. Resendi la kotizaĵojn al ĉiuj el niaj kunsocietanoj kiuj jam pagis tiun de 1916^a. Pagi la poŝtelspezojn de la antaŭa monato, tiun de la nuna cirkulero, kaj elspezi la reston en ĝenerala propagando de Esperanto, laŭ opinio de nia Esperantista Grupo.

Fakte nia HISPANA SOCIETO p. p. ESPERANTON mortis.

Se ĝi estas neevitebla bezono por nia nacia esperantista vivo, ĝi iam reviviĝos. Tiukaze ĝi nur profunde dormas.

Kun bedaŭro ni ĉiujn niajn fidelulojn samideane salutas.

Sevilla la 10^a de Februaro 1916^a. — La Eksprezidanto, *Trinidad Soriano*. La Ekssekretario, *Carlos Martínez*.

Niaj amikoj bonvolu relegi la lastajn paragrafojn de la artikolo pri la *Hispana Esperantista Konfederacio* aperinta en la lasta numero de KATALUNA ESPERANTISTO. Oni relegu ankaŭ la opinion de S-ro Inglada, kiun ni publikigis en nia lasta antaŭkongresa numero, kiun ni rekopias:

«Se Hispana Societo devus dissolviĝi kaj post ĝi naskiĝus tre vivoplena Federacio aŭ alie nomita societo, ĉu tio ne estus granda progreso kaj kaŭzo nur de ĝojo? — Ĉu ni ne devas interkonsenti nur pro la nomo de la aferoj, ne pro ilia fundamenta esenco? Kia kontraŭaĵo starus se la celon de la Hispana Societo plenumus pli sukcese alia kun malsama nomo anaro? Ĉu per la nova organizaĵo ni certigas nedisputeblan sukceson de la esperantista movado en nia pa-

trujo? Ni devas, do, senŝanceliĝe akcepti kaj iri antaŭen, ĉar restado estas morto kaj progresado, vivo.

Restado estas morto! Donsaĝe, ke una fojon ankoraŭ tiu frazo plipravigis.

Al vi, membroj de *Hispana Societo*, kiaj voĉdonis ke ĝi «pro nenia motive mortu», ni volus vidigi klare nian puran entuziasmon; ni volus pruvi, kiel multe ni konsentas kun la laste citita frazo de S-ro Inglađa, kaj kiel, sekve, ni klopodas kaŭze de tiu entuziasmo, ke restado nin ne mortigu. Ni volus nur sukcesi vekti viajn sciivolemulojn kaj venigi vin al ni, rigardi, kiaj ni estas.

Kaj ni estas certaj, ke kiam vi ĉiuj nin ĉiujn estus konintaj, vi ŝanĝus vian opinion kaj se ĵus nur du respondoj opinias, ke ni devas helpi la Konfederacion, tiam certe ĉiuj restantaj membroj sensuspekto aligus sin al la opinioj de tiuj du personoj, kiuj praktike akceptis senŝanceliĝe kaj iris antaŭen, gviditaj de tiu entuziasma kaj laborema samideano, kiu spite siaj multaj klopodoj liveritaj al H. S. senpartie konstatas la faktojn kaj trovas ankoraŭ kuraĝon nuligi sian ĉagrenon pro sensukceso, kunlaborante al la tasko starigi la Konfederacion.

Samideanoj, pripeusu bone! Ĉu ne estas same kunligi vin sub unu aŭ alia nomo, se nur tiu respondas al pura sento de Esperantismo? Vi marŝu, do! Ne restu senmove! *Restado estas morto!*

Senlaciĝe antaŭen sub la standardo de HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO!

— Por komplezi la peton de multaj samideanoj ni publikigas la adreson de nia kara pioniro S-ro Fred. Pujolá, kiu per ĉi tiuj linioj esprimas sian koran dankon al la multaj personoj, kiuj atestis al li sian simpatian.

Adreso : 305^e Régiment d'Infanterie, 24^e Compagnie, Secteur Postal 58, Francujo.

Certe oni aŭdos kun plezuro la sciigon, ke nia samideano S-ro Josep Mattes, kiu de tiom da jaroj loĝis ĉe ni, pri kiu oni sciis nenion de tuj post la komenco de la milito, estas militkaptito en Germanujo. Unu el liaj kunuloj, reveninta en Francujon kaŭze de la interŝanĝo de nemilitaŭgaj soldatoj, alportis kun si fotografajon de militkaptitoj, en kiue stas bone videbla la bildo de S-ro Mattes.

Ni multe ĝojas, ke la supozoj, ke li mortis, montriĝis eraraj.

BARCELONA. — Ĉe la Homeopatia Kuracista Akademio S-ro Josep Grau malfermis, laŭ peto de la Societo, la 7^{ma} de Februaro kurson de Esperanto por la kuracistoj, el kiuj 8 ĉeestas la klasojn, kiuj okazas lunde kaj ĵaŭde de la 10^a ĝis 11^a vespere.

— En la lasta ĝenerala kunveno de *Esperanto kaj Patrujo*, oni elektis la jenan komitaton. *Prezidanto*, S-ro J. Blanch; *Vic-Prezidanto*, F-ino E. Fontanillas; *Sekretario*, S-ro F. Freixas; *Vic-Sekretario*, S-ro E. Costa; *Kasisto*, S-ro M. Rodriguez Cabós; *Kalkulisto*, S-ro J. Saborit; *Bibliotekisto*, S-ro J. Casanovas; *Voĉdonantoj*, S-ro H. Roig kaj F-ino R. Berdemás.

En la sama kunveno oni elektis por la *Propaganda kaj ekshursa Fako*,

S-ro J. Blanch, *Prezidanto*; S-ro M. Rodríguez Cabós, *Sekretario*; F-ino E. Fontanillas, *Kasistino*; F-inoj R. Berdemás, M. Costa, J. Costa kaj S-ro J. Romagosa *Volondantoj*.

Tiu Societo la 23^{an} de Januaro, vizitis la presejon de «El Día Gráfico», la vizito estis tre sukcesa ĉar partoprenis en ĝi pli ol 70 geĉeestantoj; la ĵurnalo publikigis fotografajon de la vizitintoj.

— La 23^{an} de Februaro *Nova Sento* en sia nova sidejo, str. Enna 156, malfermis kurson, kiun ĝi reklamis sukcese per afiŝoj.

La nova komitato de la grupo konsistas el sinjoroj: *Prezidanto*, J. Canales; *Vic-prezidanto*, J. Gaya; *Sekretario*, E. Güll; *Vic-sekretario*, J. Poch; *Kasisto*, V. Armengol; *Kalkulisto*, E. Masagüé; *Monkolektanto*, F. Mesa.

— La denove starigita grupo *Libero*, kies sidejo troviĝas ĉe la Laborista Societo, str. Mercadèrs, 25, aliĝis al la K. E. F. Nian saluton al la nova kumbatalanto!

MOLINS DE REI. — La 24^{an} de Januaro okazis la jara ĝenerala kunsido de *Stelanoj*; la kunsidantoj elektis la jenan komitaton por la jaro 1916^a: *Honora Prezidanto*, J. Pastro N. Pomès; *Prezidanto*, Antoni Canals; *Sekretario*, Enric Madorrell; *Kasisto*, Lluís Santacana; *Bibliotekisto*, Francisco Vilagut. — *Korespondanto*.

TERRASSA. — La 23^{an} de Januaro oni festis en la grupo la disdonon de premioj de la konkurso laste okazinta; post la legado de la sekretaria raporto ricevis premiojn S-roj Alavedra, Solà kaj Chaler; subpremiojn S-roj Martí, Casanovas kaj Girona.

— La 6^{an} de Februaro la grupo *Lumon* dediĉis feston honore al ĝlora poeto Joan Maragall; la sidejo de la grupo estis malvasta por enteni ĉiujn niajn samideanojn; en ĝi partoprenis per legado de poezioj kaj prozaĵoj de la senmorta poeto, niaj fervoraj esperantistoj F-inoj Cantarell, Sicart kaj Viver kaj samideanoj S-roj Alavedra, Grané, Girona, Martí, Figueras, Chaler, Casanovas, Ventura, kaj Solà; post ĝia fine urbkonsilanto S-ro Colomer parolis laŭde al Maragall kaj al Esperanto.

— La 20^{an} de Februaro antaŭ la grupanoj de *Lumon* S-ro Josep Grau faris en Esperanto prelegon pri Radioj X, kun koloraj desegnaĵoj ilustrintaj ĵian disertacion. — *La Korespondanto*.

ZARAGOZA. — Grandsukcese daŭras la monataj paroladoj en la esperantista klubo. La 6^{an} de februaro S-ro E. Redondo, staba kapitano, instruis kaj amuzis la multenombrian ĉeestantaron parolante pri la deveno de la kvinpinta stelo kaj ĝia similo kun la larĝo-manikaj magiistoj, starantaj kun la piedoj dismetitaj kaj kun la pinta ĉapelo celanta ĉielen (magio blanka), kaj la kapra kapo kies kornoj kaj oreloj estas kvar pintoj dum la barbo, kiel kvina pinto, celas teren (nigra magio). Ankoraŭ intermetante belegajn rakontetojn, li faris originalan strangan gramatikan studon de nia lingvo kaj de ĝiaj elementoj, kiu ofte estis interrompita de gajaj rideoj de la aŭskultantoj.

Ĉiuj varme gratulis S-ron Redondo pro lia laboro kaj dankis lin por lia bela parolado.

S-ro Emilio Gastón, grava kaj antikva pluinro de Zaragoza, estis la unua parolinto de 1916^a. Dimanĉon 16^a de januaro okazis lia parolado, kiun li komencis, dirante ke li parolos pri nenio, tio estas, pri nenio temo, kaj tiel li faris, pruvante sian facil esprimon kaj celante pravi, ke pretigi paroladon estas afero, kiun ĉiu membro de nia grupo povas fari, sekve, kiun ĉiu fari devas. Fine kiel ekzemplo de temo, li priskribis sprite sian ĉiutagan kunsidon en kafejo «Ambos Mundos» kaj konsilis ke ĉiuj geesperantistoj paroladu elektante kiel temo, almenaŭ ian aferon de sia ĉiutaga vivo. La multenombra ĉeestantaro varme aplaudis S-ron Gastón kaj promesis ne forgesi lian konsilon. — *M.^a del Camino Tomás*.

SEVILLA. — Jaŭdon la sesan de januaro, nia senlaca propagandisto kaj de ĉiuj amata Prezidanto, S-ro Trinidad Soriano, regalis per granda festeno, la geanojn de la ĉi tiea Esperantista Grupo. La festo okazis en granda salono de la «Economía Societa de Amikoj de l' Lando», kie nia grupo havas sian sidejon. La salono ornamita per esperantaj kaj hispanaj flagoj kaj aliaj belaj esperantaĵoj, havis superbelegan aspekton.

Je la dua posttagmeze kaj kiam la ĉarma fraŭlino estis alveninta, oni kantis ĥore la himnon «La Espero» de nia kara majstro Zamenhof, kiun tre bone fortepiane ludis, F-ino Maria Baturones.

Post la himno-kanto, nia karega S-ro Soriano okupis la prezidan lokon ĉe la table kaj apud ĝi sidis, D-ro Castro Vilar, Komandanto S-ro Auñón, la D-roj A. Sáez kaj J. Cervantes, gefraŭlinoj Pérez de Cárdenas, kaj Alcaide Munilla, F-ino M. Baturones, S-ro J. Machuca, F-inoj T. Santaolalla, T. Manjon, A. Mansilla, C. López, E. Pérez del Campo, J. O'Shee, S-roj Manuel Sánchez, Carlos Martínez, S-ro Rafael Fiol, S-ro Marcelo Rufo, la vic-urbestro S-ro E. F. y García de la Villa, S-ro A. Carrera kaj multaj aliaj.

La menuo estis bonega; oni malplenigis multajn botelojn da «Manzanilla Esperanto». Dum la mangado oni parolis tute Esperante kaj ĉiunmomente aŭdigis gajaj spritaĵoj.

Ĉe la ĉampano, komenciĝis la tostoj. Ĉiuj testis por la longa kaj prospera vivo de nia Esperantista societo kaj ke ni ĉiuj kun nia kara prezidanto, povu ĝui multajn jarojn tiom da plezuro. F-inoj Maria Baturones kaj C. Santaolalla, eldiris esperante bonegan toston, kiu meritis al ili bruegan aplaudadon.

Post la fino de la festeno, oni faris fotografajon de ĉiuj partoprenantoj, por ĝin sendi al revuo «Unión Ilustrada» el Málaga. Poste, ni multe flancis kun niaj simpatiaj amikinoj, ĝis la oka vespere kiam ni kordolore devis adiaŭ. Sume, ni pasigis tre agrablan kaj feliĉan tagon, kiun certe neniu forgesos kaj ni esprimas al S-ro Trinidad Soriano, nian ĉiaman dankemon. — *J. Machuca*.

GARANTIA KAPITALO DE K. E. F.

LISTO DE GARANTIANTOJ

Antaŭa sumo : 860 pesetoj. — S-ro Bonaventura Castell, 5 ptoj.
D-ro Joaquim Coll, 25 ptoj.

Por kompletigi la sumon de 1000 pesetoj por la garantia kapitalo fiksitan de nia lasta Kongreso, mankas 110 pesetoj.

La garantia kapitalo estos elpezata nur kiam la propagandaj elspezoj kaŭzus deficiton. Tial anstataŭ tuj pagi la monon, oni subskribas la sumon, kiun oni volas, kaj en okazo de defcito la subskribinto pagus ne la tutan sumon, sed *proportie* laŭ la mono de li subskribita kaj la defcito pagota.

Ni invitas, do, nian samideanaron alhelpi la perfektan funkcion de nia organizacio, garantianta ĝin per bonvolaj donacotaĵoj.



Esperantaj gazetoj ricevitaj dum la monato publike
legeblaj en la Barcelona Hejmo de K. E. F.

The Esperanto Monthly (Anglujo), Jan. — *Orienta Azio* (Japanujo),
Dec. — *Le Monde Espérantiste*, (Francujo), Jan. — *La Holanda Pioniro* (Holando), Jan. — *Esperanto* (Svisujo), Feb. — *Svisa Espero* (Svisujo), Feb.



KORESPONDADO

S-ro B. F., *Venezia* : Findato por akcepto en Flornj Ludoj de konkur-santaj verkoj estas la 1^a de Majo. — F-ino M. Gallardo, *Villanueva del Arzobispo* : Ni notis vian abonon kaj publikigas anoncon. — S-ro D. I. Dalman, *Bahía Blanca* : Abonon de F-ino C. Buceta ni notis. Dankon. — S-ro F. Diez, *Bilbao* : Ni ankoraŭ ne ricevis la raporton, kiun vi aludas. Ni skribas al vi private. — S-ro F. Piñol, *Barcelona* : Dankon por via gratulo. — S-ro J. Comella, *Vich* : Dankon por viaj klopodoj. Ni notis la novaĵa aligintojn.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al *KATALUNA ESPERANTISTO* rajtos unufoje dum la jaro publikigi malgrandan anoncon, kiu senpage aperos ankaŭ sur *Amerika Esperantisto*

Deziras korespondadon :

S-ro Nicasio Terrasa, str. Unión, 53, ent.º. Palma de Mallorca.

S-ro Jaume Brossa, str. Lazareto, 23. Barcelona (P. N.).

F-ino Manuela Gallardo y Gómez, Villanueva del Arzobispo, Jaén : kun virinoj el Argentina, Mexico, Islas Filipinas aŭ el lando hispanlingva.

S-ro F. W. Spencer, Blackloam. B. C. Can. Usono.

S-ro P. At. Kolev, 46. str. Regenska. Sofio (Bulgarujo) : Pri kulturado de abeloj, kokoj, kunikloj, k. t. p.

S-ro Emil Lellèvre, Bureau des Renseignements, 37 Reg. d'Infant. Troyes. Francujo.

S-ro Andrej Sidorov, 7, Gruzovaja ul. Voronej, Ruslando.

S-ro Armand B. Coigne, 243 Bedford Pk. Bvd. New York, serĉas angle kaj esperante rakontojn de diversspecaj abnormalaj psikaĵ spertoj.

QVADERNS D'ESTVDI

Revista dedicada especialment a Mestres i Professors

Publicació mensual del Consell d'Investigació Pedagògica de la Diputació de Barcelona sota els auspicis de la MANCOMUNITAT DE CATALUNYA

Preus de suscripció anual

Catalunya, Valencia i Mallorca	4 pesetes
Reste d'Espanya	5 " "
Estranger	5 francs

Número solt : 50 cèntims

Se distribuiràn gratuïtament a tots els mestres oficials de Catalunya i a tots els professors de Centres d'Ensenyança sostinguts per la Diputació

**SOCIETOJ KAJ GRUPOJ ALIGINTAJ AL LA
KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO AŬ
ABONINTAJ AL KATALUNA ESPERANTISTO**

Almería	Esperantista Grupo	Almorcenes de Mac Murray
Argentera	Esperanta Tarragon-Provinca Ligo.	
Bahia Blanca (R. Argentina).	Ateneo Esperantista	Patagones, 8
Banyoles	Esperanta Amikaro	Café del Comerç
Baracaldo	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Barbará del Vallès	Esperanta Nesto	
Barcelona	Barcelona Stelo	Marquès del Duero, 88
"	Ĉiam Antaŭen	Poblet, 25
"	Esperanta Fakto C. A. de D.	Rambla Santa Mònica, 25
"	Esperanto kaj Patrujo	Sant Simplicí, 6
"	Fervojista Stelo	Princesa, 50, pral.
"	La Rondo	Provença, 156
"	Libera Stelo	Muntanya, 61
"	Libero	Mercaders, 25
"	Nova Sento	Enna, 151
"	Semo (A. E. P.)	Carme, 30
"	Supren	
"	Universala Frateco	
"	Inst. por vulgarigo de l' Esp. Gaz.	Pen de la Creu, 10
"	Unió Catalanista	Canuda, 14, pral.
Bilbao	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Buenos Aires (R. Argentina).	Esperantista Grupo Socialista (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Calafell	Casal Català	S. Juan, 782
Cassà de la Selva	Laboro kaj Kulturo	Pon, 2
Falset	Lernejo kaj Mangejo	
Girona	Priorata Stelo	
"	Gerona Espero	Cambea de Comerç
"	Geronprovinca Esperantista Ligo	Pda. St. Domingo, 2, pral.
La Arboleda	Studenta Juneco	Seminari
Manlleu	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Martorell	Esperantista Amikeco	Pont, 38
Mieras	Martorello Stelo	Independencia, 6
Molins de Rei	Esperanta Fervoro	
Mollet	Stelanoj	Sant Miquel 14
Moskvo (Rusujo)	Vojantaŭen	Soc. La Aliança
Murcia	Esperantista Societo	Lubjanskij pr., 3
Olot	Esperantista Grupo	Sociedad, 14
Palafrugell	Olota Stelo	Biblioteca Popular
Palma de Mallorca	Paco kaj Amo	Unió, 2
Reus	Esperantista Klubo	Misión, 5, 1 ^r
Rubi	Nova Semo	Major, 15
Sabadell	Esperanta Burgono	
"	«Aplech» Esperanta Grupo	Via Massagué, 55
"	Esperanta Semo	
Sant Feliu de Guixols	Frato	Caymó, 32
Sant Llorenç Savall	Monta Grupeto	
Sant Vicens de Torelló	Homari Pratigilo	Serrallonga, 8
Santa Coloma de Farnés	Esperanta Idealo	
Sta. Perpètua de la Moguda	Kamparo	
Sevilla	Esperantista Grupo	Económica de A. del Pab
Tarragona	Tarragono Esperanta	Sant Agustí, 4, 2 ^a
Terrasa	Lumon	Nord, 26
Torelló	Nova Harmonio	Nou, 74
Vendrell	Frato	Dr. Marilló, 12
Venafra	Flugla Penso	
Vich	Vika Esperantistaro	S. Hipòlit, 14
Vilanova i Geltrú	Laboro Esperanta	Sant Antoni, 1 i 3

KATALUNA ESPERANTISTO

Monata Esperanta Gazeto

JARO VII* : APRILO-MAJO 1916

4-5

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

== PALLA, 8, PRINCIPAL : BARCELONA ==

Honora Direktoro : FRED. PUJOLÀ

<i>Direktoro</i>	JOSEF GRAU
<i>Redakcia sekretario</i>	ESTANISLAU PELLICER
<i>Redaktoroj</i>	ARTUR DOMENECH
	JOSEF VENTURA
<i>Administristo</i>	JOSEF SERRAT
<i>Administracia sekretario</i>	JOAN AMADES

KUNLABORANTOJ

Narcís Bofill (Palma de Mallorca). — D-ro Jacinto Bremón (Barcelona). — D-ro Josep Casanovas (Girona). — D-ro Joaquim Coll (Barcelona). — Delfi Dalmau (Bahia Blanca, Rep. Argentina). — Victor O. de Allende (Bilbao). — Félix Diez (Bilbao). — Josep Domenech (Reus). — Gustau Gálcerán (Vilanova i Geltrú). — Joan Gili (Barcelona). — Vicente Inglada (Toledo). — A. Novejarque (Valencia). — Pastro Josep Planas (Barbà del Vallès). — Joan Rosals (Barcelona). — Eulalia Rosell, Teresa Rosell (Vilanova i Geltrú). — Josep Rosselló (Sant Joan, Mallorca).

KORESPONDANTOJ

B. Castell (*Andratx, Mallorca*). — J. Feliu Sureda (*Anglès*). — A. Romagosa (*Arbós del Penadès*). — P. Avellana (*Argelaguer*). — P-tro M. Pamies (*Argentera*). — J. Armengol (*Armentera*). — R. Teixidó (*Badalona*). — J. Aulina (*Banyoles*). — J. Cardona (*Berga*). — F. Rubinat (*Borges Blanques*). — J. Jané (*Calafell*). — F. Barberó (*Flis*). — G. Menéndez (*Gijón*). — A. Mosella (*Igualada*). — B. Nogué (*Manlleu*). — J. Altagós (*Manresa*). — P. Domenech (*Martorell*). — R. Riera (*Mieres*). — Ll. Santacana (*Molins de Rei*). — J. Vilà (*Ole*). — F. Sagrera (*Palafreuil*). — P-tro Tomás Alsina (*Puades*). — P. Llopart (*Queral*). — E. Aguadé (*Reus*). — P. Solanas (*Rubí*). — R. Martorell (*Sabadell*). — E. Presas (*Sant Feliu de Guixols*). — J. Rosal (*Sant Joan Les Fonts*). — P. Costa (*Santa Coloma de Farnés*). — J. Girona (*Selva del Camp*). — J. Vidal (*Taragona*). — M. Solà (*Terrassa*). — F. M. Brá (*Tivissa*). — F. Guitart (*Vendrell*). — R-do P. Plana (*Ventalló*). — P-tro Antón Ribas (*Vich*). — A. Robreño (*Vilafranca del Penadès*).



Nia devizo: *Mara estas galaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio,

DE Baska Esperanta Federacio KAJ
DE Aragona Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Palla, 8, principal: Barcelona

Mudie mortis!

Sanktan ripozon!

ANTAŭ tri jaroj mi forvojaĝis al Londono por ĉeesti la malkadamvojan kongreson. La ĉefdelegito S-ro Epstein akceptis min en la fervojstacio, alprenis por mi hotelon, instruis min rilate tramojn, aŭtobusojn, fervojojn k. t. p. kaj fine min kondukis al la hejmo de Mudie loĝanta kun siaj gepatroj; ĉar ili invitis min al vespermango. En tia vespero li montris al mi diversajn esperantaĵojn: inter ili estis tre interesaj grandaj volumoj binditaj, unu por ĉiu kongreso, enhavantaj programon, festojn, fervojaĵojn kaj tramajn biletojn kaj plej gravajn kaj negravajn dokumentojn kaj detalojn de niaj ĉiujaraj festoj.

Mudie estis tipa propagandisto: inteligenta, juna, simpatia, ĉiam servema kaj ĝoja, senhalte laborema kaj tre modesta.

Kiam li plej konatiĝis kiel laborema organizanto estis dum la tria kongreso en Kembriĝo, Anglujo, okazinta en la jaro 1907. La animo de tiu kongreso estis li, kiu ĉion zorgis kaj ĉion antaŭvidis. Ĉe la kongresaj diskutoj li kondukis tiel takte, ke ĉiu evitis kontraŭstari liajn opiniojn kaj tendencojn. Mi nescias la ĉefan kaŭzon de lia aliĝo al la angla armeo, sed mi pensas, ke lia esperantamo iom influis en lian decidon. Li parolis flue la francan lingvon kaj en lia

menso sendube prezentis sin la ideo, ke en la lingva malkompreno de la milito li povos fari-gravan propagandon, ĉar li posedas anglan kaj francan lingvojn.

Li aliĝis ankaŭ, dum mia ĉeesto en Londono, al nia internacia voja kongreso celante nur la propagandon de Esperanto, kaj ofte ni devis klarigi al la kongresintoj kian lingvon ni uzadas. Mi neniam forgesos la hejmon de Mudie. Du maljunuloj rigardantaj la mondon kaj la vivon laŭ la okuloj de sia solfido, revantaj je tia feliĉo. Kia neelportebla bato trafis ilin!

Bilbao, Marton 1916.

VICTOR O. DE ALLENDE



En Maja Tago'

DEVIZO : *Baleco*

En maja tag' jen kiam ekaperis
de nia am' la brila belaŭroro,
irante en arbaro ni gravuris
sur arba ŝel' ambaŭajn niajn nomojn,
kaj man' ĉe man' en rondo ni dancadis
de la plezur' ebrie kaj de l' ĝojo.
Tiame vi, okulojn mallevinte,
kun honestec' vi diris kaj kun honto:
— [De tiu arb' el ligno estos, eble,
lulil', en ĝi filetoj niaj sonĝos!
Kaj mi al mi ekdiris, dum mi aŭdis
de via voĉ' l'argentan dolĉan sonon:
— [De tiu arb' el ligno estos, eble,
funebra kruc' por eble nia tombo!

Katalune verhis VÍCTOR BALAGUER

Tradukis MARIÁN SOLÀ

Ĉevalo

KIEN oni lin kondukas? Li ne plu sentas sur la flanko la timonon de la droŝko, kaj lia kamarado ne marŝas apud li. Sed li sentas sur la dorso la pezon de kavaliro, tute kiel dum tiu tempo, kiam oni okupis lin en heroaj klopodoj, kaj iom da fiereco varmigas lian sangon. Kial ĝuste por tiu tago de gloraj rememoroj oni bandaĝis liajn okulojn kaj blindigis lin? Kien oni lin spronas?

Li ja troviĝas en la urbo : la pavimoj ne permesas erari. La homoj staras laŭ du bruemaj vicoj inter kiuj li amblas. Eble la tago de la justeco, rekono kaj dankemo jam alvenis. Malfrue, kiam li nur staras en ostoj kaj en haŭto, sed fine oni eble dankos liajn servojn... Tamen, kial nun ĝuste, kiam printempo floras ĉe ĉiu branĉo kaj varmo de l'aero reunigas, kiam ĉio lumas kaj festas, ĉio parfumiĝis kaj la horo de dankemo alvenis, kial ĝuste nun oni blindigis lin per ĝenanta, mallerte alligita tuko? La fera kruro de l' rajdanto doloras lian dekstran flankon.

La ĉevalo memoras. Kaj li klopodas paŝi elegante. Sed liaj genuoj krakas eluzitaj, liaj hufoj tordiĝas, liaj nervoj kaj muskoloj lacigitaj tradukas la deziron per mallerta implikiĝo. La stelo de la sprono glitas sur ripo. Kia giganta heroo rajdas lin?

*

Iam, kiam li estis juna kaj fortika, ili staris milope en regulaj vicoj, tremantaj sub retenaj rimenoj, agititaj de nervoskuoj de juneco. Akraj trumpetoj splitis siajn sonojn tra la aero, la polvo de l' amaso nubigis super iliaj kapoj, la tinto de armiloj kaj froto de ledaĵoj tondrigis la kamparon. Tiu unuan tagon de batalo neniam li forgesos. Ĉe la kontraŭa flanko kelkaj grizaj nubetoj ŝvelis super horizonto kaj krakado aŭdiĝis. Gi estis kvazaŭ signalo : la amaso ekgalopis, kaj li sentis ke li iras kun ĉiuj al defendo de io grava grave atakita. La polvo kaj la fumo plidensiĝis, la bruo pligrandiĝis; ordo regadis tamen super ŝajna malordo. La suno rompis siajn radiojn sur klingoj kaj kiraso; tie ĉi tie ekfulmis la kanonoj kaj grumblis mitralaĵoj. Li kuris, trotis, galopis, saltis, kapreolis.

Li estis vundita, tamen li kuris; lia sango elŝprucis el lia brusto, tamen li trotis; ĝi fluis sur la kruro, tamen li galopis; ĝi malvarmiĝis sur la haŭto, tamen li saltis kaj kapreolis. Pulvon kaj polvon nur, oni enspiris. Sed lia rajdanto falis kaj li haltis. Li haltis tiam nur, kaj rigardadis la rajdinton en liaj lastaj frosttremoj. Kaj li protektis lin per sia korpo, kaj lekis lian vizaĝon. Li sentis sin plene de kompato por la homo... Ha, li laboris bone por la bono de sia propra lando!

Li restis iel invalida. Tra la vundoj, la mistera forto de juneco trafluadis; la brusto kunpremiĝis kaj sufokiĝis. Adiaŭ, paradoj kolorplenaĵ, herooj trairadoj kaj kavalkadoj bruaj. La nova stato ne plaĉis al li unue, sed baldaŭ poste li alkutimiĝis kaj eksentis, ke ankaŭ tiel li servadis al la lando. Dum senfinaj aŭtunoj li trenis la plugilon sur la sanganta tero; dum brulantaj someroj li piedpremis grenon sur draŝejoj; dum longaj vintroj, sur frostigintaj vojoj, de l' kampo al urbo kaj de l' urbo al kampo, li trenis la ĉareton ŝargitan de nutraĵoj por la homoj. Kaj li plenumis la malsuperan taskon kun blinda sindonemo de obeema besto. Miloj, kiel li, laboras tra la tuta lando; ili helpas riĉecon kaj prosperon helpante la loĝantojn. Li sin sentis fiero, ŝuldiganta dankemon de la homoj.

Tiu feliĉa tempo ankaŭ malaperis. Novan epokon li devis travivi kaj denove novajn kutimojn li devis alpreni. Nun estas la angulo de la strato, kie la vento siblas senkompata, kaj la malnova droŝko haltigita senfine ĉe l' stacio, ruliĝanta kun bruo de feraĵoj, semanta ŝraŭbojn kaj splitaĵojn sur la vojo. Kaj ankaŭ la vergado sur la dorso por kontentigi tage rapidemon de borsisto aŭ turisto, nokte — senpaciencon de malfruiginta kuracisto kun familiano...

Sed nun, fine jen la gloro. Li trairas la urbon en heroo marŝado; por vidi lin la homoj amasiĝas en du respektajn vicojn. Li sentas fluon de danko falanta en lian koron kiel manpleno da tritiko ŝutata en traplugitan teron... Floros en ĝi la ĝojo kaj kontento.

*

La cirko bruas per milopaj bruoj de tridek mil personoj amasigitaj sur la ŝtonaj ŝtupoj. Varmo de suno kaj vino boligas la popolan sangon. Lumo blindigas per movo de multkoloraj ventumiloj, flirtado de poŝtukoj, ŝvarmado de l' amaso, interkizado de lipoj kaj orangoj. Krioj salutaj kaj alvokaj, ŝercaj kaj mokaj, miksiĝas kaj zumadas en la aero kiel sibilado de bolanta kaldrono. La birdoj, kiuj superflugas, nepre sin demandas, al kiu apartenas tia

giganta okulo sen pupilo, — kia svarmanta puso ĝin mordboras.

La lastaj notoj de nacia himno mortas en la spaco, kaj ĉiu brusto retenas eĉ spiradon; sub mantelon de silento kaŝiĝis ĉiu bruo; kaj la subita mallaŭto estas iel dolora. Dekstre, trio, ĉevaloj staras rajdataj de travestiitaj viroj — la kruroj en feraj ingoj, la aksele kaj pugno premantaj longajn pikilojn.

Ĉe la akrega lumo de la suno, la pordo de la stalo malfermiĝas kaj desegnas makulon nigran. En la kadro aperas la silueto de l' kornohava bruto, — la lipegoj ŝaŭmantaj, la kapo vibrante ankoraŭ pro l' incito de piko, ĉe l' brutejo. Ĝi rigardas la dezertan arenon, blindigan, vibrantan ankaŭ en la elvaporigo de la varma posttagmezo. Ĉe la alia flanko, tuko agitiĝas. Tro malproksime. Malantaŭ ĝi, la pordo refermiĝis kun malmola bruo. Maldekstre — la ĉevaloj. Oni ĝin vokas. Ĝi streĉas la muskolojn, malstreĉas ilin, saltas kaj alkuras. Ĝi korncelas la homon, sed io, la pikilo, ĝin haltigas. Alkroĉita al la selo, la homo retenadas la brutan puŝon, ruĝa pro l' peno, streĉanta sian korpon je superhoma forto. La taŭro puŝas ankaŭ apogita en la truoj, boritaj de la hufoj en la tero; kaj flueto de sango ruĝigas ĝiajn ŝultron kaj maldekstran kornon. En la giganta daŭrigo de la peno, la ĉevalo tremetas, ŝanceliĝas kaj cedas; la pikilo tuŝas oston, grandigas la fendegon de la haŭto kaj glitas. La taŭro venkas la reziston kaj antaŭeniras je unu paŝo: li skuas la korpon kaj enigis la kornojn en la bruston kaj kolon de l' ĉevalo. Sango fluadas tiam kvazaŭ tra malfermita krano, ŝprucas al tero, al bariero, makulas la brutordon, marĉiĝas sur la sablo jam sufiĉe trempita. Kaj la ĉevalo tremas sur la kornoj, pendanta kiel felo de najlo, sentante jam trakuron de malvarmo sub sia faldoplena haŭto. Pro ĝia malforteco la homo estis venkita, elŝirita de sia selo, ĵetita kontraŭ la fostojn de l' bariero en mortiga falo; eble li mortis jam ĉe l' brakoj de la helpistoj, kiuj lin kunportas nun. Pro malforteco de la ĉevalo nur! El ĉiu brusto elŝiriĝis ekkrio. Dume la bruto ankoraŭ furioza, blindigita de la ruĝo de l' sango, en nun facila batalo trapikas kaj elfinas la ĉevalon, taŭzas lin kiel pelton, reĵetas kaj rekroĉas lin denove. Jen nun ankoraŭ vundo ĉe la kolo, jen ĉe la brusto, jen fine ĉe la ventro; kaj jen la intestoj falas en pakaĵo sur la sangon teron. Tiam de ĉiu flanko de la cirklo oni aplaŭdas al la bruta braveco, kiel puno al la kulpa ĉevalo, la porka rajditaĵo, kies malfortaj kruroj difektis la belfinon de la ludo. De ĉiu buŝo iras pezaj vortoj al kraĉinda ĉevalaĉo, al la infera felajo, al la senpatra ido de la koto. Boteloj kaj oranĝoj flirtas tra la spaco al lia frosttremanta haŭto.

Li dekreĉiĝis nun de l' kornoj de la bruto jam distrita, provas

forkuri, sed vane. Ĉe ĉiu mallerta paŝo liaj kruroj implikiĝas en la intestoj, tiras la sangantan rubandon, malplenigas la ventron. Komike li hezitas, ŝanceliĝas, kaj sub publika rido, li falas kun bruego de meblo renversita. La blindiginta tuko demetiĝis dum la skuoj de l' lukto. Sian belan okulon li malfermas, li rigardas surprize. «Kio! Homoj? El kiu lando — ili?» Unu botelo frapas la okulon kaj fermas ĝin por ĉiam.

FRED. PUJOLÀ



Eklogo

Min pri la rakont',
kanzon' de montano,
sur Aneto-mont'
instruis paŝtisto en sia kabano.
Pri ĝi, kiel flor'
en solec' arbara,
vivas rememor'
sur la pint' montara;
tra temp' gardis ĝin
paŝtisto, kantanta
en nokto pro tim',
dum iras la urs' tra arbaro giganta.
Sub pin' iam mi
aŭskultis, ravata:
impona vizi'
elfloris el kanto de l' paŝtist' glosata.
Kun jena la ton'
aŭdiĝis kanzon':

Malantaŭ Anet-pint' brilanta nune
kronite per la neĝ', kun ruĝnuanco
tiun vesperon alstariĝis nubo.
— Nokton malluman signas! — mi al knabo
diris, ĝin rigardanta kvazaŭ vidus
li de grandega rozo la floradon.
— Dum mi ĝis supro iros-kun la hundo,
al kasejo kondukis la brutaron! —
Kaj preninte bastonon, supreniris
mi, senhalte marŝante, ĝis la lagoj.
La nokto kreskis. Saturita akve

etendigis ĝis fundo de la valo
 la nova herbo de paŝtejoj supraj;
 aromon de l' arbar' kapreolaro
 trankvile flaris, kiun vent' forportas
 malsupren sur la vojon al kabano.
 Veninte ĝis abioj, ho mistero!,
 paroŝantajn sub freŝo de la arboj
 mi surprizis virinon tute junan
 kaj viron kun piedoj kvazaŭ kapro,
 harriĉan, kornehavan, kun pendanta,
 sur lia dors' sunbruna, flut' el kano.
 Ĝentila kiel floro nimfo estis,
 ligigis ŝiaj haroj kiel garbo,
 kaj sur mamoj la ŝiaj helruĝigis,
 el burĝon' ne krevintaj, du diantoj.
 Mi, ĉiam je novaĵoj scivolema
 rakontindaj dum posta travintrado,
 sub ia ŝtono longe min kuŝigis
 kaj en peltan enigis mian kapon.

— Rigardu, jen! — la nimfo bele diris,
 kisante lian frunton kun fervor';
 kaj brula kis' el ruĝa buŝ' deiris,
 mire kurante tra l'arbaro for.

— Rigardu kiel venas nokt' serena:
 sur neĝo, nek vualo de nebul';
 arbar', en dorm'; kaj herbo, parfumplena;
 por amadi jen hor', mia karul'!

Kiam suprojn degelis prosomere,
 la Aran-valon adiaŝis mi:
 ĉar en suproj vin sciis mi parkere,
 parkere nur, la pleje granda sci'.

Nun, apud mi, sunbruna via haŭto
 odoras kiel pin'; en ĉirkaŭpren'
 dormadi volas mi ĉe nokt-mallaŭto
 sur viaj fortaj brakoj por kusen'.

Ni ĝuos nian amon en libero:
 en lagojn vintre sub glacimantel',
 en suproj de montaro dum somero
 - por atingi la lumon el ciel'! —

Kaj diris li : — Ho, kia rozodoro
disfalas de abioj el branĉar'!

Sed, silentu pri am',
ĉar sentsentiĝas koro,
kiel en vintro de malvarma jar'!

Faŭnuso maljuniĝis! Kantis ame
mi, kiam estis mia sang' en flor';
juneco mia forte vibris, same
kiel tintil' el or'.

Plej bonan kuŝolokon en fagaro
sub suma varm' elekte sertis mi;
malvarma fluus de fontan' akvaro
el suproj, tutkovritaj de glaci'.

Kaj ĉirkaŭ min la nimfoj kolektiĝis
sur la mola herbejo por petol',
kaj rikoltante fragojn disperdiĝis
tra vojoj plennaj de malluma sol'.

Mi vokis la plej belan
kaj plektis kanton ambaŭ ni en ĥor'...
Mortiĝis kant'... sur ŝia buŝ' anĝela
elkrevis mia kiso kiel flor'.

Sed nun, kiam, se pintojn mi aliras,
turniĝas mia kap', kaj eĉ dum halt',
kaduka jam, mi tuse febrespiras,
ĉar ilin trovas mi de troa alt',

por mi amadi estas malgajaĵo;
nigrec' por mi — por vi, kolor' de sang';
por mi kis' estas mort' — por vi, belaĵo;
sur viaj haroj, blond'; ĉe miaj, blank'! —

Kaj ploris la faŭnus'! Kaj je ŝancelo
malgaje diris ŝi : — Falinta arb'!
Sur via morta ŝelo
junecoflorojn volvos mi en garb'!

Mi lasta nimfo estas!
Ĉiujn faŭnusojn jam forprenis mort'!
Ankoraŭ ruĝa mia buŝo restas,
en vi — ne batas kor'!

Forkuru ni! Mia harar' radia
 en kavaĵo dum noktoj ŝirmos vin;
 velkos beleco mia
 sen la parfum' de l' ĝoj' esti patrin'!—

— Ho, ne, nimfo tre kara!—
 kaj ŝaŭnus' ŝin alpremis al la kor';
 poste, per mano hara
 okulojn viŝis, ruĝajn de la plor'.

— Fandiĝis mia raso!
 Ke restu por pastistoj tuta spac'!
 Ili venu kun sia bovamaso
 al herbejoj sur mont' plenaj de pac'!

Ni mortu! Roko brava
 atestos pri la granda am-ofert!
 Vivon ne volas sklava
 mi sub perforto de la hommizer'!—

Kaj, al krutaĵ' kiel lavanga falto,
 ili subite jetis sin en ĝin...
 kaj krakis la arbaro, kaj en valo
 l'unua flock' nebula levis sin!...

Tiam mi kun teruro tuj demetas
 galoŝojn kaj pendigas peltvestaĵon;
 de ŝton' al ŝton' malsupren mi min ŝovas
 kaj atingas la fundon de l' krutaĵo.
 Al mi prezentis tie roko brava,
 ruĝa makule de ilia sango,
 apud kornulo la malfruan floron!
 Pasis jam multa tempo post l'okazo,
 sed konservas mi tamen tiun fluton
 memoraĵon de l' vir' ŝajninta kapro.
 Prenu ĝin! Vi retrovos la aromon
 el la, de l' maljunulo, lasta kanto...
 Por mi l'alia memoraĵ' dolĉega:
 manpleno da hararo, flock' el garbo
 en suproj noktomeze rikoltita,
 kiel sanktaĵo, per la ambaŭ manoj.
 Adiaŭ, nu : jen tuj vespera pluvo
 kaj jam trans monton iris la brutaro.
 Ĉar rakonton vi scias, mi vin benas
 kaj faras je montaroj heredanto!

Katalune verkis JOAN M.^a GUASCH

Tradukis JOSEF GRAU

Niaj nunjaraj Kongresoj

VII^a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio

I^a Kongreso de Hispana Esperantista Konfederacio

Reus : 11, 12, 13 Junio 1916

POST unu monato kunigos nin ĉiujn la Kongresoj de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO kaj de la HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO; post unu monato ni denove havos okazon plenigi nian animon per tiu kuraĝa entuziasmo, kiun la kongresa medio liveras al la ĉeestantoj; post unu monato ni okazigos tian feston, kiu estos por niaj alilandaj kunbatalantoj kvazaŭ lazura peco en malserena ĉielo. Pretiĝu do kamaradoj! Se iam oni ĉeestis enlandan kongreson allogite nur de la belaj festoj kaj solenoj dum ĝi okazontaj, oni devas nune ĉeesti ĝin ne nur por ĝui tiujn ŝatindajn okazojn, sed precipe por alporti sian helpon al la tasko, kiun ni — la plej multenombra aro de esperantistoj neŭtral-landaj — tenas sur niaj ŝultroj.

Kiam paco regis en Eŭropo, nia ĉinjara kongreso estis nur unu el la floroj de la esperanta ĝardeno, ĝia parfumo de entuziasmo disŝutigis ne tresenteble tra Esperantujo. Sed hieraŭ, kiam ni okazigis nian VI^{an} Kongreson en Vilanova, la bonodoro de l' ĉarma bukedo, kiun tie ni rikoltis, regalis nian samideanaron el la tuta mondo, pere de la esperantaj gazetoj, kiuj diskonigis ĝian sukceson. *The British Esperantist*, *Amerika Esperantisto*, *La Holanda Pioniro* kaj inter ceteraj *La Ondo de Esperanto*, aperigis raportojn detalajn kaj amikajn pri nia festo jara, kiun ili prezentis al la enlandaj esperantistaroj kiel kuraĝigan fonton de espero. Nunjare la cirkonstancoj bedaŭrinde ne sangigis favore; kontraŭe, ili eble fariĝis pli malfacilaj. Ni devas do des pli multe klopodi, ke nia festo atingu la kutiman sukceson, eĉ pli grandan se eble, por ke la esperantaj gazetoj povu ripeti refoje la elokventan resumon: «*Admense* en Katalunujo *neniel* mortis nia lingvo!» per kiu unu el ili premias niajn komunajn penojn.

Katalunaj samideanoj, kiuj konas jam la vojon al Kongresoj de K. E. F.; Hispanaj esperantistoj, kiuj unuafoje okazigos enlandan Kongreson: ni ne forlasu nian postenon; iru ni ĉiuj kune plej sindone kaj entuziasme al nia grava festo; ni kulturu fervore nian flaron; ni interplektu amike niajn fortojn, por starigi la ombrodonan laŭbon, sub kiu povos firmiĝi post la ventego la resaniganta esperantistaro. Ni plenumu nian devon!

La O. K. de la Kongresoj antaŭzorgis pri ĉiuj detaloj ilin koncernantaj, kaj por tio ĝi starigis flanke de si specialajn komisionojn, kies nomarojn ni sube donas.

La unua cirkulero, kiun la O. K. dissendis, insistas precipe pri la helpo, kiun ĉiu esperantisto certe liveros por plisukcesigi la Propagandan Ekspozicion, kiu havos lokon en la salono de «Centre de Lectura» (Legoklubo). Ni esperas de nia samideanaro amasan alsendon de ĉiaspecaj esperantaĵoj, kiujn atente zorgos, evitante perdojn, la ekspozicia komisiono.

Ankaŭ en sama salono estos instalita esperantista vendejo kiun povos partopreni, krom la O. K., la societoj, firmoj, k. t. p. kiuj tion sciigos ĝustatempe antaŭe. En ĝi vendigos inter aliaj aferoj la kongresaj markoj speciale eldonitaj en io diversaj koloroj kaj io malsimilaj desegnaĵoj, insignoj de K. E. F., markoj propagandaj, broŝuroj «Pri Cervantes» eldonitaj de la Madrida Esperantista Grupo, k. t. p.

Por faciligi la laboron de la komisiono kaj garantii la senmankan redonon de la pruntedonitaj esperantaĵoj estas necese ilin sendi *laŭoble plej baldaŭ* al la O. K., sidanta ĉe «Nova Semo, Centre de Lectura de Reus».

Ankaŭ konvenas sciigi al la O. K. antaŭ la 1^a de Junio la ĉeeston de grupaj standardoj, kiuj estos honorataj per bela rememoriga banto, sole surmetota al ĉiuj portitaj de la grupoj.

La O. K. petis de la Fervojoj Kompanioj rabaton por la kongresanoj. Certe ĝi estos konsentita por inter Reus kaj ĉiuj provincaj ĉefurboj de tuta Hispanujo kaj por ĉiuj stacioj en Katalunujo. Tiu rabato malkarigos la prezon de l' vojaĝo ĝis proksimume 7⁸⁰ pesetoj, iro kaj reveno, por barcelonano. La karton specialan ricevos ĉiuj federaciaĵoj kune kun la Kongresa insigno, ĉirkaŭ la 1^a de Junio, kiam publikigos du suplementoj al tiu ĉi numero. El tiuj suplementoj, unu, eldonita koste de la O. K., publikigos belajn bildojn de konstruaĵoj, promenejoj, k. c. el la kongresurbo, kiuj certe vekos la deziron ĉeesti Kongreson en tiel bela urbo okazantan. La alia publikigos la definitivan programon de la Kongreso, verdikton de la Floraj Ludoj kaj ĉiujn lastmomentajn informojn.

Responde al la demandoj faritaj de Konfederaciaĵoj, kiuj antaŭe ne ĉeestis nian Kongreson, ni klarigas, ke ĉeesti ĝin havas la rajton ĉiuj membroj de la Konfederacio, t. e., de la aliĝintaj Federacioj. Por partopreni oni bezonas nenion karton, nur la ateston ke oni estas membroj de la Federacioj kunfederitaj. Por la K. E. Fanoj taŭgos kiel atesto la kvitanco nunjara. Por la anoj de la Baska kaj Aragona Federacioj, — ia dokumento aŭ kvitanco de la respektiva Federacio aŭ de la grupoj, kiuj ĝin formas.

Se iu esperantisto ankoraŭ ne membro de la Konfederacio deziras ĉeesti la Kongresajn festojn, li bonvolu sin turni kun sia peto al la O. K., kiu faciligos al li la ĉeeston.

Ĉiuj enurbaj societoj cedis jam al la O. K. siajn salonojn, kie gastigos la kongresanoj okaze de la diversaj solenoj kongresaj. Societoj «El Círculo» «Olimpo» «Centre de Lectura» Komerca Ĉambro, Katolika Societo, k. t. p., laŭ ekzemplo de la Urbkonsilantaro, helpas al la sukceso de la Kongreso. La tri enurbaj ĉiutagaj ĵurnaloj, kiuj jam de la komenco de l'organizado malfermis

kongresen rubrikojn, publikigis multe da sciigoj kaj propagandaĵoj artikoloj, kaj amplekse raportas pri ĉiuj kongresaj okazaĵoj. Ĉiastemajna gazeto ilustrata, en la kvar numeroj antaŭ la Kongreso, aperigos unu tutan paĝon kun fotografaĵoj kaj bildoj el niaj antaŭaj Kongresoj kune kun propagandaĵoj artikoloj.

Oni aranĝis la programon de la Kongreso tiamaniere, ke la dimanĉon okazos la festoj, lundon la laboraj kunsidoj kaj mardon la ekskursoj kaj vizitoj. Inter la lastaj, ekskursoj al Poblet, la glora konstruaĵo palaco kaj monaĥejo de la katalunaj aragonaj reĝoj; al granda kluzo en Riudecanyes; al Salou, k. t. p.

Jen, por fini, la nomaro de la membroj de specialaj komisionoj kaj la listo de la Hoteloj en Reus.

PROPAGANDA KOMISIONO. — Joán Vallvé Llavet, *prezidanto*; Joán Gonzalez, Francesc Simó.

ADMINISTRA KOMISIONO. — Francesc Simó, *prezidanto*; Francesc Baró, Antoni Clivillés, Pere Aguadé, Joán Vallvé, Pere Felip, Francesc Terrafeta, Josep Martorell.

INFORMA KOMISIONO. — Francesc Terrafeta, *prezidanto*; Francesc López, Jaume Vilalta.

EKSPOZICIA KOMISIONO. — Josep Domenech, *prezidanto*; Joán Vallvé, *viceprezidanto*; Teresa Barrufet, Nil Alsina, Jaume Vilalta, *sekretario*.

Hoteloj, gastejoj kaj restoracioj

Hotelo Londres : Pensiono, almenaŭ 7'50 ptoj. Unu manĝo, 4 ptoj. Ĉambro, 2 ptoj.

Hotelo Paris Continental : Pensiono, almenaŭ 6'50 ptoj. Unu manĝo, 3 ptoj. Ĉambro, 2 ptoj.

Gastejo Europa : Pensiono, almenaŭ 5'50 ptoj. Unu manĝo, 2'50 ptoj. Ĉambro, 1 pto.

Gastejo Nacional : Pensiono, almenaŭ 5 ptoj. Unu manĝo, 2'50 ptoj. Ĉambro, 1'50 ptoj.

Kafejo restoracio Paris : Unu manĝo, 3 ptoj.

Bierejo Oriental : restoracio nefermata tage kaj nokte : Unu manĝo, 3 ptoj.

Ekzistas ankoraŭ gastejoj kaj restoracioj de malpli alta kategorio, pri kiuj la prezidanto de la Informa Komisiono S-ro F. Terrafeta, str. Arrabal de Robuster, 38, liveras informojn.

Por rezervigi al si ĉambrojn, aŭ antaŭelektitan loĝadon, oni devas nepre sin turni al la citita komisiono, por eviti malfacilaĵojn de la gastigo post la unuaj momentoj esti alveninta en la urbon.

VI^a Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

Kiam ne estis eble ĝustatempe publikigi ĝin, la O. K. de la Kongresoj ricevis la jenan proponon de premio:

XVI. De KATALUNA GRUPO ESPERANTISTA DE PARIS «LA RIZAMANTOJ» — TEMO: *Al la plej laŭfundamenta traduko el kataluna prozaĵo.* PREMIO: Arta statueto de D-ro Zamenhof.

LISTO DE DEVIZOJ DE LA RICEVITAJ VERKOJ

1, Mia lando havis multajn pinarojn. — 2, Mar' brava, mar' verda, maro ŝaŭmadanta. — 3, Sopiŝo. — 4, Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta. — 5, Sol solet... 6, Colonia Victrix. — 7, La tutmonda homaro deziras tujan pacon. — 8, Rana Esculenta. — 9, Laudate Dominum omnes gentes. — 10, Sonoru tutmonda la liro, laŭ son' de nacia inspiro. — 11, Pri oranga ŝelo. — 12, Kronoj el ĉiaj floroj. — 13, Sensencaĵo. — 14, Tamen, Apud, Sed. — 15, Kiel la mastro tiel la servisto. — 16, Triopa kordo. — 17, Paco, Amo kaj Esperanto. — 18, Al paro da belaj okuloj. — 19, Nové Mac. — 20, Stranga. — 21, Visca l'humor! — 22, La homo estas beste. — 23, Rozo vidis siatempe rozojn sen dornoj. — 24, Por patrujo kaj Esperantujo. — 25, Ex-Tenebris. — 26, Gravaĵ ĉagrenoj pro amo. — 27, Sango. — 28, Light and clearness. — 29, Avant. — 30, A Lesbja rediviva... — 31, Dexau-me guaitar per els vestres ulls dins la vostra ànima (Rhodinus). — 32, Tri haringoĵ. — 33, Rugobusa knabineto kun la dolĉa klar-okul' (Heine, Grabowski). — 34, Euates in mundum universum. — 35, Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon. — 36, Revoj pri ĝojega vojaĝatendo. — 37, Estimo. — 38, Printempo. — 39, Ne estas brilanto ĉio brilanta. — 40, La Felicitulo. — 41, Praktiko super teorio. — 42, Ĉiajn iluziojn mi perdis. — 43, Amrakonto. — 44, Amen. — 45, Mallongaj pensoj. — 46, En la soletat tot es poesia. — 47, Brotà l'oliva i enmudí la guerra. — 48, Donu florojn kaj vi ricevos dornojn. — 49, Veliku homaro. — 50, Que amb els dolents sigui benigna i pia. — 51, Bedaŭrinde. — 52, La konscienco garde staras. — 53, Un beau visage est le plus beau de tous les spectacles. La Bruyère. — 54, Oh temps passats de dolĉ recort. — 55, Caritas. — 56, Veni, vidi, vici. — 57, La mar' estas poeto de la kreitar'. — 58, Al mia fianĉino.



ENLANDA MOVADO

S-ro Fred. Pujolá restas ankoraŭ sur la batallinio kaj fartas bone. Lia adreso estas jena:

Téléphoniste au 303^e d'Infanterie. C. H. R. Secteur 58. Francujo.

BARCELONA. — *Esperanto kaj Patrujo* sindone partoprenis en la publika monkollektado tra la barcelonaj stratoj profite de la viktimoj de la drominta ŝipo «Principe de Asturias». La altruista agado de tiu societo havigis al ĝi ĝeneralaĵn laŭdojn.

—La 24^{aa} de Aprilo la grupanoj de *Lomón* el Terrassa veturis al Barcelona por efektiviĝi kun la barcelonaj samideanoj la tre interesajn vizitojn al la Arta kaj Arĥeologia Muzeo kaj al la konstruata templo de la Plejsankta Familio. Je la 10^a matene akceptis ilin ĉe la stacidomo multe da enurbaj esperantistoj, kune kun du urbaj gvardianoj deĵorantaj sub dispono de la esperantistoj laŭ afabla ordono de lia Moŝto la Urbestro. Ĉe la Muzeo bonvenis ilin S-ro Gandia, direktanto de la elkavaĵoj ĉe la antikvega greka urbo Empuries, nome de la Direktoro de la Muzeo. Tiun ĉi oni detale vizitis dum tri horoj; pri la interesaĵoj de ĝi entenataj klarigis unu barcelona samideano ĉe la sekcioj moderna, romarta kaj gotika. Ĉe la salonego kie estas montrataj la trovitaĵoj de Empuries S-ro Gandia plej kompetente klarigis pri ili kaj vekis dankan aplaŭdon, kiam li finis sian improvizitan disertacion. Ĉe la foriro S-ro Grau nome de la vizitintoj dankis la aŭtoritatulojn por la faciligoj donitaj al ni, ebligintaj viziton al Muzeo en tago, kiam ĝi restas fermita al la publiko, kio la viziton faris plej interesa.

Post la tagmanĝo, kiun partoprenis gesamideanoj de ambaŭ urboj, ili kunigis en la *Barcelona Hejmo* tre grandanombre. Je la kvara posttagmeze komenciĝis la vizito ĉe la arta konstruaĵo, kia estas la templo de Plejsankta Familio. La eminenta arĥitektaristo S-ro Gaudí kompleze klarigis pri la detaloj de la ŝtona verko, kaj oni vere miris admirante la belecon de tiu unika konstruaĵo. Oni suprenlevis sin ĝis la pinto de la flankaj turoj, kiuj jam atingas altecon 80-metran kaj ĝuste de tie belan panoramon, oni vizitis la kripton, en unu el kies ĉambroj estas admirebla gipsa kompleta projekto de la kolosa konstruaĵo. La alloganta parolo de S-ro Gaudí, kiu poete antaŭvidis genie ĉiujn detalojn, mallongigis la momentojn, kaj tial ĉiuj bedaŭris ke la tempo tiel rapide forpasis deviginte la aliaurbajn samideanojn reveni hejmen, kion ili faris tre kontentaj je la aĝeblege pasigita tago.

BANYOLES. — Mi ricevis de la Direkta Komitato de la K. E. F. la komision travojaĝi kelkajn urbojn vizite al la tieaj samideanoj. La viziton mi komencis la 9^{aa} de Marto ĉe Banyoles, kie en la sidejo de *Esperanta Amikaro* estas

malfermata kurso por junuloj. Mi havis la ĝojon konstati, ke malgraŭ malfacilaj enlokaĵ cirkonstancoj la fervoro de niaj samideanoj ne malvarmiĝis.

OLOT. — La 10, 11^{ma} mi pasigis en Olot, kie mi persone vizitis ĉiujn membrojn de nia Federacio; la 11^{ma} vespere mi faris ĉe *Olota Stelo* raporteton al la ticaj kunvenintoj pri la nuna movado kaj stato de Esperanto tra la tuta mondo. La grupo travivas nuntempe malfacilan momenton pro malsaneco de ĝia entuziasma prezidanto S-ro Garganta kaj premanta okupado de la kunhelpantoj. Ni esperas, ke ĝi povos tamen revigligi kaj reokupi denove pioniran rangon inter la kataluna gruparo. Enurbaj gazetoj publikigis, kvankam mallongajn, notojn pri la raporto kaj vizito.

GERONA. — La 12^{ma} de Marto okazis la propaganda festo, kiun organizis kune *Gerona Espero* kaj la seminaria grupo *Studenta Juneco*. Ĝi havis la merititan sukceson respondantan al la preparado lerte farita per dissendo de interesaj invitiloj pere de la enurbaj ĵurnaloj, kaj per poŝte senditaj personaj invitiloj al ĉirkaŭ 200 rimarkindaj personoj.

La festo okazis en la atendo-salono de la «Cefa Teatro», kiun helpeme cedis la Urbkonsilantaro. Ĝi komenciĝis akurate je la 6^a posttagmeze sub la prezido de S-ro Ibañez, vicurbestro, kiu anstataŭis la urbestron, kontraŭ sia volo ne povintan, laŭ anoncite, prezidi ĝin. Al ĉeestantaro multenombra (pli ol 300 personoj) kaj distinginda, mi parolis katalune dum pli ol unu horo pri «*La faktoj konfirmanĵ nian teorion. Esperanto praktika. Ĝiaj uzadoj dum la Milito*», kaj ĉe la fino mi havis la plezuron aŭskulti aplaŭdodon ne al mi, sed al la neatenditaj de la plejmulto faktoj kaj rezonoj pravigantaj nian agadon kaj esperon. S-ro Ibañez fermis la feston per dankaj vortoj kaj la organizintoj ricevis gratulojn pro la kuraĝiga sukceso. La 13^{ma} posttagmeze en la sidejo de *Gerona Espero* mi kunsidis kun la tuta entuziasma geanaro, kaj mi ĝojis, sciigante ke en la seminario la grupo esperantista kunigas pli ol sesdek lernantojn kaj kelke da latedranoj danke al la klopodo, inter la lastaj, de D-ro Casanovas profesoro de latina lingvo kaj, inter la unuaj, de S-ro Joaquim Costa, la agema esperantisto, kiu sukcesis vekti en kelkaj lernantoj de la Instituto por instruistoj la deziron jam efektivigatan lerni nian lingvon. Ni do esperu bonegajn fruktojn, kiam tiuj lernantoj, fariĝinte pastroj aŭ instruistoj, semos en siaj urboj, vilaĝoj, restadejoj, la ĝermoj de nia lingvo.

Ĉiuj enurbaj ĵurnaloj longe raportis, precipe «*El Norte*» kiu antaŭ la parolado aperigis tre bone verditan de neesperantista redaktoro favoran artikolon. Mi petas ĉiujn samideanojn, ke ili danku la penon de la ĝeronaj esperantistoj, kiuj sciis tiel bonege aranĝi la propagandon, post kiu estis malfermata kurso publika kun kontentiga rezulto.

PALAFRUGELL. — Malgraŭ la krizo de laboro reganta la tutan regionon Emporda'on, la geanoj de *Pazo kaj Aro* preparis la okazigon de propaganda parolado ĉe societo «*Ateneo*», kiun mi faris la 14^{ma} je la 8^a vespere. Malgraŭ tio, ke en la urbo okazis parolado publika pri sociaj aferoj, honoris min per atenta aŭs-

kultado ĉirkaŭ cento de personoj, inter kiuj (same kiel en Ĝerono) estis multe da sinjorinoj. Mi parolis proksimume unu horon, rakontante pri la stato de Esperanto en la tuta mondo, montrante unu ekzempleron de ĉiu el la aperantaj gazetoj esperantistaj kaj de ĉiuj primilitaj eldonaĵoj. La prezidanto de «Ateneo» esprimis sian dankon al la esperantista grupo, kiu havigis al la ateneanoj la, de li tiel nomatan, interesan paroladon.

SAN FELIU DE GUIXOLS. — La 15^a de Marto mi pasigis inter la membroj de *Fratesco* kun kiuj je la 9^a vespere mi kunsidis en la grupa sidejo, kvankam en St. Feliu la krizo estas pli multe sentata ol en Palafrugell; tridekelkelko de esperantistoj kunvenis kaj mi raportis antaŭ ili pri militaj uzadoj de nia lingvo. La grupo malfermis baldaŭ novan kurson, ĉar ĝi povas bone funkciadi, tial ke la entuziasmo de ĉiuj konserviĝas vigle.

Ni havis la plezuron kune kun nia diligenta delegito de K. E. F. S-ro Blanch Vendrell, prezenti miajn respektojn al S-ro Salvador Albert, parlamenta deputito, tiom da fojoj montrinta sin favora kaj fervora partiano de Esperanto. Ankaŭ mi kun ĝojo salutis la ĉerman Reĝimon de niaj IV^a Floraj Ludoj F-inon Rosa Batet, kaj lian distingindan patron, de l' popolo amatan fabrikiiston. Ni rememoris la aĝablajn momentojn de la V^a Kongreso de K. E. F., kion ankaŭ mi faris kun S-ro Durán, la tiama urbestro. Mi povis konstati, kiel utile efikas niaj ĉiujaraj festoj prezentantaj per alloga evidenteco la kialojn de nia entuziasmo kaj la efektivan valoron de nia ideo.

CASSÀ DE LA SELVA. — *Lernejo kaj mangajejo*, la simbola nomo, kuniĝas en tiu vilaĝo, tamen grava, malmultajn, kvin samideanojn sub la prezido de S-ro Rich i Bosch, kies kvinjara nevo balbutas ĉarme nian lingvon. Mi interparolis pri esperantaj aferoj kun ili ĉiuj, kaj poste kun S-roj Joán Pica kaj Leandre Bosacomas, instruistoj de «Escuela Cervantista», kiuj baldaŭ komencos instrui Esperanton al la knaboj de ili edukataj. Tiu rezulto de sia propagando devas fierigi la samideanojn de Cassà, kiuj cetere ne estas el la malplej entuziasmaj. Ilin mi adiaŭis posttagmeze veturante ree al Ĝerono, kie mi restis kun la samideanoj ĝis la sekvinta tago, kiam mi veturis al

SANTA COLOMA DE FARNÈS. — Tiu nomo vekas tuj rememoron pri la kuraĝa kaj entuziasma samideano S-ro Petro Costa, prokuroro, kiu estas la animo de *Esperanta Idealo*. Vesperon de la 17^a mi kunsidis kun la gegrupanoj kaj mi havis la plezuron ĝui ilian bonan esperantan paroladon. Interŝanĝe mi rakontis al ili, ankoraŭ unu fojon dum mia vojaĝo, pri nia lingvo kaj ĝia spita vivado kaj utileco en la nuntempo.

La 18^a antaŭ mia forveturo posttagmeze mi denove restis kun la esperantistoj, kiuj formas grandanbieran aron proporcie al la graveco de la vilaĝo.

Mi revenis al Barcelono kuraĝigita de la spertoj, kiujn la vojaĝo liveris al mi. Se ie la movado malvigligiĝis, tamen la individua fervoro estas varma kaj en plej multe da okazoj mankas nur malgranda helpo de ekstere por rebruligi forte la varmon de l'entuziasmo. Mi ĉerpis la konvinkon, ke estas necese pli

kaj pli multe kunrilatigi inter si ĉiujn esperantistarojn tra la tuta lando kaj por tio, mi proponis al ĉiuj vizititaj samideanoj la helpon de la Federacio, kiu ja estas nur la rezulto de l' kunigo de la izolitaj fortoj. Unu, kaj ne la malplej grava konstato, estas jena: en multaj lokoj, kie la esperantistaj societoj ekzistas de antaŭ kelke da jaroj, aperis kaj malaperis en tiu intertempo iom da sportaj, kulturaj, politikaj aŭ sociaj organizaĵoj. Se ties ideoj senrifuze, ne-kontraŭstare, akceptataj de la tuta loĝantaro ne povis sukcese subteni la respektivajn specialajn societojn, nia ideo, kiu kontraŭ malvarmo, indiferento kaj eĉ malfavoro tenas (kaj ie tre firme) niajn anarojn, havas vere altan valoron.

Al ĉiuj samideanoj, kiuj regalis min kaj plejagrabligis al mi ĉiun momenton, mi prezentas la senceremonian koran esprimon de mia profunda danko por la ricevitaj afablaĵoj. — *Josep Grau.*

MOLINS DE REI. — La 26^{ma} de Marto ni havis la plezuron saluti kelkajn anojn el *Barcelona Stelo*, kiuj ekskurse vizitis nian grupon, kies viziton dankas ĉiuj esperantistoj de *Stelanoj*. — *Korespondanto.*

PALMA DE MALLORCA. — En la lasta ĝenerala kunsido okazinta ĉe *Esperantista klubo Palma* oni elektis por la postenoj de Prezidanto, Sekretario, Kasisto kaj Voĉdonantoj, S-rojn B. Planas, N. Bofill, J. Lladó, J. Aguiló kaj F. Barceló. La Direktanta Komitato de la nomita Grupo decidis aljuĝi, kiam finiĝos la nuna kurso, monpremiojn kaj diplomojn al la grupanoj, kiuj pruvos scii plibone Esperanton. — *Korespondanto.*

ZARAGOZA. — La 3^a de Marto ĉe la sidejo de *Fraterno* okazis, kun ĉeesto de kvindek esperantistoj, inter kiuj kelkaj aliurbaĵ, el Pina, Alcañiz, Albarra-cia kaj Barbastro, kunsido, kiun prezidis S-ro Benigno de Luna.

La kunsido decidis unuanime en reprezento de ĉiuj grupoj en Aragon:

1.^o Starigi la *Aragona Esperantista Federacio*'n.

2.^o Aliĝi al la HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO.

3.^o Elekti provizoran Komitaton de la Federacio, kies prezidanto estos S-ro Manuel Maynar.

4.^o Ĉeesti oficiale la Kongreson en Reus, por kio poste S-ro de Luna vizitis la esperantistojn de Reus kaj Barcelona.

La helpo, kiun la *Aragona Federacio* alportas al la H. E. K. estas ja valora, ĉar ĝi krom multaj kuraĝaj esperantistoj entenas kelkajn entuziasmajn pionirojn, kies pruvita sinferemo fruktigos certe la komunan laboron.

Estu ĉi tie dirite al la nova kunbatalanta anaro: Plej koran bonvenon!

BILBAO. — Ni donas ĉi sube la koncizan paroladon de S-ro Félix Díez en la lasta kunsido de la BASKA ESPERANTA FEDERACIO okazinta en Bilbao.

«Samideanoj:

Devigata paroli kelkajn vortojn pri la agado de la «Baska Esperanta Federacio» mi salutas vin tutkore okaze de la anua ĝenerala kunsido, dezirante

ke vi ĉiuj alportu grandan kvanton da entuziasmo por nia afero, kiu nun travivas malfacilan epokon, kiel ĉiuj noblaj idealoj.

Nia Federacio naskiĝis meze de la doloro, la dekonuan de aprilo de la pasinta jaro. La Grupo Esperantista de Bilbao, Grupo Esperantista Socialista, Grupo de Barakaldo kaj tiu de la Arboleda kuniĝis por laboradi samcele.

Nia elektita prezidanto, S-ro Hita suferadas la sekvojn de la militado kaj mi profitas ĉi tiun okazon por danki lin je la nomo de la Federacio, tial ke li ĝis lasta por li ebla momento dediĉis siajn fortojn al la propagando de nia sankta Esperantismo.

La cirkonstancoj ne permesis agadi laŭ estis nia intenco, tamen oni realigis diversajn aferetojn, kiuj helpas sendube prepari estontajn brilajn tagojn.

Oni disdonis foliojn inter amantoj de Esperanto, kiuj ne apartenas al iu grupo, por ke ili fariĝu anoj de la Federacio.

La 19^{da} aŭgusto okazis ekskurso al Barakaldo, kie paroladis S-ro Ed. Kühn el Bohemujo, pri sia vojaĝo tra Francujo dum la militado kaj la sekretario de nia Federacio pri la esperanta problemo, hispane kaj esperante.

S-ro Kühn estas unu el la plej bonaj esperantistoj, ni ĉiuj entuziasme aŭdis lian belsonan kaj perfektan paroladon, tial oni invitis lin paroladi en Grupo Esperantista Socialista kaj en la Grupo Esperantista de Bilbao.

Sed la ĉefan parton de nia laborado estis farita de nia ĉiama, konstanta fervorega samideano S-ro Victor O. Allende, kiu atingis ke la tre bone eldonata revuo KATALUNA ESPERANTISTO estu la organo de nia federacio, kaj tiamaniere, sinjoroj, tiu revuo kunigas la du ĉefajn hispanajn federaciojn: la katalunan kaj la baskan, ambaŭ apartenantajn al plej gravaj regionoj de nia duoninsulo.

La modesteco de S-ro Allende ne permesas, ke mi tre laŭte laŭdu lin, kaj mi dirus tre volonte kiom li helpis nian aferon, tial mi dankas lin tutkore je via nomo, kaj mi certigas al vi senkaŝe: S-ro Allende estas la kolono de nia sankta idealo en Vizkaja.

Ree mi profitas la okazon por konsili al vi ĉiuj, karaj samideanoj, por la disvastigo de nia plej amata esperantismo, ke kie ajn vi promenados, kie ajn vi troviĝos, parolu ĉiam esperante, parolu ĉiam pri Esperanto kun viaj amikoj kaj... amikinoj, propagandadu nian ideon ĉie kaj ĉiel, por ke baldaŭ nia stelo rebrilu plej glorie kaj tiel fari malamikiteco de la nacioj.

Kuraĝe antaŭen!

TARRAGONA. — La grupanoj de *Tarragona Esperanta* faris la 2^{da} de Aprilo bonan propagandon okaze de teatra festo ĉe «Unión Agrícola». Oni ludis teatraĵojn naciajn kaj estis legataj internaciaj versaĵoj. Paroladis al la ĉeestantoj pri nia lingvo, S-roj Vidal, kiu prezidis, Alegret kaj Obiol; ili ĉiuj ricevis varmajn aplaŭdojn. Entute, la festo estis sukcesa kaj tre agrabla.

REUS. — La 5^{da} de Majo aperis la ĝeneraj ĵurnaloj «Fomento» «Diario de Reus» kaj «Las Circunstancias» kun unu tuta granda paĝo la du lastaj, kun du paĝoj la unua, plenaj de artikoloj propagandaj verkita de S-roj Agnadé, Vallvé kaj Simó, apud valoregaj opinioj favoraj al Esperanto de Pi i Margall, Xenius

Grafo Hayashi k. c., kaj granda anonco pri la publika parolado, kien vespere je la naŭa faros ĉe la Oficiala Komerca Ĉambro S-ro Josep Grau.

Siaflanke la prezidanto de la Ĉambro, S-ro Boqué, dissendis milon de afablaj invitiloj ĉeesti tiun propagandon preparantan la okazigon de la Kongreso de H. E. K. kaj de K. E. F.

Ne strange, ke la salono de la Komerca Ĉambro pleniĝis vespere de distinginda personaro, el kiu estas citindaĵ kelke da provincaj deputitoj kaj urbkonsilantoj, S-ro Vidiella prezidanto de la Provinca Deputitaro de Tarragona, la korespondantoj de ĉiuj barcelonaj ĵurnaloj kaj multaj komercistoj.

S-ro Boqué, prezidanto de K. Ĉ. cedis la parolon al S-ro Grau, kiu disertaciis ĉirkaŭ 90 minutoj pri la rolo de Esperanto en internaciaj ĉiuspecaj rilatoj, ĝia eventuala utileco en la eŭropa milito kaj pri la signifo de la okazontaj Kongresoj. La flua kaj konvinka parolo de nia pioniro havigis al li grandan aplaŭdodon, post kiu S-ro Boqué dankis la parolinton kaj la ĉeestantojn por ilia helpo al sukceso de l' festo.

S-ro Grau ricevis multe da gratuloj kaj, kio estas plej signifa, li estis ankorau duonhoron aŭskultata de preskaŭ duono de la ĉeestantaro post kiam li forlasis la tribunan. Li respondis kelke da scivolaĵaj demandoj kaj diris novajn argumentojn poresperantajn. Fine la Komerca Ĉambro regalis la paroladinton kaj la esperantistojn per lunĉeto.

La enurbaj ĵurnaloj raportis longe kaj la barcelonaj publikigis ĝustajn raportojn pri tiu sukcesa parolado.

Dum sia restado ĉe ni S-ro Grau vizitis ĉiujn aŭtoritatulojn kaj la salonojn kaj societojn, kie havos lokon la kongresaj solenoj, kiujn la Reus'anoj jam atendas kun intereso. — *Korespondanto.*

POST KELKE DA TAGOJ APEROS

SUPLEMENTO KUN ILUSTRAĴOJ

Bildoj el Reus, hortabelo de vagonaroj, verdikto de l' Floraj Ludoj, lastaj kongresaj sciigoj

GARANTIA KAPITALO DE K. E. F.

LISTO DE GARANTIAŬTOJ

Antaŭa sumo : 890 pesetoj. — S-ro Joan B. Iduarte, 5 ptoj.

Por kompletigi la sumon de 1000 pesetoj por la garantia kapitalo fiksitan de nia lasta Kongreso, mankas 105 pesetoj.

La garantia kapitalo estos elspezata nur kiam la propagandaj elspezoj kaŭzus deficiton. Tialanstataŭ tuj pagi la monon, oni subskribas la sumon, kiun oni volas, kaj en okazo de defcito la subskribinto pagus ne la tutan sumon, sed *proporcie* laŭ la monon de li subskribita kaj la defcito pagota.

Ni esperas, do, ke nia samideanaro alhelpos la perfektan funkcion de nia organizacio, subskribante dum la baldaŭaj Kongresoj la malgrandan mankantan sumon, kaj eĉ pli multe.



OFICIALA RUBRIKO

En Komitata kunsido, kiu okazis en la *Barcelona Hejmo* la 7^{aa} Novembro 1915^a, post aprobo de la antaŭaj kunsida kaj kongresa raportoj, oni akceptis la reelekton de la Komitato faritan de la Kongreso en Vilanova.

Atentinte la insistan peton de S-ro Piferrer pri tio, ke oni eksigu lin pro privataj aferoj el la nova Komitato, oni decidis akcepti lian eksigon samtempe bedaŭrante la mankon de lia antaŭa kunlaboro.

Proponon de la firmo «L. Ferreté é hijos y C.^{as}» el Tarragona oni ne akceptas, ĉar la K. E. F. ne povas protekti komercan entreprenon.

Oni decidis noti ke al la komunikoj senditaj de la K. E. F. al la nealiĝintaj grupoj, respondis *Espero Kataluna*, Barcelona; *Aplec Esperanta Grupo*, Sabadell, kaj *Stelanoj*, Molins de Rei.

Krom tio decidigis, peti adreson de ĉiuj lernantoj en la esperantaj kursoj de la grupoj, por sendi al ili senpage ekzempleron el la propaganda folio kun la traduko de «El Rellotge de Sol» kaj vendi tiujn foliojn al la grupoj kiuj dezirus, po 5 centimoj ekzempleron.

Oni aprobis : la elekton de la Organiza Komitato de la proksima Kongreso en Reus faritan de la grupo *Nova Semo*; la daton fiksitan por la okazigo de tiu Kongreso, kiu estos la 11^a kaj 12^a Junio, kaj la elekton de Honora Komitato.

Pri la Hispana Konfederacio estas decidite daŭrigi kiel ĝis nun la laborojn, ĝis kiam estos nomita la Komitato, kiu surprenos la direktan taskon.

La Sekretario, *Josep Ventura*.

LA ORGANIZA KOMITATO DE LA
I^a KONGRESO DE HISPANA ESPERAN-
TISTA KONFEDERACIO KAJ VII^a DE
KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

DUDEK DIVERSAJ
DESEGNAĴOJ
DEK MALSAMAJ
KOLOROJ



EN LINGVOJ KAS-
TILA, KATALUNA
KAJ ESPERANTO

ELDONIS SERION DE PROPAGANDAJ
MARKOJ, VENDATAJ PO 1 CENTIMO
ĈIU, EN FOLIOJ DE 20 MARKOJ, PRO-
FITE AL LA KONGRESA KASO

SAMIDEAĴOJ, HELPU PER TIU RIMEDO
LA SUKCESON DE LA ORGANIZADO!

KOLEKTANTOJ, RAPIDU AKIRI LA
INTERESAN KOLEKTON!

**SOCIETOJ KAJ GRUPOJ ALIGINTAJ AL LA
KATALUNA-ESPERANTISTA FEDERACIO AŬ
ABONINTAJ AL KATALUNA ESPERANTISTO**

Almería	Esperantista Grupo	Almácharas de Mac Murray
Argentera	Esperanta Tarragon-Provincia Ligo	
Bahía Blanca (R. Argentina)	Ateneo Esperantista	Patagones, 8
Banyoles	Esperanta Amikaro	Café del Comerç
Baracaldo	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Barbará del Vallès	Esperanta Nesto	
Barcelona	Barcelona Stelo	Marquès del Duero, 88
	Çiam Antaŭen	Poblet, 25
	Esperanta Fakto C. A. de D.	Rambla Santa Mònica, 25
	Esperanto kaj Patrujo	Sant Simplicí, 6
	Fervojista Stelo	Prigecsa, 50, pral.
	La Rondo	Provença, 156
	Libera Stelo	Muntanya, 61
	Libero	Mercaders, 25
	Nova Sento	Enna, 151
	Semo (A. E. P.)	Carme, 30
	Universala Frateco	
	Inst. por vulgarigo de l' Esp. Gaz.	Peu de la Creu, 10
	Unio Catalanista	Canada, 14, pral.
Bilbao	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
	Esperantista Grupo Socialista (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Buenos Aires (R. Argentina)	Casal Català	S. Juan, 782
Calafell	Laboro kaj Kulturo	Pou, 2
Cassà de la Selva	Lernejo kaj Manglejo	
Falset	Priorata Stelo	
Girona	Gerona Espero	L. Cambra de Comerç
	Gerona-provincia Esperantista Ligo	Pda. St. Domingo, 2, pral.
	Studenta Juneco	Seminari
La Arboleda	Esperantista Grupo (<i>El Baska Esp. Fed.</i>)	
Madrid	Grupo Esperantista	Reloj, 8, 3 ^a
Manlleu	Esperantista Amikeco	Pont, 38
Martorell	Martorellja Stelo	Independencia, 6
Mieras	Esperanta Fervoro	
Molins de Rei	Stelanoj	Sant Miquel 14
Mollet	Vojantaŭen	Soc. La Aliança
Moskvo (Rusujo)	Esperantista Societo	Lubjanskij pr., 3
Murcia	Esperantista Grupo	Sociedad, 14
Olot	Olotja Stelo	Biblioteka Popular
Palafrugell	Paco kaj Amo	Unio, 2
Palma de Mallorca	Esperantista Klubo	Misión, 5, 1 ^a
Reus	Nova Semo	Majors, 15
Rubi	Esperanta Burgono	
Sabadell	«Aplech» Esperanta Grupo	Via Massagué, 55
	Esperanta Semo	
	Frateco	Caymó, 32
Sant Feliu de Guixols	Homara Fratigilo	Serrallonga, 8
Sant Vicens de Torelló	Esperanta Idealo	
Santa Coloma de Farnés	Kamparo	
Sta. Perpétua de la Moguda	Esperantista Grupo	Económica de A. del País
Sevilla	Tarragono Esperanta	Sant Agustí, 4, 2 ^a
Tarragona	Lumon	Nord, 26
Terrasa	Nova Harmonio	Nova, 74
Torelló	Frateco	Dr. Murillo, 12
Vendrell	Flugila Penso	
Ventalló	Vika Esperantistaro	S. Hipòlit, 14
Vich	Laboro Esperanta	Sant Antoni, 1 i 3
Vilanova i Geltrú	Frateco	Luna, 9
Zaragoza		

KATALUNA ESPERANTISTO

Monata Esperanta Gazeto

JARO VII^a : NOVEMBRO - DECEMBRO 1916

6-7

La Movado en Usono ĉiam progresas!

AMERIKA ESPERANTISTO

Oficiala Organo de la Esperanta Asocio de Norda Ameriko,
montras al vi

KIAL — KIE — KIOM

(\$ 1.00 JARE EN USONO)

Dum la deviga dormado de tiel multaj Esp. gazetoj:

SPECIALA EKSTERLANDA PREZO NUR Sm. 2.000

(Anstataŭ Sm. 2.500)

MENDU NUN — UNUA NUMERO SENPAGE!

The American Esperantist Co., Inc.

West Newton, Mass., Usono



Nia devizo: *Mora estas gataro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio,

DE Baska Esperanta Federacio KAJ

DE Aragona Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio:
Diputació, 280 : Barcelona

Al Niaj Legantoj

KVANKAM multaj el vi kredeble pensis jam pri morto de KATALUNA ESPERANTISTO, malesperante pri ĝia reapero, jen ĝi denove en sia iama posteno kun la sama entuziasmo, kun la sama fervoro kaj forta antaŭa volo, preta kiel ĉiam progandadi la internacian lingvon subtenante kaj plifortigante la viklecon de nia movado en la kataluna lando; ne nur ĝi ne estas mortinta, sed kontraŭe ĝi pretiĝas, post kelkaj monatoj de ripozo, ankoraŭ pli multe labori por Esperanto, pliintensigante se eble siajn ĝisnunajn klopodojn. Dum tiu tempo kiam nia gazeto ne povis aperi, ni ricevis el ĉiuj partoj de nia lando leterojn kaj komunikaĵojn kiuj montras la grandan intereson kiun ĉiuj katalunaj grupoj sentas por la funkciado de la K. E. F., ili provas al ni ke ni ne estas solaj en nia laborado kaj ke ĉiu estas preta helpi laŭ mezuro de siaj respektivaj kapabloj al la komune farata laboro. Ni firme esperas, do, ke nun kiam la gazeto povas denove reapari kun reguleco kaj akurateco ne mankos al ni la helpemo de ĉiuj katalunaj samideanoj, sed ĉiu penos kiel ni mem por la restarigo de la antaŭa stato.

Necese estas ke la fajro de l' entuziasmo por la internacilingva idealo ne estingu en nia lando, sed ni konservu kaj pligrandigu

ĝin ankoraŭ; dum tiu milita tempo kiam en multaj aliaj landoj, preskaŭ en la tuta mondo tiom da niaj samideanoj estas devigataj ne plu okupiĝi pri pacamaj ideoj, ne plu labori kaj agi por la interfratigaj idealoj kaj noblaj aspiroj, kiam la grupoj kaj organizacioj esperantistaj en tiuj landoj trapasas pro la manko de elementoj fortan krizon, ni devas esti, la esperantistaj societoj kaj grupoj en la nemilitantaj nacioj, tiuj kiuj havas kiel ni la feliĉon ne esti trenitaj en la teruran uraganon kiu detruas la plej bonan parton de la homaro, ni devas esti certa kaj firma garantio ke la fervoro kaj vigleco de nia celado ne malvarmiĝis, ke nia samideaneco ne cedis al malpacemaj furiozoj; ni devas konstante kaj senŝancele okupi nian lokon, neniam deflankiĝante, neniam hezitante por ke kiam la malbonaj tempoj finiĝos, kiam la milito kun sia monstra sekvantaro de teruroj, malfeliĉoj kaj malĝojoj ĉesos, tiuj alilandaj samideanoj dum tiuj-ĉi jaroj penegse batalintaj por la plenumo de siaj patrujaj devoj, tiel longe sin nutrintaj per malamaj sentoj, tiuj samcelanoj niaj kies fido al nia movado povus esti ŝanceligita de la tiel longa milita vivado, kaj kiuj eble povus pensi pri nuliĝo kaj detruigo de ĉia pacama, de ĉia nobla interfratiga idealo, ili ĉiuj vidu kaj renkontu en ni la antaŭan fervoron, kaj kuraĝigitaj de nia propra entuziasmo ili pretiĝu denove al la laboro kiu antaŭe estis jam doninta tiel abundajn fruktojn.

Por la efektivigo de tiu-ĉi grava tasko bezonate estas ke ĉiu samideano metu al la servo de nia afero ĉiujn siajn fortojn kaj kapablojn, ĉiujn rimedojn je kiuj li disponas, ke ĉiu esperantisto klopodu laŭ limo de ebleco per tutaj siaj entuziasmo kaj fervoro al la realigo de tiu altcela aspiro; necese estas firme kaj lojale subteni nian organizacion kaj ne ŝpari sian helpon al la enlanda asocio, al K. E. F. kiu tiom faras por la esperanta propagando kaj dank' al kies agado kaj efiko ni povas en granda nombro ĉiujare almiliti unu urbon, ĉeestante festojn tiel belajn kaj plezurigajn kiel la okazigitajn en Reus, kie samtempe ĝojiĝante pri la kunrenkontiĝo kaj konatiĝo de novaj adeptoj oni faras la plej gravan, efikan kaj bonan propagandon.

Ni esperas ke tiu helpo ne mankos al ni kaj fidante al ĝi ni promesas ankaŭ kontribui per la regula kaj ĉiumonata apero de K. E. al tiu antaŭdirita tasko.

Ni ŝuldas, kompreneble, klarigojn al niaj legantoj kial dum kelkaj monatoj nia gazeto ne povis aperi; ili estas tre simplaj: la tuta laboro por la verkado kaj redakto de K. E. pezis preskaŭ ekskluzive sur nia Direktoro, kiu malgraŭ sia bona volo kaj kontraŭ

siaj propraj deziroj, surŝargita en tiu epoko de siaj multaj okupoj kaj profesiaj devoj kiuj lasas al li preskaŭ neniom da libera tempo, ne povis dediĉi kiel antaŭe ĉiujn siajn kapablojn kaj bonvolon al la arango de tiu-ĉi postkongresa numero; aliflanke la granda laboro kiun postulas, laboro kiun sole povas taksi ĝia farinto, la redakto de eksterordinara numero kun tiom da paĝoj kaj ilustrita suplemento kaj kun tio la manko de helpantaj bonvolemluloj, ĉio-ĉi kaŭzis de tago al tago la prokraston en la apero de nia gazeto. Ni scias ke iom malfacile estas al tiuj neniam partoprenintaj redaktan laboron kompreni similan prokraston sed ni esperas ke ĉiu K. E. F.-ano komprenos ke K. E. ne estas ia negocanta firmo, ke tiuj kiuj por ĝi laboras kaj dediĉas sian tutan libertempon tion faras tute sindone kaj senpage, ne atendante alian rekompencan ol la estimon kaj dankon de ĉiuj bonvolemaj samideanoj kaj tion sentinte, ni esperas, ke ili ne ŝatos postuli de la Redakcio pli ol ĝia bona volo mem povas oferedoni.

Feliĉe, per la eniro en la gazeto de novaj fervoruloj kaj per nova arango de la Redakcio, ni esperas esti solvintaj tiun-ĉi problemon kaj kvankam nia kara Direktoro S-ro Grau ne povos kiel ĝis nun tiel aktive partopreni la redaktadon de K. E., tamen sub lia gvidado ni esperas denove repreni la antaŭan laboron kaj firme povas garantii la regulan aperon de nia gazeto.

Al tiu-ĉi laboro, al tiu-ĉi tasko fervore ni nin donos, kun la certeco ke neniam ĉesos apud ni stari la bonvolemo kaj kolegeco de ĉiuj kunfederacianoj.

MARIAN SOLÀ



VII^a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio kaj I^a Kongreso de Hispana Esperantista Konfederacio

Reus : 11, 12, 13 Junio 1916

ALVETURO DE LA KONGRESANOJ

Tiuj kiuj veturis iam al niaj kongresoj, tiuj konas perfekte la specialan senton, miksaĵon de entuziasmo kaj timo, kiu plenigas la korojn de la samideanoj, avidaj, se oni povas tiel adjektivi, ĝui ĝisfunde la kongresajn solenojn, kaj samtempe iom timaj ke tiuj ĉi ne atingos la sukceson kiun por ili la entuziasmo deziras.

Tiu sento malekzistis for de ĉiuj ni, tuj kiam ĉe la alveturo Reus ni ekpaŝis sur la trotuaro de la stacidomo, sur kiu staris kun tiaj samideanoj sufiĉe multaj jam alvenintaj esperantistoj eksterkatalunaj, kiuj rapidis komuniki al ĵus venintoj la antaŭsentojn kaj certigojn pri hela sukceso de la Kongreso.

Kiam je la 10 matene alveturis la ekspresa vagonaro kondukanta ĥan eksceleccon sinjoron Valentí Carulla rektoro de la Universitato Barcelona, speciala delegito de lia moŝto la Ministro de Publika Instruado, kiun salutis ĉiuj eminentaj samideanoj kaj altrangaj personoj lin atendantaj, la aŭguroj efektiviĝis kaj la kongresanaro komencis travivi entuziasme esperigajn momentojn.

ĈE LA URBODOMO

En la granda oficiala laborĉambro de lia moŝto la Urbestro estis prezentitaj al S-ro Carulla la pionirojn de nia movado, kun kiuj li afable parolis pri la efiko de la propagandaj klopodoj en la nunaj malfacilaj tempoj. Kunvenis tie la plej multo el la Urbokonsilantoj, S-ro Direktoro de la Teknika Instituto (Oficiala gimnazio), S-ro Komandanto Milita de Reus, S-ro Vidiella prezidanto de la Provinca Deputitaro de Tarragono, kun aliaj deputitoj, S-ro reprezentanto de la Reus' a Prioro, S-ro Prezidanto de la Komerca Ĉambro, kaj multaj aliaj distingindaj personoj.

En la vasta antaŭĉambro kaj en la atenda salono ne povis en-

teniĝi la amaso de samideanoj, kiuj subite salutis per aplaŭdado la ekparolon de sinjoro Urbestro, kiu deziris per koraj vortoj plej grandan sukceson al la komenciĝanta Kongreso, kaj ĝojas ke li kiel reprezentanto de la progresema urbo povas sin turni al la esperantistoj, amantoj de vera paco kaj progreso.

S-ro Serrat, respondas al li nome de la K. E. F.-anoj, dankante elokvente la akcepton afablan, kiun la urbo faris per la vortoj de sia urbestro al la kongresanoj.

S-ro Maynar, reprezente de la *Aragona Esperantista Federacio* diras ankaŭ kelkajn vortojn de danko kun sia kutima facileco.

Kaj S-ro Perogordo, respondas nome de la restantaj hispanaj esperantistoj per flua parolado esprimante ankaŭ koran dankon al la urbo kaj al la aŭtoritatoj.

Bruantaj aplaŭdadoj sonis post la parolo de la diritaj sinjoroj, kaj tuj poste la kongresanoj manifestacie aliris al SOCIETO Olimpo.

En la riĉa, grandsinjora salono, el la XVIII^a jarcento, de la luksa sidejo de societo Olimpo okazis la solena malfermo de la kongreso. En la prezida loko sidigis ĉirkaŭ la reprezentanto de la Ministro de P. I. la membroj de la Komitato de la K. E. F., la delegitoj de la Aragona Federacio, S-ro Perogordo, S-ro Grau, direktoro de K. E. kaj enurbaj altranguloj.

Fariĝas silente, kaj S-ro Carulla per laŭta, sonora voĉo, en eleganta akademia dirmaniero potencas la aplaŭdodon, kiu lin salutas, kaj aŭdigas de ni esperanteman paroladon, kian certe ne pli bone eldirus malnova samideano. Li rememorigas la Universalajn Kongresojn kaj precipe la Barcelonan kaj esprimas sian ĝojon, ke estis al li difinita la tasko malfermi tiun 1^{an} Kongreson de Hispana Esperantista Konfederacio frukton de tiu serio de katalunaj kongresoj komencita tuj post la V^a Universala. Diversloje la aplaŭdado de la aŭskultantoj interrompas lian paroladon, kaj bruas plej laŭte, kiam espriminte sian esperon ke baldaŭ Esperanto enkondukiĝos en la oficialajn programojn de Instruado, li en nomo de lia alta Moŝto la Reĝo de Hispanujo kaj de lia Moŝto la Ministro de Instruado deklaras malfermitaj la kongresojn de H. E. K. kaj de K. E. F.

S-ro Grau, kiam post la ovacio silento refariĝas, ekstaras kaj en nomo de la katalunaj membroj de K. E. F. katalune esprimas varman dankon al la altaj aŭtoritatoj de Hispanujo, kiuj delegis la eminentan Rektoron de la Barcelona Universitato por veni al nia Festo, malfermi solene la kongresojn. Daŭrigante sian paroladon en kastila lingvo li diras la dankon de la aliaj hispanaj samideanoj, kiujn kontentigos plejmulte la sciigo ke jam en la superaĵ

sferoj de nia lando estas konsiderata nia movado kiel proksima de matureco, preta eniri en la oficialan vivon kiel jam akirita progreso. Kaj sin turnante en esperanto facila kaj flua al la samideanoj, S-ro Grau invitis ilin al konstanta kaj obstina laboro por ke la bonaj deziroj, kaj intencoj esprimitaj de S-ro Carulla efektiviĝu laŭ eble baldaŭ, kion akcelos sendube la firma kunlaborado de ĉiuj samideanoj tra la tuta lando.

La entuziasmaj vortoj de la parolinto vekis fortan kaj longan aplaŭdon, kaj S-ro Carulla forlasis la salonon, adiaŭite per nova aplaŭdado.

S-ro Balsells prezidanto de K. E. F. okupas sian postenon kaj faras paroladeton, per kiu li resume esprimas la dezirojn de la Direkta Komitato, kiujn la federaciaĵoj certe efektivigos, kaj petas la delegitojn de societoj bonvolu prezenti siajn rajtigilojn.

ESPERANTISTA EKSPOZICIO

En unu el la salonegoj de la grava societo «Centre de Lecturas» estis instalita la Esperanta Ekspozicio, sen ia dubo la plej kompleta kaj riĉa el ĉiuj ĝis nun okazintaj en nia lando, ĉies dankon meritas la samideanoj kiuj zorgis pri ĝiaj arango kaj ornamo.

En la centra, larĝa tablo kuŝis amaso da libroj kun siaj ruĝaj kaj verdaj kovriloj, la kolekto de «La Revuo», diverslandaj gramatikoj kaj lernolibroj, ŝlosiloj, niaj plej belaj eldonaĵoj «Albrecht Dürer», «El Parnaso de Popoloj» k. c.; sur unu el la muroj pendis la tuta primilita literaturo en Esperanto, plej efike konvinkanta la vizitantojn pri la vivipovo de nia movado eĉ dum la malpacaj tempoj; ceterajn murojn ornamis granda nombro da poŝtkartoj el plej diversaj landoj ricevitaj, kaj kolektoj de gazetoj, jurnaloj kaj revuoj esperante verkitaĵ.

En la enirejo de l' ekspozicio oni disvendis ankaŭ lernolibrojn, ŝlosilojn kaj la verkon pri Cervantes eldonitan de la Madrid' a Grupo Esperantista.



VI^a Internaciaj Floraj Ludoj

NIA ĉiujara Literatura Festo, kiu estas ĉiam la plej riĉa kaj luksa ornamo de la kongresaj tagoj, prezentigis dum nia VII^a Kongreso se eble kun pli eksterordinaraj brilo kaj belegeco; la grandega teatro Circo arte ornamita per verdaj girlandoj kaj plej diverskoloraj floroj estis jam je la kvara kaj duono plenega de esperantistoj kaj Reus' anoj avidaj ĝui la ĉarmon de nia granda festo kaj aplaŭdi la verkojn de niaj esperantaj poetoj kaj prozistoj; la luksa teatro prezentis duonhoron antaŭ la komenco de la festo plej brilan kaj agrablan aspekton; eĉ ne unu sidloko restis neokupita en la vasta partero dum ankoraŭ tra la enirpordo penetris sennombra amaso da alestantoj; la loĝiojn okupis la plej gravaj kaj distingindaj familioj de la urbo kaj tiel same la du etaĝojn kiel la parteron plenigis amaso da gesinoroj kaj ĝentilaj fraŭlinoj kun riĉaj kaj elegantaj vestoj diskutantaj kaj parolantaj inter si pri la tuj okazonta soleno; la konfuza, amasa kaj gaja murmuro de la interniksitaj konversacioj ĝojigis kaj donis specialan ĉarmon al la teatra salonego.

Subite fariĝas impona silento kaj tra la centra pasejo suriras la scenejon vico de aŭtoritatuloj; brua aplaŭdado ekaŭdiĝas kiam ili prenas siajn respektivajn lokojn apud la Reĝina Trono; dekstre sidas la Juĝintaro kaj la membroj de la Konservantaro de la Floraj Ludoj, artileria komandanto S-ro Perogordo, F-inoj Eularia kaj Teresa Rosell, S-roj Terricabras, Ventura, Balcells, Pellicer, Aguadé, Bremón, Galcerán k. a., maldekstre la urbaj aŭtoritatuloj, urbestro S-ro Manuel Sardà, prezidanto de la Provinca Deputitaro S-ro Vidiella, Arĥipresto Pastro Garravé, provincaj deputitoj S-roj Alimbau kaj Borrell, prezidanto de la Komerca Ĉambro S-ro Boqué, en reprezento de la Teknika kaj Generala Instituto, S-ro Cabré kaj urbkonsilantoj S-roj López, Sagalà, Magriñà, Massó, Clivillés, Balagué kaj Jordana.

Tuj poste Lia Urbestra Moŝto diras en Esperanto la malferman frazon: «Oni malfermas la feston». Ĉies okuloj direktiĝas al la scenejo kie la Sekretario de la Juĝintaro stariginte, meze de religia silento kaj sciavida atentemo de la ĉeestantaro per klara kaj laŭta voĉo eklegas sian bonege verkitan raporton:

SinJORinoj kaj SinJoroj:

Estas tre granda plezuro por mi, vidi kiel bele ekfloras en la nunaj dolĉaj momentoj de festo por la okuloj kaj la koro, la brila soleno de niaj VI^a Internaciaj Floraj Ludoj, tiel karesata kaj dorlotata de niaj revoj dum la proza tempo de la luktoj kun la amara realeco de nia vivo.

El la parfumplenaj floroj de poezio aperintaj la nunan jaron ĉe la enlanda ĝardeno de nia literaturo, ni plektis por vi girlandon, al kiu ni aldonis florojn el la eksterlanda ĝardeno. Mi petas, akceptu ĝin, almenaŭ kun la samaj iluzio kaj entuziasmo kiuj gvidis nin dum ilia traserĉo por prezento. Vi trovos en ĝi unu floron, unu verkon, la plej delikatan, kies koloroj kaj parfumo kaptis al ni la koron kaj gajnis super ĉiuj aliaj verkoj la plej honoran premion el la Ludoj.

GesinJoroj: Ni proklamu do, kaj aklamu, kiel meritas, la nomon de la feliĉa poeto laŭreata per la Natura Floro, kiu estas S-ro **Artur Domènech Mas** el Barcelono. Li elektis por Reĝino de nia Festo la belan fraŭlinon **Lola Alimbau**, al kiu li proponas la floran sceptron, signo de venko. Popolo el Reus, ni, esperantistoj, niajn plej respektajn riverencojn ni ne ŝparu al Ŝia Reĝina Moŝto kiel esprimon de l' admiro kiun ni devas atesti al ŝi kaj al ŝia Princina Sekvantaro en la alta loko kiun ili okuposa.

La laŭreata poeto, salutata per varma kaj longedaŭra aplaŭzado, suriras la scenejon kaj ricevas de manoj de S-ro Perogordo la Naturan Floron, belega florbukedo kun silka verda rubando kun oraj literoj; kaj tuj kune kun la poeto forlasas la scenejon la Juĝantaro kaj Aŭtoritatuloj por proponi al Ŝia Reĝina Moŝto la prezidan lokon.

Unumove starigas la tuta ĉeestantaro kaj per brua, resonanta aklamado salutas la enirantan Reĝinon kiu je brako de l' poeto kaj laŭ la majestaj akordoj de la solena marŝo de Tanhaüser ludata de la urba muzikistaro, iras sidiĝi en sia splendida trono, sekvata de sia brila Kortego de Amo, kiu konsistigas la ĝentilaj kaj elegantaj fraŭlinoj **Lola Mayner**, **Teresa Grau**, **Maria Teresa Font de Rubinat**, **Joaquina Soler**, **Virginia Mata**, **Maria Musté**, **Rosita Aguadé** kaj **Paquita Salas**; ilin akompanas brako ĉe brako la membroj de l' Juĝantaro kaj de la Konservantaro. La beleco de ĉiuj Korteganinoj kaj la lukso kaj brilo de iliaj tualetoj kaj vestoj vekas ĉies admiron, sed ĉio estas pala antaŭ la riĉa heleco kaj eleganta vestaĵo de la Reĝino Fraŭlino **Lola Alimbau**; ŝia luksega blanka mantelo kun

oraj ornamoj, la multekosta kolĉeno kiu brilas sur ŝia brusto kaj precipe ŝia rava figuro kaj eksterordinara beleco kaŭzas la miron de ĉiuj ĉeestantoj. Post kiam Ŝia Reĝina Moŝto sidigis sur sia alta kaj honora trono, arte ornamita kaj hele lumigita, kiu meze de la scenejo per floroj kaj verdaĵoj prezentas plej belaspektan vidon, por kio ricevis merititajn laŭdojn nia samideano S-ro Alsina zorginta pri la teatromamado, post kiam la Korteganinoj, Juĝintoj kaj Aŭtoritatuloj okupas siajn respektivajn sidlokojn, ĉesas la aklamoj kaj murmuroj de la ĉeestantaro kaj la Sekretario S-ro Ventura alpaŝas al la tribuno kaj kun firma voĉo reprenas la legadon de sia raporto:

Reĝina Moŝto,
Reĝina Kortego,

Plej koran saluton al vi, por la granda honoro kiun vi faris al ni kaj al nia poezia festo, akceptante ĝin prezidi per viaj ĉarmoj kaj beleco neniam sufiĉe laŭdataj de miaj senpovaj vortoj. Via nobla gesto tiel tuŝis niajn altajn sentojn, ke ĝi vivos tra la tempoj en nia koro kaj en nia penso kune kun nia plej sincera parole neespri-mebla danko.

Ekscelencaj Sinjoroj,
Sinjorinoj,
Sinjoroj,

Fortan impreson kaŭzis en mi la nerifuzebla decido de la Konservantaro de la Floraj Ludoj, elektante min al la ofico de Sekretario de la nunaj, kies fakto tre honora vidigis al mi kiel terura estas la vero pri la devo kaj la povo. Inter la devo kaj la povo ekzistas tiel longa spaco, tiel senfunda abismo kaj momenta intriga ĝojo, ke mi bezonis fortojn por elporti tiun decidan kaj ne fari ion alian ol akcepti kaj min doni plene al la volo de l' hazardo.

Poste, kiam la alvoko estis publikigita kaj la verkoj flualvenis, kiom da nepriskribebla ĝuo mi sentis ĉe l' unua ekgustumo de ĉiu el ili, vidante en kelkaj, certe tre malmultaj, kaj sub la anonimeco de l' konkurso la nespartan manon de fervorulo kiu febre verkas en la deziro plialtigi nian lingvon kaj nian literaturon. Kaj tiu fakto estas tiel rimarkinda, se ni konsideras ke eĉ eminentuloj en nia beletristiko pasis tra tiu grado de fervoro antaŭanonco de pli bonaj tempoj.

Verkojn ni ricevis kiuj per si solaj faras la sukceson de nia Konkurso. Permesu do, ke ni laŭvice konigu, trastudante iliajn ver-

kojn, la nomojn de la elektitoj triumfintaj en la spirita lukto al kiu ni ilin invitis. Jen ili:

ORDINARAJ TEMOJ

Ne tre granda estas la nombro de la verkoj ricevitaj por la unua ordinara temo: originala versaĵo pri amo. La Juĝantaro ilin ekzameninte unuanime elektis por premio la verkon n.^o 57^a «En Krepusko» devizita: «La mar' estas poeto de la kreitar'». Ĝi estas lirika, flua versaĵo, kies fundo tre bela kaj alloga la priskribo, tuj altiris niajn atenton kaj estimon. La aŭtoro de tiu verko, enamita en la majestatan harmonian formon de la hispanaj deĉunusilabaj versoj, tiel riĉaj je ritmoj, per kiuj tiom da geniaj aŭtoroj aŭdigis siajn sublimajn kreaĵojn, trafe ĝin uzis en la sia verkante ĝin en kvarversaj strofoj kies versoj alterne akcentigas kaj alprenante la unuan hispanan formon kiu ricevas iktojn sur la 6^a kaj 10^a silaboj. Krom tio ke dufoje asonancas la unua kaj tria versoj kun la dua kaj kvara, mi povas diri ke ĝiaj rimoj estas perfektaj forestante la malbonsonaj sufiksaj kaj participaj.

Ĉar tiu versaĵo estas la plej bona el la verkoj distingitaj per ordinaraĵ premioj, ni aljuĝis al ĝi la Naturan Floron.

Ĝia aŭtoro estas S-ro Artur Doménech Mas el Barcelono.

Brua aplaŭdo eksonas kiam la premiita poeto starigas kaj antaŭeniras por deklami sian majstran verkon; fariĝas silento kaj S-ro Doménech legas per klara kaj emocia voĉo:

El Krepusko

(Vesperkanto de maristo)

DEVIZO: *La mar' estas poeto de la kreitar'*

Vi venu, karulin', mia boato
kun ornamar' de fest' atendas nin...
ĝi ŝajnas, la boat', sur la marplato,
belornamita trono de diin'.

Sur tia tron' sidigu, kaj ekvidos
Venus' konkurantinon sur ondar';
ĉar fiŝoj, ondoj, mevoj tuj rapidos
aklami vin reĝino de la mar'.

Kaj vi estos reĝin', mi vasal' via,
la fiŝoj korteganoj, la siren'

paĝi', kaj de ĉiel' la blumagia
arkaĵo, stelbrilanta baldaken'.

De l' sunsubiro kiam la ruĝhelo
brullumos trans la mont' kiel ruben',
ni sur mar' ruĝa, sub ruĝa ĉielo,
tra l' via regn' kuniros en promen'.

De l' ondoj malkvietaj respektplene
lulantaj nin tra la murmur-akord',
alportos marventet' al ni serene
la malproksimajn bruojn de l' marbord'.

Kaj dume la boat', de l' vent' ŝovita,
nin enkondukos mezen de l' lazur',
kaj tie, for de l' mondo hipokrita,
mi vin kaj vi min amos, ho plezur'!

En la kvietosilento de la maro,
de la ĉiel-lazur' sub la majest',
de kisoj, de karesoj la nektaro
dolĉigos nian amon sen atest'.

Kaj tiam en ĉiel' la steloj brilaj
pli hele palpebrumos kun envi',
kaj eĥos de l' sirenoj fals-ĝentilaj
la kantoj plenaj de ĵaluzpasi'...

Vi venu karulin', mia boato
kun ornamar' de fest' atendas nin....
ĝi ŝajnas, la boat', sur la marplato,
belornamita trono de diin'.

ARTUR DOMÉNECH MAS

Oni denove aplaŭdas, kaj post la ovacio reprenas la Sekretario
sian raporton:

Celantajn la premion al I^a originala temo, alvenis sep verkoj
plie, el kiuj du montriĝas kun rimarkinda valoro. Ili estas la ver-
koj n.^o 54 kaj 2. Verko n.^o 54 estas ankaŭ tre bela versaĵo sed kies
perfekteco en ĝia strukturo ne tute kontentigis la postulojn de l' Ju-
ĝintoj. Se ĝia aŭtoro estus kombininta en akorda maniero la ritmon
de la longaj kaj mallongaj versoj, sendube la versaĵo estus nin ra-
vinta; tamen, ĉar ni konsideris ke ĝi meritas premion ni ĝin kon-
kursigis kun la verkoj partoprenantaj en la eksterordinaraj laŭvolaj
temoj kaj difinis al ĝi premion kiel estas dirite.

Ni decidis subpremii la verkon n.^o 2 devizita : «Mar' brava,

mar' verda, maro ŝaŭmadanta» kiu enhavas plaĉan ideon je ampasio, sed kies ritmo estas iel libera. La aŭtoro prezentis tiun versaĵon en artifika formo simila al tiu de niaj hispanaj sonetoj, de kiuj ĝi nur distingiĝas per la mallongeco de la versoj. Aŭtoro : S-ro Jaume Grau Casas el Barcelono.

La verkoj n.º 37 kaj 58 bone pravas kiom iliaj verkintoj havas kapablon por fari ion pli gravan. Speciale ni rimarkas en n.º 37 stilan korektecon kaj fidelobon de bona rimo.

Kvin prozaĵoj konkursis la duan ordinaran temon : originala prozverko pri amo. La opinio de l' Juĝintoj estis favora al la verko n.º 53 kun devizo : «Un beau visage est le plus beau de tous les spectacles.», ama letero, plena de vivo kaj koloroj kaj kun riĉeco de detaloj kaj nuancoj kiuj faras ĝin nepre premiinda. Krom tio la lingvaĵo estas tre bona kaj la stilo eleganta. Ĝia aŭtoro estas sinjoro Marián Solá Montserrat el Terrassa.

Tri verkoj interluktis por la premio difinita al plej bona traduko de la simbola versaĵo «El Pi de Formentor» de Mossén Costa i Llobera. La Juĝantaro opinias ke la valoro de la verko n.º 10ª kun devizo : «Sonoru tutmonda la liro, laŭ son' de nacia inspiro» estas tre grava ĉar ĝia aŭtoro sciis venki la malfacilaĵojn ĉe la traduko, ĉiam konservante krom la ritmo kaj rimo, la modulojn kaj plenan sencon de la originalo. Aŭtoro de la premiita verko estas S-ro Josep Grau Casas el Barcelono.

La esperanto de la du ceteraj verkoj n.º 1ª kaj 46ª, konkurantaj al tiu premio estas korekta kaj sufiĉe fidela la traduko; bedaŭrinde en ili la rimoj ne estas bonaj kaj plej ofte implikiĝas konsonancoj kun asonancoj kio kaŭzas tre malbonan efekton. Tamen iliaj aŭtoroj pravas, ke ili povas pli fari atentante al tio ke en traduko de versaĵo estas preferinde : aŭ elekti senrimajn versojn, kies libereco permesas traduki pli fidele kaj altigi la stilon aŭ peni sursalti la grandajn malfacilaĵojn kiuj dependas de la perfekta rimo en Esperanto.

Por la premio proponita al plej bona traduko de «La Ciutat» la bela peco de Enric de Fuentes, ni ricevis ok verkojn. Studinte ilian apartan meriton ni venis al konkludo ke la verko inda je premio estas la n.º 3ª havanta la devizon «Sopiro» ĉar ĝi sekvas la stilon de l' aŭtoro, kaj la traduko estas tre ĝusta escepte en iaj malmultaj okazoj. Ĝia aŭtoro estas S-ro Marián Solá Montserrat.

Ricevas subpremion la verko n.º 43ª, devizita «Amrakonto» kies aŭtoron bedaŭrinde ni ne konas ĝis la nuna momento.

Dua subpremio estas difinita al la verko n.º 39ª, devizo : «Ne

estas brilanto ĉio brilanta». Ĝiaj aŭtoroj estas : S-roj Jaume Grau kaj Enric Alba el Barcelono.

Trian subpremion oni aljuĝas al la verko n.º 17ª «Paco, amo kaj esperanto» kies aŭtoro estas : S-ro Narcís Bofill el Palma de Mallorca.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

La temo proponita de Lia Ekscelenca Moŝto D-ro Antolín López Peláez arĥiepiskopo de Tarragona priĝas «La Instruado de Esperanto en la Seminarioj» restis konkursita de kvar verkoj el kiuj du rivalas en boneco. Tial ke en la verko n.º 35ª devizo : «Esperanto havas antaŭ si gravan estontecon» estas pli amplekse pritraktita la temo, ni difinis al ĝi la premion. Ĝia aŭtoro estas : D-ro Joaquim Coll Agramunt el Barcelono.

Subpremion meritas la verko n.º 34ª devizita «Euntes in mundum universum» kies aŭtoro estas D-ro Josep Casanovas el Ĝerono.

Unu sola verko estas ricevita pritraktanta la temon de lia deputita Moŝto S-ro Antón de Veciana kaj ĝi estas la n.º 49ª, kun devizo : «Vekiĝu homaro». Bedaŭrinde la formo alprenita de ĝia aŭtoro estas ne tre beletristika, malgraŭ kio ni aljuĝis al ĝi la premion. Aŭtoro : S-ro Pere Navas Bonastre el Barcelono.

La temo proponita de Lia Moŝto S-ro Antón Estivill i de Llorach «Esperanto kiel oficiala internacia lingvo» restas malfeliĉe nekonkursita.

Por la temo kiun proponis «Centre de Lecturas» de Reus, traduko de aro da «Arabescos» de Joaquim M.ª Bartrina, la Juĝantaro nur ricevis unu verkon kiu estas la n.º 45ª «Mallongaj pensoj» al kiu ni difinis la premion malgraŭ ĝia iafaje ne tre ĝusta traduko de la originalo kaŭzata precipe de postuloj de la verskonstruo. Estas ĝia aŭtoro S-ro Marián Solá Montserrat.

Kvin versaĵojn oni ricevis por la temo proponita de S-ro J. Martorell Odena «Al la plej bona bonhumora versaĵo». La premion oni aljuĝas al la verko n.º 32ª kun devizo «Tri haringo» kies vortoglosa ideo faras ĝin tre ŝatinda. Aŭtoro : S-ro Clarence Bicknell el Bordighera (Italujo).

Estas aljuĝata subpremio al la verko n.º 8ª kun devizo : «Rana Esculentas». Ĝia aŭtoro estas ankaŭ S-ro Clarence Bicknell.

La versaĵo n.º 5ª estas tre sprita verko kun versoj bele fluaj, sed ĝia gramatika malkorekteco faras ĝin nepremiinda.

Estis proponata premio de Literatura kaj Lingva Fako de «Centre de Lecturas» de Reus al la plej bona traduko de la versaĵo

«Los Nius» de poeto Artur Masriera. Por tiu temo alvenis du verkoj, unu el kiuj ni decidis premii kvankam iasoje ĝi ne gracie tradukas. Ĝi estas la verko n.º 55ª, devizita «Charitas» kaj ĝia aŭtoro S-ro Artur Doménech.

Multajn verkojn ni ricevis konkursantajn la laŭvolajn temojn. Post atenta esploro kaj kribrado, la Juĝantaro konsideras premiindaj la jenajn:

Premio de Urbkonsilantaro de Reus al la verko n.º 17ª devizo «Triopa kordo», tri spritaj dialogoj tre flue verkitaj kiujn agrable oni legas. Aŭtoro estas S-ro Clarence Bicknell.

Subpremio al la verko n.º 61ª «Fremdas», alveninta post la datolimo por akcepto de verkoj. Ĝi estas fluritma versaĵo kies senco iomete malprecize montriĝas. Ĝia aŭtoro kiun ni bedaŭrinde ne konas, estas rusa verkisto, kiu uzas en sia verko radikajn rimojn en du finaj versoj, difekto tre karakteriza ĉe la rusaj esperantistoj, en kies lingvo estas permesata tiu malsameco de finigaj vokaloj.

Premio de Provinca Deputitaro de Tarragona, al la verko n.º 54ª, kun devizo «Oh temps passats de dolç record» bela versaĵo, celinta la unuan originalan premion kaj al kiu la Juĝantaro decidis difini ĉi-tiun pro la kaŭzoj jam diritaj en la raporto pri ordinaraj temoj. Aŭtoro estas S-ro Artur Doménech.

Premio de Milita Komandantejo de Reus-Distrikto, al la verko n.º 24ª kun devizo «Por Patrujo kaj Esperantujo» kies aŭtoro estas: F-ino Eileen B. Daly el Bordighera (Italujo).

Premio de Lia Moŝto S-ro Enric Prat de la Riba, prezidanto de «Mankomuneco de Katalunujo» al la verko n.º 30ª kun devizo «A Lesbia rediviva...» bela traduko de la ĉarma versaĵo de la latina poeto Kajo Valerio Katulo «Al la morto de l' birdo de Lesbios». Aŭtoro estas S-ro Josep Rosselló Ordinas el Sant Joan (Mallorca).

Subpremio al la verko n.º 59ª «Febro» ricevita post la datolimo; la fundo de tiu verko estas iel konfuza sed tre bona la esperanto de ĝia aŭtoro kiu estas S-ro Manuel Bordas el Barcelono.

Premio de Konstitucia Urbeŝtraro de Tarragona al la verko n.º 19ª «Nové Mac» kies aŭtoro bone pritraktas la temon. «La instruado de Esperanto en la lernejoj». Aŭtoro estas S-ro P. J. Cameron el Putney, Londono.

Subpremio al la verko n.º 15ª kun devizo: «Kiel la mastro tiel la servisto», tri fabloj sufiĉe interesaj kaj bonstile verkitaj, kies aŭtoro estas S-ro Clarence Bicknell.

Meritas esti citata la verko n.º 25ª kun devizo «Ex tenebris» dediĉita al la memorigo de nia bedaŭrata angla pioniro Mudie, kies

verkon ni estus konsiderintaj pli altvalora se ne ekzistus troa libereco en la konstruo de la versoj.

Estis proponata premio de Iliaj Moŝtoj S-roj Ramón Vidiella, Antón Borrell kaj Miquel Alimbau pri la temo «Útileco de Esperanto ĉe la laboristoj» kiun la Juĝantaro ne aljuĝis ĉar la sola verko ricevita ne havas la meritojn dezirindajn.

Nia kara grupo «Gerona Espero» proponis premion al la plej bona traduko de la klasika madrigalo de Gutierrez de Cetina. Traesplorinte la kvin verkojn ricevitaĵn por tiu temo, ni unuanime aljuĝis la premion al la verko n.º 33ª, devizita «Ruĝobuŝa knabineto kun la dolĉa klar-okul'» kiu estas laŭvorta traduko de la originalo; oni povus tamen riproĉi la preskaŭrimon de la lasta verso rilate la plenan rimon de la kastila madrigalo, sed ni atentis al tio, ke ĉar la originalo estas verkita en hispana silva formo kies verskombino ne submetiĝas al la leĝo pri la dismeto de la rimoj, nek pri ĝiaj nombro kaj ordo, la aŭtoro de la traduko povas uzi laŭplaĉe tiun liberecon ĉiam konservante la simetron de la dekunu-kun la sepsilabaj versoj, el kiuj konsistas silvo. Krom tio la aŭtoro verkante en tiu formo povas intermeti senrimajn versojn en tiujn havantajn perfektajn rimojn kiel okazas en la variaĵo kiun tiu klasika aŭtoro faris mem el sia propra verko.

La aŭtoro de la traduko sendis ankaŭ tiun variaĵon tradukita kio pli valorigas ankoraŭ lian meriton. La tradukon verkis S-ro Josep Grau Casas.

Unuan subpremion ni aljuĝis al la verko n.º 56ª «Veni, vidi, vici» kies aŭtoro estas S-ro Artur Doménech.

Duan subpremion meritas la verko n.º 18ª kun devizo «Al paro da belaj okuloj» malgraŭ la libereco kiun alprenis ĝia aŭtoro por plej ĝuste al la originalo rimigi la versojn. Aŭtoro estas S-ro Marià Solà Montserrat.

La temon proponitan de la «Esperanta Tarragonprovinca Ligo» partoprenis du verkoj enhavantaj kelkajn versduojn; bedaŭrinde neniuj el ili tute plaĉis al la Juĝantaro, kiu tamen decidis premii la distikon n.º 2 el la verko n.º 6ª kun devizo «Colonia Victrix» ĉar estas ĝi la plej konforma al sia celo. Estas ĝia aŭtoro S-ro Clarence Bicknell.

La premion de la «Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj» difinitan al la gajninto de l' unua eksterordinara temo oni aljuĝas al la aŭtoro de la verko n.º 35ª kun devizo «Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon» kies aŭtoro estas D-ro Joaquim Coll Agramunt.

Lastahore kiam estis jam neeble publikigi ĝin antaŭ la datolimo

por akcepto de verkoj venis ankoraŭ propono por premio el Parizo; ĝi estis donacata de la kataluna esperantista grupo «La Rizaman to» al la plej laŭfundamenta traduko el kataluna prozaĵo. Bedaŭrinde pro tiu fakto estis nepre nekonkursita tiu temo kaj ne aljuĝita la premio kiun ni konservas por la venontaj Floraj Ludoj, kun la konsento de la malavara donacinta Grupo.

Kaj jen ni en la fino de nia tasko de Juĝintoj, tre profunde bedaŭrante la foreston, en nia tiel senkompare bela festo, de S-ro Vicente Inglada, prezidanto de ĉi-tiuj Floraj Ludoj rave okazantaj. Malbona farto kaj premantaj okupoj lin restigis en Toledo, malpermesante al li agrable ĝui la disvolvigon de la Festo. Ni pruvu, do, al li per aplaŭdo la estimon en kiu ni ĉiam lin tenis, kaj precipe nun kiam tiom da helpo li alportis al la Floraj Ludoj per siaj prestiĝo kaj eminentaj multvaloraj kvalitoj.

Ni danku, ankoraŭ, per forta aplaŭdado la verkistojn, tiel la premiitajn kiel la nepremiitajn, kiuj partoprenis en nia konkurso kaj ĝin sukcesigis alsendante tre bonajn kaj rimarkindajn verkojn, ni danku ankaŭ la esperantajn kaj neesperantajn gazetojn kiuj bonvolis publikigi la Alvokon, kiel ankaŭ la Aŭtoritatulojn kaj popolon el Reus per kies ĉeesto en la Festo ĉiu pruvis sian amon al nia ideo kaj al la jam riĉa literaturo de nia lingvo, kaj fine al vi, Reĝina Moŝto kaj ĝentilaj Korteganinoj, simbolo de Poezio, Amo kaj Belo, ni esprimas nian dankon, kiu kvankam granda tute ne atingas la meritojn de via ĝentileco kaj bonvolo por ni.

Geesperantistoj, ni ĉiuj gratulu nin fine unu la alian pro la sukceso de niaj VI^a Internaciaj Floraj Ludoj, dirante «Ĝis la Sepa».

JOSEP VENTURA

Ĉiuj laŭreatoj iris ricevi de manoj de Sia Reĝina Moŝto la atingitajn premiojn, kaj la aŭtoroj de versaĵoj legis ilin antaŭ la ĉeestantoj je kio ili estis ĉiuj longe aplaŭditaj; kiam la aplaŭdoj silentigis ekstaris D-ro Josep M.^a Terricabras, kiu alpaŝante al la tribuno per laŭta kaj belsona voĉo eklegis la jenan prezidantan paroladon:

*Reĝina Moŝto,
Ĝentilaj Korteganinoj,
Respektindaj Aŭtoritatuloj,
Belegaj Sinjorinoj kaj Fraŭlinoj,
Sinjoroj:*

Insista petado de la Katalunaj Esperantistoj devigis min akcepti ĉi tiun prezidan postenon, ĝis nun plej brile gardatan — jam kvinfoje — de talentaj

Esperantistoj kaj nun de la plej mallerta; mi esperas, ke ĉiuj, kiuj elektis min per unanimeseco, kiun mi tiom kore dankas, kiom ĝi estas nemeritita, bonvoleas pardoni al mi tiun ĉi enuigan sensukan paroladon.

Eĉ kalkulante sur via plej granda bonvolemo mi komencas paroli kun granda timo. Kiel diras la princo de la glorverkistoj en Antaŭparolo de «Kifoto», mi volus ke tiu ĉi parolado ŝiel filo de la intelekto estu la plej bela, la plej superbrilanta, la plej diskreta el ĉiuj imageblaj. Mi ne povis tamen malobei al natura leĝo, laŭ kiu ĉio en Naturo naskas similaĵon. Kion, ja, povas naski mia senfrukta kaj meekulturita sprito... en malliberejo, kie ĉiu ĝenaĵo havas sian sidlokon kaj sian loĝejon ĉiu malĝaja bruo?»

Se Cervantes, la revo de la Muzoj, faras tiel aludon al senfrukta kaj neelkulturita sprito, kiaj vortoj taŭgas por ĝuste taksi la malriĉecon kaj malhelecon de la mia? Kaj eĉ la aludo al karcerito povas ankaŭ aplikiĝi, ĉar vi ja scias, ĝesinĵoroj, ke estas nuntempe malliberejoj vastampleksaj, kies muroj estas faritaj el devoj kaj okupaĵoj, interplektitaj per familiaj sentoj, amikaj konsideroj kaj premantaj bezonoj de la reala vivo. Kio, se ne karcerito, estas tiu ĉi komplikamaso da neprokrasteblaj devoj oficialaj kaj privataj, kiu ne permesas al mi foriri el Toledo?

Se mia korpo ĉi tie restas, mia deligita animo estas kun vi en tiu solena kaj ravoplena festo de Poezio, Belo kaj Amo, kiu okazas en Katalunujo, tiu nobla, progresema kaj por mi tre kara lando.

Plej ofte mi sopiras al ĝi, rememorante la unuajn jarojn de mia juneco, tiel feliĉe pasigitajn en Barcelono! Longa tempopeco jam forpasis, sed mi ne povas forgesi mian restadon en la grafa ĉefurbo, kie mi estis gastame akceptita kaj ĉio prosperis al mi plej bone.

En Barcelono mi faris mian unuan kurson de Esperanto — ĉe la Stenografista Akademio — en Barcelono aperis mia unua verko, en Barcelono naskiĝis mia unua filo, kaj tio estas la plej pura feliĉo, kiun ĉielo povas al ni donaci.

Kredante min kvazaŭ Kataluno, ĉar mi estas Valenciano, dum mia restado en Katalunujo mi lernis ĝin ami; mi povis konatiĝi kun ĉi tieaj homoj, tiel grandanimaj kaj sinceraj, tiel fortkoraj, persistaj kaj laboremaj, celantaj ĉiam al grandaj idealoj: plejbrileco de sia lando, monddivastiĝo de sia lingvo, antaŭenpuŝo de la komerco kaj industrio kaj elkultureco de ĉiuj sciencoj kaj artoj.

Kaj kion diri por ĝuste laŭdi tiun ĉi noblan urbon, kiu hodiaŭ akceptas nin tiel gastame, lukse ornamita por plibeligi tiun ĉi literaturan feston?

Dankon, plej koran dankon en la nomo de la Jugiĉa Komitato al la honorinda Reĝino kaj al ŝiaj ĝentilaj korteganinoj, kiuj malavare prezentas en tiu ĉi konkurso siajn trezorojn de beleco, ĉarmo kaj gracio; dankon ankaŭ al la respektindaj aŭtoritatuloj, kies ĉeesto obligas tian eksterordinaran solenecon; dankon al vi, belegaj Sinjorinoj kaj Fraŭlinoj, kies delikateco kaj ravinspiro donas al tiuj ĉi Florfudoj tiun parfumellason superantan per bonodoro tiun de la plej puraromaj floroj kaj tiun neklarigeblan ĉiamtrafan senton, kiu elradias el virina animo — ĉu infanina aŭ knabina, ĉu filina, edzina aŭ patrina — kaj fine dankon al vi, fidelaj Esperantistoj kaj afablaj neesperantistoj, kies

aliĝo liveras al ni tiun grandan forton, sen kiu ĉia entrepreno fariĝas malvasta kaj senfrukta, apogilpunkton per kiu la Arĥimeda levilo elmovas ĉiun mondon trovitan de progreso, por ni la mondon de la tuthoma interfratiĝo.

Fama urbo vi estas, ho Reus, kun viaj gajbeuaj stratoj kaj belaj monumento, kun viaj gravaj manufakturoj silkaj kaj kotonaj, kun via plej prospera vineksporta komercado, kun viaj ĉarmaj virinoj kaj progresemaj viroj!

Vi estas patrino de multenombraj geniuloj, kies nomoj brilas kiel sunoj en la historio de nia granda patrolando.

En la scienca kampo vi havas Petro Mata, kies nomo estas donita al la fama kaj bele konstruita Instituto por frenezuloj; en la poezia brilas plej hele tiu talenta junulo Bartrina, kiu montrinte la potencon kaj inspiĝenon de la grandaj poetoj mortis ho vel tiel frue, kiam ĉiuj atendis liajn ĉefverkojn; en la belarta, vi havas la gloran pentriston Fortuny, faman inter la famaj; en la milita kaj politika estas tiu granda patrioto: Generalo Prim.

Tiu ĉi lasta nomo elvokas ĉe nia animo nevenkeblan altiron al la pasinteco de la historio de nia patrujo, la Hispanujo de la Katolikaj Gereĝoj, de Karolo I kaj Filipo II, kiam nia nacio estris la mondon kaj ĉiam la suno surradiis ian terpecon el ĝia tutlandaro.

Kio estus nun nia lando se vi Prim, heroo armeestro, lertega politikisto kaj altcela patrioto, estus pli longe vivinta?

Malfeliĉe krimulaj manoj fortrancis perfide vian vivon, kiam ĝi estis tiel utila al la estonto de nia patrujo...

Urbo Reus, vi estas senmorta, kiel la nomo de Prim, kaj dum Historio ripetos ĝin, dum unu hispano ĝin eldiros, kaj tio ĉiam daŭros, vi vivados, ĉar vi estas lia patrino!

.....
Mi volus, gesinjoroj, laŭdi tiel elokvente, kiel ĝi meritas, la elsterordinaran gravecon de tiuj ĉi Floraj Ladoj.

Tiu ĉi festo ne estas nur literatura, pure poezia; ĝi estas ankaŭ la feliĉa kanto de nia esperantista unuiĝo, tiel necesa por la rapida triumfo de nia kara lingvo, ĉar vi ja scias, ke unueco faras forton, kaj ni bezonas potencon forton por atingi la jam proksiman kaj definitivan venkon.

Poetoj esperantistaj: kantu glorie pri tiu ĉi nova sento, kiu venis al ni, pri tiu ĉi forta voĉo, kiu trakuras Hispanujon kaj per flugiloj de facila vento iradas nun de lok' al lok'!

Tiu ĉi Hispana Konfederacio Esperantista povis elĝermi dank' al la fervoro de la katalunaj, baskaj, valenciaj kaj aragonaj Esperantistoj; mi esperas, ke ĉiuj hispanaj samideanoj venos rapide al ni, atendantaj ilin kun brakoj malfermitaj, kaj ili venos fervore, sen malkonfido, nek suspektemo ĉar nia celado estas nobla, sincera kaj ne intencas detrui la ekzistantajn organizaĵojn, sed nur kunfandi ĉiujn ni en unu solan kaj fari el ni fratojn de la granda hispana familio, kiu volas sin alligi al la tutmonda Esperantistaro.

Guste en tiu ĉi momento, kiam la mondo estas renversegita per la terura militado, kiu disiras tiom da raso, popoloj kaj nacioj, ni devas plej preme unuiĝi kaj firmi nian lingvon kontraŭ tiu sangavida semado de malamo.

Ni devas plej varme defendi nian Esperanton, ĉar eble ĝi estos la sola ligilo, kiu restos al la nacioj nuntempe malamikaj kaj ebligas la ĉamdaŭran regadon de la tutmona paco, la definitivan interkompreniĝon de ĉiuj popoloj, kiu D-ro Zamenhof celis:

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Kompreneble usu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Eble kelkaj homoj sin montros skeptikaj pri la estonto de nia lingvo pro la terura militado, kiu ŝajnas disigi por ĉiam unuj popolojn de la aliaj, sed mi firme kredas, ke Esperanto post la milito aperos pli potenca, ol iam.

Ĝi estas lumradio penetranta nian amon kaj inspirantan fratan amon al ĉiuj homoj. Kion povas efiki paflegoj, submarsiĝoj, bombellasaĵ aerveturiloj aŭ asfiksiaj gasoj kontraŭ lumradio? Ĉiuj armiloj kunigitaj ne povas ĝin estingi.

Esperanto estas la koro de la homaro: oni povas mortigi unu koron, du korojn, mil korojn, milmillionojn da koroj, tiom multe kiom vi volos, sed ne la koren. — La koro tamen restos kun sia ritma neniamĉesanta trembato.

Kio estas nia lingvo? Nur amo.

Amo estas tiel antikva, kiel koro. De kiam homo naskiĝis, la mondo estas nur regata de la amo, ĉar amo kunigas samfamilianojn en hejmojn; la hejmojn — en gentojn; gentojn — en rasojn; rasojn — en landojn kaj landojn — en mondojn. Kaj tiel same, kiel por la mirinda ekvilibro kaj regula funkciado de la fizika mondo estas necesega la altirforto, kiu kunigas atomojn, molekulojn, korpojn kaj sunojn, ankaŭ amo estas la altirforto de la spirita mondo, plej necesa por ĝia regula irado, kaj se malamo aperas kelkfoje por disigi la erojn de sistemo, tio ĉi nur estas pro la dinamika leĝo, laŭ kiu ĉiu forto naskas ĉiam egalan, samdirektan kontraŭforton, kiu ebligas la ekvilibron, tiun ĉi harmonion de movado, kiun ni ĉiam admiradas ĉe Naturo.

Kaj se Amo estas la esenco de Esperanto, kiel mirinde ĝi devas taŭgi, kiel organo, al internaciaj Floraj Ludoj, kiujn ni festas ĉiujare, al kiuj ĝi portas la belecon de ĉiuj landoj, la plej kaŝitajn sentojn de ĉiuj popoloj, kun iliaj tradicioj kaj moroj, multvaloran kvintesencon el ĉiuj rasoj kaj ĉieloj kun ilia mirinda diverseco teksita per la superbela unueco de nia simpla kaj obee fleksebla lingvo!

Ni gardu plej fidele kaj fiere la trezoron de tutmonda poezio, kiun prezentas niaj Floraj Ludoj; ĉar ili estas la rekta daŭrigo de la unuaj kiuj okazis en la Barcelona Kongreso, ili estas internaciaj; nia patrujo ricevis tiun ĉi apartan honoron ilin okazigi: ni montru nin indaj je tia multvalora distingo.

Ni dankas plej kore ĉiujn Esperantistojn, kiuj bonvolis partopreni en tiu ĉi konkurso, kies sukceso estas al ili ŝuldata. Multaj ricevis la premion, kiun meritas iliaj belaj verkoj; aliaj montris kapablon sufiĉan por venki en venontaj konkursoj. Ĉiujn ilin ni kore gratulas kaj ni petas de la lastaj, ke ili ne malkuragiĝu, ke ili helpu nin ĉiam kaj la esperanta literaturo bele disvolviĝos.

Mi devas fini, ĉar tiu ĉi parolado fariĝas jam tro longa kaj mi ne volas trouzi vian amindan atentadon.

Mi prezentas nian plej koran kaj fidelaliĝan saluton al la genia kreinto de Esperanto, D-ro Zamenhof, kiu preta jam vidi en Parizo la definitivan triumfon de nia sankta afero suferas nun la maldolĉaĵojn de subita disreviĝo kaj la doloron regantan en sia lando pro la milita sangelveŝado; al nia eminenta pioniro S-ro Frederiko Pujolá, la animo de nia kongreso, al kiu ni deziras bonsorton kaj baldaŭan revenon en lian hejmon kaj fine al ĉiuj fremdaj geesperantistoj, kiuj malhelpataj de la nunaj cirkonstancoj, ne povis veni ĉi tien ricevi nian fratan saluton.

Adiaŭ, gesinjoroj, mi petas ree pardonon por la enuigo de tiu ĉi longa parolado, kaj ni, samideanoj, ne senkuraĝiĝu pro la malfeliĉa stato de la mondo; eble tian ĉi longan militon sekvos ĉiamdaŭra paco kaj ni devas plene fidi al estonto, certaj ke nia triumfo baldaŭ venos, sen malvigleco, nek ŝanceliĝo, laŭ la devizo de nia granda Esperantisto S-ro Ricardo Codorniu: ĉar ni estas Esperantistoj, ni esperu aŭ laŭ la bela promeso de nia Majstro:

*L' espero, l' obstino kaj la pacienco
jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro
Atingos la celon en gloro.*

VICENTE INGLADA

Je fino de la bela kaj perfekte verkita parolado de S-ro Inglada, la ĉeestantaro aplaŭde stariĝis kaj la Urbestro S-ro Sardà diris la kutiman frazon *«la festo estas finita»*. Unuanime ĉiuj esperantistaj lipoj modulis *«La Espero»* kaj je la sonoj de nia triumfa himno, kiun la tuta ĉeestantaro stare kaj respektate aŭskultis, forlasis la teatron. Sia Reĝina Moŝto je l' brako de la laŭreata poeto sekvate de sia brila Kortego kiun akompanis distingindaj samideanoj.

Kaj tiel finiĝis tiu granda Festo kies rememoro daŭros por ĉiam en la koro de tiuj kiuj havis la plezuron esti atestantoj de ĝia neforgebla sukceso.

HONORA BALO

Ĝi okazis tuj post la festo de la Floraj Ludoj en la salono de societo «El Círculo»; ĝin honoris per sia ĉeesto nia Reĝino F-ino Lola Alimbau, ŝiaj kunulinoj en la Ama Kortego, kaj multaj distingindaj familioj el Reus, kiuj volis prui per sia ĉeesto en ĉiuj niaj festoj la simpatian kiun ili sincere sentas por nia movado. Ĝi daŭris ĝis la naŭa vespere kiam jam estis komenciĝonta la

OFICIALA FESTENO

Ĝi havis lokon en la granda salono de la «Hotel de Londres»; la tablo en formo de M estis arte ornamita kun florbukedoj kaj esperantistaj flagetoj kaj apud ĝi alsidiĝis la kongresanoj en la nombro de 150. La prezidan seĝon ekokupis meze de granda aklamado la Reĝino de la Floraj Ludoj F-ino Lola Alimbau; je ŝia dekstro eksidis S-ro Sardà, urbestro de Reus; S-ro Perogordo, por la Juĝantaro de la Literatura Festo; S-ro Boqué, prezidanto de la Komerca Ĉambro kaj S-ro Borrell, provinca deputito; maldekstre eksidis S-ro Balsells, prezidanto de la K. E. F.; S-ro Vidiella, prezidanto de la Provinca Deputitaro; S-ro Aguadé, prezidanto de la Organiza Komitato de l' Kongresoj kaj S-ro Grau, direktoro de K. E. La menuo estis riĉe servita kaj dum la daŭro de la festeno agrabla babilado kaj ĝoja murmuro ne ĉesis aŭdiĝi; la elegantajn menukartojn oni dissendis tra la tabloj por kolekto de aŭtografoj al la aŭtoritatuloj kaj al nia Reĝino, kiu montris ĉiam gracion komplezon al ĉiuj niaj ĝentilaj entruduloj.

Kiam la ĉampano estis malŝtopita, S-ro Balsells, en la nomo de la Reĝino, salutis la kunmangantojn kaj dankis ankaŭ per tio ĉi la neĉeestantajn kongresanojn kiuj vespere en la teatro favoris ŝin per siaj koraj aplaŭdoj; starigis tuj poste la Urbestro S-ro Sardà kiu tostis en la nomo de la urbo por la feliĉa efektiviĝo de l' Kongresoj; parolis S-ro R. Vidiella, prezidanto de la Provinca Deputitaro kiu proponis al ni sian senkondiĉan helpon; sekvis S-ro Perogordo, kiu en la nomo de la kastilaj esperantistoj salutis nian Reĝinon; tostis ankaŭ S-ro Grau en nomo de la katalunoj; S-ro Stephens, usonano, en la nomo de la eksterlandanoj ĉeestantaj; oni lin dankis per forta aplaŭdado; S-ro Gastón en la nomo de la Aragona Esperantista Federacio, kaj poste S-ro Aguadé resumis la tostojn; unue li dankis katalunlingve nian Reĝinon kaj proponis al ŝi en la nomo de ĉiuj kunmangantoj la artan kaj belegan florbukedon kuŝantan antaŭ ŝi; dankis ankaŭ la aŭtoritatulojn por ilia kunhelpo kaj fine en Esperanto salutis per dankaj vortoj la kongresanojn.

Kiam la kafo estis servita, je peto de la ĉeestantoj, parolis ankoraŭ S-ro Maynar el Zaragoza, kiu faris brilan kaj elokventan paroladeton, longe aplaŭditan; S-ro Lorén, el la Aragona Federacio; S-ro Simó (F.) el la Organiza Komitato; S-ro Simó (J.) urbkonsilanto kiu promesis lerni Esperanton kaj ĉeesti la venontajn kongresojn; S-ro Vallvé kiu rememorigis nin pri la multnombraj esperantistoj kiuj pro sia devo estas nun luktantaj sur la batalkampoj kaj fine S-ro Terricabras en la nomo de la Konservantaro de la Floraj Ludoj.

Kiam ĉesis la testoj kaj aplaŭdoj, oni ekkantis «La Espero» 'n kaj meze de granda entuziasmo kaj aklamado forlasis la salomon la Reĝino kaj aŭtoritatuloj.

KUNSIDO DE LA «KATALUNA L. DE K. ESPERANTISTOJ»

Ĝi havis lokon en unu el la ĉambroj de «Centro Católico» kie la kunsidantoj post facila diskutado prenis diversajn decidojn celantajn la plivastigon kaj efikan funkciadon de sia organizacio.

KUNSIDO DE LA «TARRAGON-PROVINCA E. LIGO»

Pro la manko de tempo estis decidite okazigi tiun kunsidon en alia proksima dato.

12, Lundo

DISERVO EN LA PAROĤA PREĜEJO

Je la naŭa matene kunvenis en la granda preĝejo de Sankta Petro granda nombro da fideluloj kaj kongresanoj por ĉeesti la diservon kiun oferis Pastro J. Planas akompanata de Ptroj J. Casanovas el Ĝerono kaj P. Lorén el Zaragoza; la predikon diris en internacia lingvo P-tro Tomàs Alsina, paroĥestro en Prades, kiu kvankam por la unua fojo publike uzis Esperanton, diris belan kaj korektan paroladon laŭdante kaj kantante himnojn al la perfekteco kaj gracoj de la Virgulino de l' Espero.

Pastro Alsina ricevis post la fino de l' diservo multajn gratulojn de siaj aŭskultintoj.

SUPRENIRO AL LA SONORILEJO

Elirinte el la Preĝejo de Sankta Petro multaj kongresanoj supreniris la 216 ŝtupojn de la Turo de Sankta Petro konstruita de Benet Otgen en la XVI^a jarcento; en ĝi ili povis admiri kaj rigardadi la vastan panoramon de Reus kaj ĝiajn platajn ĉirkaŭaĵojn.

LABORA KUNSIDO DE K. E. F.

En la teatro de «Centre de Lecturas» la kongresanoj okupas la tutan parteron kaj kelkajn loĝiojn.

Ĉe la prezida tablo S-roj Balsells, Serrat, Ventura, Grau, Agnadé.

S-ro Balsells proponas, malferminte la kunsidon, ke la kongresanoj nomu prezidanto de la kongreso, S-ron Grau, kiu tiel bone kondukis la taskojn de la antaŭa kongreso. La kongresanoj aprobas unuanime.

Estas legataj diversaj aliĝoj. Laŭ propono de la prezidanto la kongreso esprimas al S-roj Pujolá kaj Dalmau, forestantaj, simpatieon.

S-ro Ventura legas la sekretarian raporton, kiun oni per aplaŭdoj aprobas.

S-ro Grau, petinte pardonon pro nova insistado, admonas la federaciaĵojn akurate subteni la financojn de la Federacio, sen kio ne plu povos okazi la Kongresoj, neki aperi la gazeto, kaj proponas al ĉiuj la ekzemplon de la Baska Federacio, kiu la 1^{aa} de januaro *estis jam paginta* la subtenon kiun ĝi difinis. Li esperas, ke la kongresanoj trovos rimedojn por eviti, ke la tuta laboro restu sur S-roj Balsells, Serrat kaj Grau, kiuj ne povos ĝin pluplenumi; kaj finas petante ĉiujn, bonvolu pagi la kotizaĵon de la Federacio.

S-ro Serrat, aliĝinte al tio dirita de S-ro Grau, legas la bilancon, kiu estas aprobita de la kongresanoj.

S-ro Aguadé, en nomo de «Nova Semo» subskribas 103 proĵojn de la Garantia Kapitalo por ĝin kompletigi.

Oni decidas, ke la Juĝintoj de la Floraj Ludoj estu proprarajte membroj de ties Konservantaro.

Estas legata telegramo de la Urbeŝtraro de Girona, invitanta la Kongreson, okazigi la sekvontan en tiu urbo.

Oni akceptas kun grandaj aplaŭdoj la proponon, kiun oni dankas per telegramo.

Oni elektas unuanime por la venonta jaro la jenan Komitaton:

Prezidanto : S-ro Josep M.^a Terricabres, el Vich; *Vicprezidanto*, Pastro Josep Casanovas, el Girona; *Sekretario*, S-ro Artur Domenech, el Barcelono; *Vicsekretario*, S-roj Pere Navas kaj Josep Guixà, el Barcelono; *Asisto*, S-ro Josep Serrat, kaj *arkivisto*, S-ro J. Puigall, el Barcelono.

La Kongreso esprimas sian dankon al siaj organizintoj, al la direkta komitato kiu ĵus lasis sian postenon; al «Mancomunitat de Catalunya» pro la malavara subvencio; al Komerca Ĉambro; al societoj «El Círculo» kaj «Olimpos» kaj fine al la gazetaro de Reus, kiu tiel multe helpis la sukceson de la Kongreso.

S-ro Perogordo petas aplaŭdadojn por la Reĝino de la Floraj Ludoj kaj la belaj kortegantinoj, kaj meze de la ovacio finiĝas la laboro de la Kongreso.

HONORA KAFO

La Organiza Komitato regalis la kongresanojn per *Honora Kafo*, kio okazis je la 2.^a kaj $\frac{1}{2}$ en la vasta salono kie la Esperanta Ekspozicio estis instalita en la «Centre de Lectura»; amaso da katalunaj gesamideanoj disidis ĉe la diversaj kaj multnombraj tabloj kaj kun ili diskutis vigle niaj karaj Aragonaj pioniroj S-roj Maynar, Gastón kaj Luna kiuj apenaŭ povis priatenti la ĉefflanke venantajn demandojn pri la Dua Hispana Kongreso en la bela urbo Zaragoza; granda ĝojo vidiĝis en ĉiuj vizaĝoj kaj aperis en ĉiuj konversacioj pri la sukceso de ĉiuj aktoj de l' Kongreso bedaŭrinde ja tro baldaŭ finiĝonta.

Oni petis silenton kaj ĉiu pretiĝis aŭskulti atenteme la legadon de versaĵoj tradukitaj el la kataluna lingvo de nia Direktoro; tiuj versaĵoj formas parton de la aperonta verko «Antologio de Katalunaj Poetoj»; per klara voĉo kiun oni perfekte aŭdis en la tuta salono, kun beldira, rapsoda deklamado, per kristale travidebla lingvo, ĝusta traduko kaj beleco de pensoj ĉarmis dum unu horo S-ro Grau la animon de ĉiu ĉeestanto. La unue legita versaĵo estas traduko de la III^a Kanto de la fama Atlantido de glora poeto Verdaguer; la kunveno de la Atlantoj kaj detruo de ilia templo estis tra la traduko tiel impresa kvazaŭ oni legus la originalon mem, kaj la samo devas esti dirata pri la «Epilogo» de la sama verko ankaŭ legita kiu tiel klare pravas la belsonecon de la majstraj versaĵoj; legataj estis poste la tradukoj de la versaĵoj «L'edzin' parolas» kaj «Antaŭ la Ŝtormo» de Maragall, kiujn oni multe aplaŭdis precipe la lastan; el Guanyabens estis legata «Ĉiutage» kampara skizo kies helecon bone speguligas la traduko; la versaĵo «***» de Josep Carner ĉarma dialvoko estis varme aplaŭdata; la bela miniaturo de Guasch «Lampiro» vekis per sia gracieco la entuziasmon de la kongresanoj kiuj per siaj aplaŭdoj pruvis ankaŭ kompreni la malfacilecon de la traduko kaj ĝian fidelecon; sekvis la energia, luktospirema versaĵo «Krutajo al Ebena: Lupo al Homo» de Puig i Ferrater kies akra sento vibris tra la esperantaj versaĵoj; kaj, laste, la deklamado finiĝis per la harmoniaj versaĵoj «La Feinoj» kaj «Adiaŭo» de nia, laŭ la diro de Manuel de Montoliu, klasika kataluna poeto Costa i Llobera. Fine S-ro Perogordo starigis kaj publike dankis, en la nomo de ĉiuj, nian karan Direktoron por lia bona laboro.

La Organiza Komitato, kaj precipe ĝia estimata Prezidanto S-ro Aguadé ricevis ankaŭ multe da dankoj pro la malavara regalo.

LABORA KUNSIDO DE H. E. K.

Posttagmeze en la Komerca Ĉambro multe da kongresanoj plenigas la belan salomon kaj salutas per aplaŭdoj S-rojn Perogordo, Gastón, Balsells, Grau kaj Vidiella, kiuj iras okupi la Prezidejon.

S-ro Perogordo, kiu prezidas, cedis la parolon al S-ro Grau, kiu diras ke post la intensa interŝanĝo de opinioj kaj la unanima sento de la Kongresanoj esprimita de la diversaj delegitoj de la Federacioj, li submetas al la aprobo de la Kongreso la jenan rezolucion, kiu difinas la celon de la Hispana Esperantista Konfederacio.

Oni fiksis per la Konfederacioj du celojn: unua, enkonduko de Esperanto en la lernejojn; en la unua tempo klopodante profiti je la R. O. permesanta

la instruadon de nia lingvo en la oficialaj instruoj; pli poste petante de la stato la oficialigon de ĝia instruado.

Dua celo estas: propagando de Esperanto per la rimedoj kiujn la Federacio juĝos plej konvenaj precipe en la regionoj kie ne estas nuntempe esperantistoj intencante krei en ili anaron gravan, kies forto garantias la petojn al la stato.

Krom tio ĉi, la Konfederacio zorgos agadi por akiro de ĉiaj bonaĵoj kaj antaŭeniroj de nia lingvo.

Rimedojn por tio liveros la Federaciojn Konfederitaj, destinante al tio la laŭbehtaj, monsuonoj, por eldono de propagandiloj, okazigo de propagandaj festoj, publikigo de artikoloj en la ĵurnaloj, k. t. p.

Per aplaŭdoj estas aprobita la propono, kiun S-ro Grau kompletigas petante ke oni elektu S-ran Gastón, el Zaragoza, prezidanto de la Konfederacio, kio estas varme aprobita.

La Kongreso esprimas la deziron ke la II^a Kongreso de la H. E. K. okazu en Zaragoza, kaj la katalunaj samideanoj, demandite de S-ro Gastón, promesas ĉeesti grandnombre la tieajn festojn.

S-ro Gastón dankas por tio kaj por la elekto de prezidanto en lia persono, kaj S-ro Vidiella prezidanto de la Provinca Deputitaro de Tarragona fermas la Kongreson per elokventa parolado, dezirante plej grandan sukceson al nia ideo kaj esprimante sian admiron al la aktiva entuziasmo kaj sindonemo de la pioniroj de nia movado.

La kanto de nia himno kronas bele la kunsidon.

EN LA ENOLOGIA LERNEJO

London vespere je la kvina, finitaj jam la taskoj de la Kongreso, la kongresanoj direktis sin laŭ grupoj al la Enologia Lernejo, por efektiviĝi la anoncitan viziton; tie ili estis akceptitaj de la Profesoroj S-roj Tarin kaj López en reprezento de la agronomia inĝeniero S-ro Claudi Oliveres, Direktoro de tiu Lernejo, kaj sub ilia komplezema gvido oni trarigardis la diversajn ĉambrojn, laboratoriojn, salonon por lumbildoj, fotografajn kamerojn; kaj salonon por paroladoj. Multaj el la kongresanoj subskribis la Honoran Albumon de la Enologia Lernejo, laŭ atenta invito de S-ro Tarin.

Vespere la aktoraro kiu ludis en la teatro «Centre de Lecturas» reprezentis diversajn teatraĵojn honore al la kongresanoj; preskaŭ ĉiuj restintaj ankoraŭ en Reus ĉeestis la teatron de la por ni tiel gastama societo.

13, Marto

EKSKURSO AL POBLET

Dum la Honora Kafo en la «Centre de Lecturas» la samideanoj prenitaj sur sin la organizadon de tiu ekskurso al la fama antikva

monaĥejo, sukcesis ankoraŭ kolekti, de tablo al tablo kaj de grupo al grupo, ĉirkaŭ tridek aliĝojn; mardon matene je la oka ĉiuj enskribitoj ekveturis el la norda stacidomo kaj je la 11.^a matene atingis la celon de sia vojaĝo. Akompanataj de kleraj gvidantoj ili trapasis la diversajn ĉambrojn, salonojn, admiris la klaŭstrojn, la belegan ĉefan preĝejon kun sia altgrade rimarkinda altaro kaj reĝaj tomboj, trakuris la palacon de Reĝo Martín kaj povis larĝe konstati la belecon de tiu admirinda gota ĉefverko, fondita de Ramón Berenguer en la antikva ĝardeno de Poblet. Ili tagmanĝis en la vilaĝo Poblet kaj posttagmeze revenis al Reus vizitante la

INSTITUTON PERE MATA

Ili estis akceptitaj en tiu-ĉi frenezulejo, unu el la plej moderne aranĝitaj, de ĝia direktoro D-ro Briansó, kiu tre komplezeme gvidis ilin tra la multaj luksaj pavilonoj kaj belaj ĝardenoj ilin ĉirkaŭantaj, samtempe detale klarigante la funkciadon de tiu modela Instituto.

RESUMO

Nia VII^a Kongreso en Reus restos certe en la memoro de ĉiuj kongresanoj kiel unu el la plej belaj, unu el la plej sukcesaj el la ĝis nun okazintaj en nia lando; neniu kongresurbo sin donis tiel sincere kaj tutkore al la esperantistaj gastoj kiel Reus; la tuta popolo, la plej distingindaj familioj, la aŭtoritatuloj eĉ ne unu momenton ĉesigis sian apogon al niaj festoj, kiujn ĉiu partoprenis kun la entuziasmo de konvinkita samideano.

Ankaŭ ne mankis al niaj kongresoj la oficiala apogo de la regnaj aŭtoritatoj: Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII estis akceptinta la Honoran Prezidantecon, kaj en lia nomo la Rektoro de la Barcelona Universitato D-ro Carulla malfermis la kongresojn kun varma kaj entuziasma parolado, pledanta por la oficialigo de Esperanto.

La elmontrejoj de la plej gravaj magazenoj de la urbo estis ornamitaj kun esperantistaj flagoj kaj en unu el ili oni ekspoziciis la belajn premiojn de la Literatura Konkurso; multaj personoj vizitadis ilin kaj komentariis kun tio la sukceson de niaj kunvenoj.

Ni ne povas ankaŭ silenti la dankon kiun ni ŝuldas al la societo «Centre de Lectura» kiu estis por ni dum la mallongaj kongresaj tagoj vera hejmo kaj rendevuejo por ĉiuj kongresanoj; en iliaj ĉambroj estis instalitaj la Akceptejo, la granda ofte vizitita Esperanta Ekspozicio, en ĝia teatro okazis la kunsidoj de niaj kongresoj, la

Honora Kafo, k. t. p., nur Esperanton oni aŭdis tie en tiuj ĝojaj tagoj.

Diversaj barcelonaj ĵurnaloj raportis pri la sukceso kaj disvolvigo de ambaŭ kongresoj, inter ili ni povas citi: *La Vanguardia*, *Las Noticias*, *La Veu de Catalunya*, *El Día Gráfico* kaj *La Tribuna*, kiu publikigis ankaŭ fotografaĵojn. La urbaj ĵurnaloj el Reus okupigis ankaŭ pri la detala priskribado de niaj festoj; ili estas «Fomento», «El Diario de Reus» kaj «Las Circunstancias»; la ilustrita semajna gazeto «Heraldo de Reus» publikigis numeron speciale dediĉitan al niaj kongresoj, kun longa raporto pri ĉiuj okazintaĵoj kaj fotografaĵoj de la Regino de la Floraj Ludoj, de la laŭreata poeto, k. t. p., ĝia redakcio meritas certe nian plej sinceran dankon por la bona propagando kiun ĝi faris tiel sindone al nia movado.

Fine nia plej kora kaj varma dankemo devas iri al tiuj bonvolemaj samideanoj kiuj formis la Organizan Komitaton, al la tiel komplezemaj kaj servemaj anoj de «Nova Semo» kiuj sub la prezido de S-ro Enric Aguadé, modelo de esperantistaj laboremuloj preparis al ni festojn kiuj longe ankoraŭ vivos en nia memoro.



La Pino en Formentor'¹

DEVIZO: *Sonoru tutmonda la livo
laŭ son' de nacia inspiro.*

Kor' mia amas arbon! Ol kverko, pli fortika;
ol olivuj', pli aĝa; kun verd' de oranĝarb'—
folioj ĝiaj velkas neniam; senefika
al ĝi, giganto, estas atak' de l' malamika
ventego de la mar'.

Ne montras ĉe l' folioj sin floro enamita,
al ĝi kisadi ombreon ne iras fontoflu';
sed Di' arome ŝmiris la kapon konsekrita
kaj faris al ĝi tronon sur mont' abrupt-rompita
kaj fonton ĉe marblu'.

Kiame for sur ondoj revivas lumo dia,
 ĉe l' branĉoj ne resonas de birdoj pepmurmur':
 de gipaet' aŭdiĝas la krio energia
 kaj flugilegojn svingas super amas' folia
 fluganta la vultur'.

Ĝi vivon ne subtenas per ŝlimo de la tero:
 tordiĝas ĝia forta radik' sur roka ŝel';
 ĝin nutras rosoj, pluvoj, lum' arda, ventvetero...
 kiel profet' ĝi havas por ĉefa vivlivero
 la amon de ĉiel'.

Belega arb'! Genion ĝi bildprezenti pravas:
 pro montojn superstara, pro al spaceg' aspir';
 se ter' al ĝi malmola, ĉiel', kiu ĝin ravas,
 branĉaron ĝian kisas, kaj ĝi la ŝtormon havas
 por glori kaj por dezir'.

Ho ja!... ke kiam siblas kun furioz' ventaroj
 kaj ŝaŭmen ŝajnas fali de l' arb' la roko-seĝ',
 ĝi tiam ridas, kantas, pli laŭte ol ondaroj,
 kaj finvenkinte skuas supere de nubaroj
 hararon kvazaŭ reĝ'.

Mi vin envias, arbo! Sur tero la malpura
 kiel sanktaĵo gvidos min via rememor';
 konstante lukti, venki, sur alt' reĝi lazura,
 sin nutri kaj vivadi ĉiele, per lum' pura...
 ho viv'! ho nobla sort'!

Animo forta, supren! Transflugu tra nubaro,
 sur alt' enradikiĝu laŭ l' arb' en roka grund':
 sub plandoj viaj falos de mond' kolera maro,
 kaj viaj kantoj iros trankvile tra ventaro
 samkiel la hirund'.

..... *Kataluna verkis* M. COSTA I LLOBER
Tradukis JOSEF GRA

ENLANDA MOVADO

ESPERANTISTA ARBARFESTO EN «CAN BARBA»

Jam por la dua fojo okazis kun plikreskanta sukceso la ĉinbara Arbarfesto kian la grupoj esperantistaj de la Vallés'a regiono — «Aplec» kaj «Katolika Stelo» de Sabadell, «Esperanta Nesto» de Barbad kaj «Lumon» de Terrasa — organizas dum unu el la someraj monatoj.

Tiun-ĉi jaron ĝi havis lokon la dimanĉon 27^{da} de Aŭgusto, en la bela kaj ombroŝita arbaro ĉirkaŭanta la farmodomon «Can Barba» kiu kuŝas preskaŭ en la centro de la Vallés'a regiono.

Jam matene ŝvarmis tra la arbaro multe da diversurbaraj samideanoj fruevenintaj, aliaj ŝidiĝis kaj matenmanĝis apud la fontoj kiuj igas pli agrabla tiun lokon; oni stablis ankaŭ por plia oportuneeco en konvena angulo kioskon por trinkaĵoj. Dum la tuta mateno venis ankoraŭ ĉiam novaj ĉeestantoj; speciale bonvenigitaj estis pli ol dekkvin barcelonaj samideanoj alveturintaj por ĉeesti la feston.

Je la dekmua ekludis la muzikistoj sardanon kiun dancis la plej multo de la ĉeestantoj; kaj tiel oni daŭrigis, dancante sub la ombro de pinoj, ĝis la horo de 1^a manĝo, kiu okazis je la 1^a tagmeze en speciale elektita loko meze de la arbaro; la tagmanĝon kiun partoprenis cento da samideanoj estis rapide kaj lerte servita de Sabadell'a hotelisto; malgraŭ la malfacilaĵoj kiujn supozas festenarango en tiel malproksima loko li sukcesis tre bone kontentigi ĉies bezonojn. Multaj samideanoj ne partoprenintaj la festenon, disiris al la diversaj fontoj por prepari siajn tagmanĝojn.

Post kaŝtrinkado kaj agrabla babilado ĉiuj sin direktis al la loko kie staris la scenejo improvizita inter la arboj; en mezalta negranda plataĵo ĉirkaŭita de altaj kaj densaj kverkoj oni aranĝis per multe da verdaĵo kaj diversaj ornamoj belefektan scenejon bone videblan de ĝia tuta ĉirkaŭaĵo; la publiko-loko estis ankaŭ tiel lerte elektita ke preskaŭ ĉiuj povis sidante oportune vidi la prezentadon. Intertempe estis ankoraŭ alvenintaj sennombraj veturiloj tiamaniere ke oni povas aserti sen ia trograndigo ke tie estis pli ol sescent personoj.

Je la 3^a kaj duono komenciĝis la ludo: samideanoj el Sabadell ludis kun sia kutima lerteco kaj sincereco la arte verkitan teatraĵon «La Festa de la Au-cells» de la fama dramverkisto Ignasi Iglesias; kun ili ludis bonege sian rolon la bela F-ino Pepeta Pelegrí; niaj lertaj samideanoj aŭdis ĉe la fino de sia laboro multajn meritajn aplaŭdojn.

Post malgranda intertempo eniris la scenejon S-ro Josep Grau akompanata de S-roj Casas, Riera, Ullar, Garriga, Torruella, el Sabadell kaj S-roj Chaler, Alavedra, Ventura el Terrasa. La elokventa Direktoro de K. E. eldiris tie

unu el siaj plej belaj paroladoj montrante per konvinkigaj argumentoj la pravecon de nia movado kaj laŭdegante per entuziasmaj vortoj la belecon de la lingvo internacia; tondranta aplaŭdado li eliris el la tuta ĉeestantaro kiam li aludis al S-ro Pujolà, kies laboron por Esperanto bedaŭrinde forprenis al ni liaj militistaj devoj. S-ro'n Grau ankaŭ oni longe aplaŭdis ĉe la fino de lia bela parolo.

Nelonge poste oni remalfermis la kurtuson kaj samideanoj el «Lumono» de Terrassa ludis la bonhumoran komedion «Cura de Moro» de la konata kataluna komediisto Frederic Sofer; la ĉeestantaro multe ridis la oftajn spritaĵojn de la nomita verko kaj fine dankis per aplaŭdo la bonan laboron de la ludantoj.

Post tio, iris ĉiuj al la farmodomo, en kies draĝejo oni aranĝis balon; multaj paroj ĝin partoprenis; intertempe ĝentilaj fraŭlinoj disvendis karamel-donacojn por la profito de la festo; la bato daŭris ĝis la sepa kaj duono kiam jam la suno transpaŝis Montserrat'on; tiam ĉiuj adiaŭdiris unu la alian, kaj dirinte; ĝis revido'n en la proksima jaro! ensaltis la veturilojn, kaj disiris hejmen kun granda kontento pro la tiel bone sukcesinta Arbarfesto. — *Ĉeestinto.*

BARCELONA. — En la granda salono de la *Barcelona Hejmo* de la K. E. F., la 17^{aa} de Novembro antaŭ grandnombra ĉeestantaro S-ro Joan Rosals diris belan paroladon pri la interesa temo: *Kompara studo inter la internaciaj lingvoj Volapuck kaj Esperanto.* Per flua parolo kaj plena kono de ambaŭ lingvoj li scias aĝrabligi sian paroladon, kies finon kronis multaj aplaŭdoj.

— En la sama salono, okazis la 20^{aa} de Januaro parolado pri la temo: *Teorioj de D-ro Ehrlich pri la imuno;* la paroladinto S-ro Mariàn Solà sukcesis per maniero simpla kaj klara komprenigi al siaj aŭskultantoj la famajn teoriojn de la granda antaŭnelonge mortinta bakteriologo; multaj aplaŭdoj salutis la finon de la esperanta prelego.

— La grupo esperantista «Ĉiam Antaŭen» okazigis la 25^{aa} de Marto 1916^a sukcesan ekskurson al *Montora Alsina*, kiun partoprenis pli ol 25 gesamideanoj; antaŭ ili klarigis S-ro González Llombart kun granda kompetenteco la utilecon kaj funkciadon de la diversaj aparatoj uzeblaj en la studo de Fiziko, kiuj estas tie elmetitaj; la ekskurso kaj vizito estis alĝrade kontentiga al ĉiuj partoprenantoj.

— La 21^{aa} de Junio la grupo «Barcelona Stelo» dediĉis Honoran Vinon al S-ro Artur Domènech, sia kunsocietano gajninta la unuan plej honoran premion en la Esperantistaj Floraj Ludoj de Reus; partoprenis la feston pli ol naŭdek gesamideanoj; dum ĝia daŭro parolis: S-ro J. Grau kiu proponis la malavaran lunĉon al nia kara poeto; S-ro Horta en la nomo de «Fervojista Stelo»; S-ro Rey kiu parolis en la nomo de C. N. R. de la VII^a Distrikto kaj rememorigis S-ro'n Pujolà; S-ro Muxi kaj S-ro Ledergerber, ŝviso kiu katalune parolis, kvankam antaŭ apenaŭ du jaroj li konis nek kastilan nek katalunan lingvon; S-ro Canales en reprezento de la grupoj «Nova Sentos» kaj «Liberos»; S-ro Piñol en la nomo de U. E. A.; S-ro Navas kiel laŭreato; S-ro Riera, knabeto en reprezento de junula grupo de li starigita; S-ro Castellà, en nomo de

«Solidaridad Obrera»; S-ro Rosselló de «El Día Gráfico»; S-ro Gran dankis S-ron Ledergerber kaj S-ron Doménech; S-ro Puiggali parolis en la nomo de la K. E. F. kaj fine S-ro A. Doménech dankis ĉiujn por la regalo kaj honoro al li faritaj kaj legis la premiitan poezion longe aplaŭditan de ĉiuj.⁸

— La 1^{aa} de Julio vespere je la 9^a okazis en la sidejo de «Barcelona Stelo» teatra ludado tre sukcesinta; post plana uverturo, oni prezentis la komikan teatraĵon «A la punta de l'Espasa» kaj la katalun-esperantan duaktan komedion «La Familia Vilaret» originale verkitan de nia kunsocietano S-ro Joan Gili; partoprenis la ludadon F-inoj Grau kaj Navas; S-roj Delclós, Vinyas, Guixà, Coca, Gili kaj Alba; ĉiu ricevis pro la bona prezentado multajn gratulojn.

PALMA DE MALLORCA. — Pro la elekto okazinta en la lasta ĝenerala kunsido de la ĉi-tiea grupo «Esperantista Klubo Palma», ĝia direktanta komitato estas la jena: Prezidanto, S-ro Bernardo Planas; Vicprezidanto, S-ro Joan Mascaró; Sekretario, S-ro Narcís Bofill; Vic-sekretario, S-ro Montserrat Vich; Kasisto, S-ro Jaume Lladó; Bibliotekisto, S-ro Antón Ramis; Voĉdonantoj, S-roj Joan Aguiló, Bernardo Rebassa kaj Francisco Barceló.

— En la ekzamenoj okazintaj en la grupo «Esperantista Klubo Palma» la tribunalo, kiu konsistis el S-roj J. Aguiló, J. Mascaró kaj N. Bofill, aljuĝis monpremio al S-ro Darwin Pons kaj honoran mencion al S-ro Nicasio Terrassa. — *La Korespondanto.*

TERRASSA. — La 15^{aa} de Oktobro S-ro M. Solà faris prelegon pri la temo: «Iom pri homa fiziologio»; per bona Esperanto li priakribis la digestan kaj spiran aparatojn kaj la sangocirkuladon; kelkaj desegnoj sur la tabulo helpis tre efike la disertacion, kiu estis tre ŝatata.

La 29^{aa} de la sama monato S-ro J. Figueras diris ankaŭ prelegon en Esperanto pri la interesa temo: «Deveno kaj komentarioj pri la Biblio». Dum unu horo li ĉarmis la aŭskultantaron rakontante la vivon de la hebrea popolo en Egiptujo kaj ĝian iradon tra la dezerto, post kio li ricevis multajn aplaŭdojn kaj gratulojn.

La 10^{aa} de Decembro oni solenis en la grupo «Lumon» la 57^{aa} datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof; tiun feston partoprenis, per legado de versaĵoj originalaj el la esperantista parnaso kaj per paroladoj, niaj gesamideanoj: F-inoj T. Cantarell, A. Stcart kaj A. Viver kaj S-roj Alavedra, Chaler, Ventura, Grané, Girona, Figueras, Martí kaj Solà.

— La 31^{aa} de Decembro okazis la ĉiujara ĝenerala ordinara kunsido de «Lumon» en kiu oni elektis la jenan komitaton por la jaro 1917^a: Prezidanto, S-ro J. Ventura; Bibliotekisto, S-ro J. Girona; Kasisto, S-ro Vicens Bufi; Voĉdonantoj, S-roj S. Chaler, L. Martí, J. Rigol kaj Sekretario, S-ro M. Solà.

— La 8^{aa} de Oktobro estis malfermita en la grupo «Lumon» kurso de Esperanto; dudek-kvin lernantoj sub la lerta gvidado de S-ro S. Chaler partoprenas ĝin.

— La grupo «Lumon» proponas al ĉiuj ceteraj esperantistaj societoj de nia lando sian novan loĝejon: strato Sant Antoni, 64. — *La Korespondanto.*

VENDRELL. — Kun granda sukceso okazis la 14^{an} de Januaro Bonfarada Vesperfesto organizita de la grupo «Fratego» kun la helpo de diversaj societoj kaj privatuloj de nia urbo.

La festo komenciĝis per malferma parolado de S-ro A. Julivert; sekvis kantado de la «Lira Vendrellense», poezioj legitaj de la lernantoj de «Academia Guimerà»; F-inoj Francisca Calaf kaj Beatriu Mercadé legis belajn verkojn; fluan paroladon pri la temo «Esperanto kiel idealo» diris F-ino Mario Julivert; versaĵojn kaj prozaĵojn legis S-roj A. Julivert kaj J. Masclans, direktoro de Academia Guimerà, kaj fine S-ro Urgell per siaj kantoj, nia samideano S-ro Carles Soler per sia flutludado kaj P-ro Ivern ĉe la piano gajnis al si longajn aplaŭdojn de la ĉeestantaro.

En la dua parto oni ludis la komedieton «A cà la Modista» bonege prezentitan de S-ino Pérez kaj samideanoj S-roj R. Fontanilles, C. Soler, A. Julivert kaj J. Marcé sub la direkto de S-ro Ferrán Ramón. S-ro J. Nin ludis la monologon «El Prestidigitador».

La granda salono de Teatro Tivoli estis plena de ĉeestantoj; honoris nin per alesto ankaŭ la aŭtoritatuloj, inter kiuj lia urbestra moŝto S-ro Fernández, al kiu oni liveris la kelkcentojn da pesetoj enspezitaj dum la festo.

Kuraĝigita de tiu sukceso «Fratego» intencas aranĝi alian pure esperantistan festegon. — *La Korespondanto*.

ZARAGOZA. — La 8^{an} de Majo de 1916^a okazis en tiu-ĉi urbo la unua ĝenerala kunsido por starigo de Aragona Esperantista Federacio; post provizora akcepto de la regularo aprobita de la Provincestro oni decidis:

1.^a Deklari starigita la Federacion kies sidejo estas tiu de Esperanta Societo Fratego, str. Luna, 9, en ĉi-tiu urbo.

2.^a Elekti la jenan komitaton: Prezidanto, S-ro Manuel Maynar; Sekretario, S-ro Emilio Gastón; Voĉdonantoj, S-ro Vicente Loren, F-ino María Luz kaj S-ro José Larruga.

3.^a Aliĝi al la Hispana Esperantista Konfederacio.

4.^a Komuniki tiujn decidojn kaj la aprobitan provizoran regularon al ĉiuj kunfederaciianoj.

La tuta materialo por la publikaĵo de tiu-ĉi numero de nia gazeto estis jam preta la lasta duono de februaro, sed kaŭze de la transloĝiĝo de l'presejo ĝi ne povis esti kompostita kaj presita ĝis nun; ankoraŭ ĉi-tiu malhelpo aldoniĝis al la multaj ĥinaj ne permesis al ni plenumi niajn bonajn intencojn. La proksima numero aperos, tamen, akurante. — La Redakcio.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO ratjos unufoje dum la jaro publikigi malgrandan anoncon, kiu senpage aperos ankaŭ sur *Amerika Esperantisto*.

Deziras korespondadon:

- S-ro Francisco Sagrera, str. Unió 2, Palafrugell, Hispanujo.
S-ro Tomás Iglesias, str. Cervantes 13, 4.^o, Santander, Hispanujo.
S-ro Juan Oliveras, str. Llum, 12, 1.^{er}, Manresa, Hispanujo.
S-ro Blanse Gaspard, barak 48, Harderwijk, Holanda.
S-ro Petro Babič, G. P. O., Auckland, New Zeland.
S-ro Jakov Vodanovič, G. P. O., Auckland, New Zeland.
S-ro Fernand Lepercq, Soldato, 13.^a, reg. Inf. Audelencourt par Clesmont, Haute Marne, France.
S-ro Rudnicky, poŝtoficisto, Taškent Je, (Russian Turkestan, Central Asia), pri vivo kaj laborkondiĉoj en Ameriko. Ĉar leteroj ne estas riceveblaj, skribu per P. K.
S-ro N. T. Goddard, 113, N. Univ., Vermilion, So. Dakota, Usono.
S-ro W. O. Wanzer, Beloit, Kans., Usono.
F-no Leona M. White, Beloit, Kans., Usono.
S-ro Henriko Chantry, Tendaro 1, Barako 30, Zeist, Holland.
S-ro Armand B. Coigne, 243 Belford Park Boulevard, New-York, U. S. A. deziraŝ korespondi pri psikologio.
S-ro Albert Burkett, 113 N. Univ., Vermilion, So. Dakota, Usono.
S-ro Wm. A. Knox, 113 N. Univ., Vermilion, So. Dakota, Usono.
S-ro M. V. Pangburu, 113 N. Univ., Vermilion, So. Dakota, Usono.
S-ro Benecchio Alessandro, Correspondante Mondiale, Cassella Postale 19,636, Lugano, Switzerland.
S-ro Mario Bru, instruisto, Tivissa (Hispanujo) deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

La proksima

JANUARA NUMERO

DE

Kataluna Esperantisto

Aperos senprokraste ĉirkaŭ la 20^a de Aprilo.

Kunfederacianoj! Helpu ĉiuj la funkciadon de la K. E. F.
kaj per tio la vivon kaj pligraviĝon de ĝia presorgano de nun
regule aperonta!